

*Henrik Seppik*

**LA TUTA  
ESPERANTO**

Gramatiko por progresintoj  
Gvidilo por kursestroj



eldonita en  
**1937**



*Henrik Seppik*

# LA TUTA ESPERANTO

**Gramatiko por progresintoj  
Gvidilo por kursestroj**



*eldonaĵoj*

**BILBAO (HISPANUJO)**

Unua eldono:

**"La tuta Esperanto"**

Henrik Seppik

Budapest: Literatura Mondo, 1937

Teksto de la libro prenita el la ret-paĝo:

**[www.esperanto.mv.pp.ru](http://www.esperanto.mv.pp.ru)**

de Jurij Finkel (Rusujo)

*Grafika aranĝo kaj kovrilo:*

Iñaki Vélez (Bilbao, Hispanujo)

Tiun ĉi dosieron vi rajtas presi por via propra uzo, sed ne ĝin vendi.

---

“Ĉ-eldonaĵoj”. Bilbao (Hispanujo), 2009

# ANTAŬPAROLO DE LA REELDONISTO\*

Tiu ĉi bonega lernilo unuafoje aperis antaŭ 46 jaroj\* ĉe la prestiĝa eldonejo “*Literatura Mondo*”. Dum tiu ĉi preskaŭ duona jarcento nia lingvo ne malmulte evoluis, sed tiu evoluo lasis sensanĝa la kernon, la bazon, la *fundamenton* de la lingvo, kaj la aŭtoro deziris prezenti ĝuste tion, en formo por ĉiuj komprenebla. Intertempe multe evoluis ankaŭ la lingvistiko, inkluzive la Esperanta – kompreneble, la plej freŝajn rezultojn de tiu evoluo oni vane serĉus en tiu ĉi libro.

Tamen, la celo de la aŭtoro estis doni al la legantoj ne teoriaran verkon, sed praktikan gramatikan kaj stilan gvidilon. Kaj tiun ĉi celon *La tuta Esperanto* elstare plenumis dum la pasintaj jardekoj; la Eldonejo certas, ke ankoraŭ longe ĝi povos utili al ĉiuj seriozaj studentoj de la Internacia Lingvo.

\* Antaŭparolo al la kvara eldono (Hungara E-Asocio, 1987) de la lernolibro, supozeble far ĝia eldon-redaktoro Vilmos Benczik. La eldono estis fotorepreso de la originalo [[Noto de la PDF-iganto](#)].

Kovrilo de  
“*La Tuta Esperanto*”  
Kvara eldono  
Budapest:  
Hungara E-Asocio, 1987

Formato: 12,3 x 8,1 cm.  
181 paĝoj.





## *Antaŭparolo*

Kiam antaŭ 17 jaroj kiel juna gimnaziano mi lernis Esperanton, antaŭ mi stariĝis diversaj lingvaj problemoj, al kiuj mi ne trovis respondon en miaj elementaj lernolibroj. Tial mia perfektigado estis tre pena kaj malrapida, ĉar klaran koncepton pri la plena strukturo kaj spirito kaj diversaj intimaj detaloj de la lingvo mi devis iom post iom ĉerpi per zorga legado de la literaturo kaj gazetaro, plejparte mem eltirante la regulojn.

Poste, precipe dum mia multjara agado en Svedlando, Norvegio kaj Ĉeĥoslovakio kiel profesia Cseh-instruisto, mi konstatis, ke la samajn malfacilaĵojn havas ĉiuj, kiuj volas fundamente ellerni nian lingvon, kaj ke la kaŭzo, ke ekzistas tiom da «eternaj komencantoj», ke ofte eĉ malnovaj kaj laŭdire perfektaj esperantistoj faras erarojn, kuŝas simple en tio, ke mankas lernolibro, kiu sisteme kaj en populara maniero klarigus al ili la tutan delikatan konstruon kaj mekanismon de la lingvo.

La celo de tiu ĉi libro, kiu antaŭ du jaroj aperis en Stockholm en sveda prilaboro kaj nun prezentas sin reverkrite kaj kompletigite en internacia vesto, estas forigi tiun mankon. Ĝi estas difinita por tiuj, kiuj jam tralernis iun elementan lernolibron aŭ vizitis kurson por komencantoj kaj nun deziras perfektigi sin kaj penetri profunden en la organismon de la lingvo, samtempe havante ankaŭ bonan ripetadon kaj ekzercadon. La libro volas esti ankaŭ speco de utila gramatika manlibro por pli-malpli perfektaj esperantistoj, kiuj bezonas klarigojn kaj konsilojn pri iu lingva demando. Per la helpo de la alfabeto registro en la fino de la libro oni povas facile trovi ĉiun necesan lingvaĵon.

Tiu ĉi libro ne volas esti teoria studo, sed *praktika helpilo* kaj *konsilanto* por tiuj, kiuj volas serioze ellerni kaj uzadi la Internacian lingvon en la diversaj fakoj de la internacia vivo. Tial ĝi ne sekvas sekajn dogmojn kaj regulojn, sed klopodas priskribi la vivantan

Esperanton, tiun Esperanton, kiu estas uzata en la praktika vivo de la miloj kaj miloj da esperantistoj; ne tiun Esperanton, kiu estis uzata antaŭ 30 kaj 40 jaroj, sed tiun, kiu estas uzata ĝuste nun.

Pro la sama kaŭzo mi laŭeble evitis gramatikajn terminojn, kiuj al gramatike neklera homo nenion diras, kaj uzis kelkajn novajn, sed internacie konatajn terminojn (rekta objekto, adverbialo) anstataŭ la ĝisnunaj pure Esperantaj (rekta komplemento, nereakta komplemento). Por ke ĉiuj facile komprenu la konstruon de la lingvo, mi evitis ankaŭ tro detalan gramatikan klasigon kaj tro detalajn klarigojn, kiuj estus interesaj al lingvisto, sed estas superflujaj al simpla uzanto de la lingvo. Kaj nur por la lasta tiu ĉi libro estas difinita. Se li trovos en ĝi helpon kaj ĝojon sur sia perfektiga vojo, mia celo estos atingita.

Orlová, decembro 1937.

**Henrik Seppik**



## ***Kelkaj konsiloj al kursgvidantoj***

Krom en simpla kaj facile komprenebla maniero ebligi al memlernantoj perfektigi en nia lingvo kaj penetri en ĝian spiriton, tiu ĉi libro celas forigi ankaŭ la mankon de lernolibro por la daŭrigaj kaj perfektigaj kursoj.

Dum mia multjara instruista agado en Svedlando, Norvegio kaj Ĉeĥoslovakio mi kutimis dividi la lecionojn de miaj daŭrigaj kursoj je diversaj partoj (konversacio, gramatiko, legado kaj tradukado kune kun gramatika kaj vortara analizo, kantado, ludoj ktp.), dediĉante al ĉiu el ili certan parton de la leciono. Tiamaniere la lecionoj fariĝas variaj, viglaj kaj interesaj, dum monotoneco estas la plej granda malamiko de la lernado.

Por ekzerci pens- kaj parolkapablon en Esperanto, la ĉefa parto de la leciono estas konversacio kaj dialogoj inter la instruisto kaj lernantoj; ankaŭ inter la lernantoj mem, sed ĉiam sub la kontrolo kaj gvidado de la instruisto. Jen kelkaj utilaj temoj por tio: hejmo, familio, lernejo, mebloj, vestoj, profesioj, urbo kaj kamparo, sezonoj, bestoj, fruktoj k.t.p. Tre utile estas priparoli ankaŭ bildojn kaj eksterlandan (ekz. kongresan) vojaĝon. Plej facile la konversacio funkcias tiel, ke la instruisto prezentas al la lernantoj bone pripensitajn kaj facile respondeblajn demandojn, kiujn la lastaj respondas unuope aŭ ĥore. Per tiaj interparoladoj, kiujn la instruisto fundamente pripensas antaŭ la leciono, prefere eĉ skribe antaŭpreparas, oni havas bonan okazon ankaŭ por lernado de novaj vortoj.

Dum la interparolado oni ofte tute spontane venas al diversaj gramatikaj problemoj, kiujn la instruisto klarigas dum la gramatika parto de la leciono, samtempe uzante la okazon ankaŭ por sistema pritraktado de la lingvokonstruo.

Nun sekvas legado de speciale elektitaj tekstoj, ilia tradukado kaj analizado. Ĉe tio la instruisto lasas al la lernantoj laŭeble multe da memstareco, sed ĉiam helpante, kiam estas necese, korektante ĉiujn erarojn kaj klarigante la novaĵojn. Por la legado oni povas uzi la ekzercojn de tiu ĉi libro, kiuj estas tiel verkitaj, ke ĉiu el ili pritraktas certan gramatikaĵon, aŭ oni povas uzi tute apartan legolibron, ekz. «La verda koro» de Baghy, «Karlo» de Privat, «Infanoj en Torento» de Engholm, «Trans la Fabeloceano» de Szilagyi k.t.p.

La lecionojn oni povas komenci kaj fini per komuna kantado, kaj eĉ diversajn ludojn oni povas aranĝi dum aŭ post la lecionoj, uzante dum ili nur Esperanton. Por iu leciono estas rekomendinde enscenigi ankaŭ komedieton, prezentatan de la lernantoj, kaj aranĝi komunan diskutadon pri iu interesa kaj aktuala temo.

Aparta zorgo de la instruisto estas tio, ke jam de la komenco ĉiuj gekursanoj ekkorespondu kun eksterlandanoj, kaj ke iu bona Esperanta gazeto ĉiam estu havebla. Por sproni la intereson kaj entuziasmon de siaj gelernantoj, li ne forgesu de tempo al tempo informi ilin pri la lastaj sukcesoj de Esperanto en- kaj eksterlande.

Dum la tuta kurso oni uzu Esperanton laŭeble multe – ne la gepatran lingvon, ĉar oni kunvenas ja ne por lerni kaj ekzerci ĝin, sed Esperanton! Komence tio eble ne estas facila, sed baldaŭ ĉiuj alkitimigas. Nur la gramatikaj klarigoj okazu en la gepatra lingvo, por ke oni plene kaj ĝuste komprenu ilin.

# UNUA LEKIONO

## 1. Alfabeto.

La alfabeto de Esperanto konsistas el 28 literoj: 5 vokaloj (*a, e, i, o, u*) kaj 23 konsonantoj (*b, c, ĉ, d, f, g, ĝ, h, ĥ, j, ĵ, k, l, m, n, p, r, s, ŝ, t, ŭ, v, z*).

La nomoj de la literoj estas *a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo*. Tiu -o estas aldonata pro tio, ke la konsonantoj ne estas facile elparoleblaj sen vokalo, kaj ja ĉiuj nomoj havas la finaĵon -o. La nacilingvaj literonomoj estas evitindaj en la internacia uzo, ĉar, ne estante egalaj en la diversaj lingvoj, ili povas facile kaŭzi miskomprenon.

Ĉiu litero estas elparolata ĉiam memstare kaj senŝanĝe kaj al ĉiu sono respondas nur unu litero. Tial anstataŭ la angla *ch* ni havas *ĉ*, anstataŭ la germanaj *ch* kaj *sch* resp. *ĥ* kaj *ŝ*; *c* kaj *g* estas elparolataj same antaŭ *a, o, u* kaj *e, i*. Tiu ĉi fonetika principo estas grava pliboneco de Esperanto kaj faras ĝin vere internacia kaj egale facile lernebla kaj uzebla por ĉiuj popoloj. Se anstataŭ *ĉ* ni skribus *ch*, tio povus ŝajni natura al la angloj kaj hispanoj, sed la francoj estus ĉiam tentataj elparoli ĝin kiel *ŝ*, la italoj emus diri *k*, dum la germanoj kaj ĉeĥoslovakoj malfacile povus liberiĝi de sia *ĥ*.

## 2. Elparolo.

Ĉar en Esp. ekzistas nur 28 sonoj (la naciaj lingvoj havas multe pli!) kaj ili ĉiuj estas pli-malpli internaciaj (mankas tiaj specialaĵoj kiel la angla *th*, la hispana *c*, la francaj nazaloj, la germanaj *ä, ö* kaj *ü*, la ĉeha *r'*, la polaj *rz* kaj *y*, la sveda *ng* k.t.p.), por ĉiuj popoloj estas multoble pli facile ellerni ĝian ĝustan elparolon ol tiun de kiu ajn alia lingvo. Se tamen kelkfoje ni aŭdas malĝustan kaj malbelan elparolon, tiam la kaŭzo estas ne la «speciala konstruo» de la parol-organoj, sed simple neserioza rilato al la elparolado. Cetere eĉ fuŝa elparolado,

kaŭzata de blinda imitado de la gepatra lingvo, kutime ne malhelpas la interkompreniĝon kaj ne tiom ofendas la orelojn, kiom ekz. angla lingvo, parolata per franca akcento, kaj male.

Tamen la honora devo de ĉiu esp-isto estas akiri ĝustan, internacian kaj belsonan elparolon. Ĉiu sono estu formata klare kaj neniun literon oni rajtas «forĝluti», kiel ofte okazas en la naciaj lingvoj. Precipe atentu la vokalojn, kiuj estu klare kaj distinge eldirataj: anstataŭ *amas* ne diru «*emes*», «*omos*» aŭ ion similan! *E* ne ŝanĝiĝas antaŭ *r* kiel en la germana kaj skandinavaj lingvoj, sed ankaŭ en la vortoj *lerni*, *verda*, *perdi* k.t.p. ĝi restas la sama kiel en *venki*, *vesto*, *pendi*.

*B*, *d*, *g* estas sonoraj. Zorge diferencigu ilin de *p*, *f*, *k*, por ke ne okazu miskomprenoj: bano – pano, dano – tano, galo – kalo, budo – putto, k.t.p. *M* kaj *n* ne elparolu tra la nazo kiel en la franca lingvo. anstataŭ *la* ne diru «*lja*» kaj anstataŭ *saluti* ne «*saljutji*», kiel faras poloj kaj rusoj. Antaŭ *i* la konsonantoj ne moliĝas: *nd* en *vendi* elparoliĝas tute same kiel en *vendas* (ne «*venjdi*»!). Kaj ne elparolu la konsonantojn duoble kiel en itala lingvo: ne «*montetto*» kaj «*ĉevalacĉo*», sed *monteto*, *ĉevalaĉo*, ne «*bella*», sed *bela*, k.t.p. Ankaŭ ne dehaku en la parolo la gramatikajn kaj aliajn finaĵojn, kiel kelkaj faras: ne «*lamp-o*, *grand-a*, *star-as*, *vid-i*, *libr-oj*, *ki-u*, *ki-al*, *ti-e*, *ti-am*», sed ĉiam flue: *lampro*, *granda*, *staras*, *vidi*, *libroj*, *kiu*, *kial*, *tie*, *tiam* k.t.p.

### 3. s kaj z.

Ofte germanoj, francoj kaj ĉeĥoslovakoj diras *z* anstataŭ *s*, kiam la lasta staras inter du vokaloj aŭ post *r* kaj *n* («*braziko*» anstataŭ *brasiko*, «*dezegni*» anstataŭ *desegni*, «*diverzaj*» anstataŭ *diversaj*, «*kurzo*» anstataŭ *kurso*, «*penzi*» anstataŭ *pensi*, «*konzumi*» anstataŭ *konsumi*, k.t.p.). Finnoj siavice elparolas *s* simile al ŝ («*kaŝtelo*» anstataŭ *kastelo*, «*kaŝo*» anstataŭ *kaso*) kaj germanoj emas diri «*ŝtrato*» anstataŭ *strato*, «*ŝporto*» anstataŭ *sporto*, k.t.p. Tia malĝusta prononco sonas ne nur malbele, sed povas ankaŭ malhelpi la interkompreniĝon, ĉar estas ja granda diferenco inter *rozo* kaj *roso*, *pezi* kaj *pesi*, *kaŝo* kaj *kaso*!

*s* estas sibla sono nesonora, kiel en la vortoj: *aresti*, *kosti*, *masonisto*, *adreso*, *kaso*, dum *z* estas sonora zuma sono, kiun faras la musoj kaj aliaj insektoj flugante (zzzz): *rozo*, *razi*, *rezultato*,

kuzino.

#### 4. *ng kaj nk.*

Pro reguleco oni devus la literon *n* antaŭ *g* (*longa, lango*) kaj *k* (*benko, konko*) elparoli en la sama maniero kiel antaŭ *d* (*lando, ondo*) kaj en ĉiuj aliaj kombinaĵoj. Sed tia elparolo estas nenatura, malfacila kaj kontraŭa al la reguloj de la internacia fonetiko. Pli facile kaj nature estas en tiaj okazoj elparoli *n* iom naze, same kiel en la naciaj lingvoj, ĉar ja ankaŭ Esperanto kiel vivanta lingvo devas subiĝi al la ĝeneralaj fonetikaj reguloj.

Sed tio ĉi ne koncernas la kunmetitajn vortojn (bankuvo, bangasto, vinglaso), kie *n* konservas sian originan prononcon.

#### 5. *bs, bt, kz.*

Same en la vortoj: *absolute, absurda, obtuza, ekzemplo, ekzisti* k.a. *bs* kaj *bt* devus esti elparolataj kun la sama *b* kiel en *sabato* kaj *abdiki*, *kz* kun la sama *k* kiel en *akra*. Sed tio estas malfacila kaj kontraŭnatura. Tial ni diras kiel en la aliaj lingvoj «*apsolute, apsorda, optuza, egzemplo, egzisti*». Sed en kunmetitaj vortoj kaj post prefikso *ek-* ili kompreneble konservas sian originan prononcon: *korbtenilo, trabsigno, ekzumi*.

#### 6. *ĥ.*

La plej malofta Esp-a litero *ĥ* estas elparolata kiel tre orta, duobla *h* (tian sonon oni faras sopirĝemante): *eĥo, jaĥto, monaĥo, ĥano, ĥoro, ĥolero* k.t.p.

*Ĥ* estas elmortanta litero. Tuta serio da vortoj kun komenca silabo *ark-* (antaŭe *arĥ-*) estas nun eĉ oficiale skribata per *k* anstataŭ *ĥ*: *arkaika, arkaismo, arkeologo, arkipelago, arkitekto, arkitekturo, arkivo* k.t.p. Ankaŭ la antaŭa *teĥniko* skribiĝas nun oficiale *tekniko*.

Multaj forigas *ĥ* ankaŭ en tiaj vortoj, kie ĝi estas oficiala: *kaoso* (*ĥaoso*), *kemio* (*ĥemio*), *mekaniko* (*meĥaniko*), *koruso* (*ĥoro*), *ĉino* (*ĥino*), *jakto* (*jaĥto*) k.t.p.

#### 7. *Silabo.*

Silabo estas sono aŭ grupo de sonoj, kiu estas elparolata per unu

spiro. Ĉiu silabo povas enhavi nur unu vokalon: *si-la-bo*, *kre-to*, *fa-ci-la*, *tra-i-ri*, *te-ni*, *he-ro-o*, *ge-o-gra-fi-o*, *Es-to-ni-o*. *J* kaj *ŭ* ne estas vokaloj kaj tial memstaran silabon formi ne povas: *Eŭ-ro-po*, *laŭ-di*, *poŭ-po*, kaj: *aj-lo*, *soj-lo*, *ja-ro*, *jus-ta*.

La silabigado okazas ĝenerale laŭ la samaj reguloj kiel en la aliaj lingvoj; *cit-ro-no* aŭ *ci-tro-no*, *prob-le-mo* aŭ *pro-ble-mo*. Pro klareco estas rekomendinde ne intermiksi afiksojn, radikojn kaj gramatikajn finaĵojn: *tranĉ-il-o*, *patr-in-o*, *mal-akr-a*, *ba-nan-arb-o* (ne «*ba-na-nar-bo*», ĉar tio estus malfacile komprenebla), *lav-akv-o* (ne «*la-vak-vo*!»).

Praktikan valoron la silabigado havas tiam, kiam oni bezonas dividi iun vorton inter du linioj. Ĉe tio nepre evitu transporti solan gramatikan finaĵon, precipe *-n* kaj *-j*

## 8. Akcento.

Akcenton havas ĉiam la **antaŭlasta** silabo de la vorto: *homo*, *krajono*, *Esperanto*, *vokalo*, *facila*, *pomoj*, *hierau*, *ankaŭ* (ne «*pomoj*, *hierau*, *ankaŭ*», ĉar *j* kaj *ŭ* ne estas vokaloj), *Estonio*, *geografio*, *historio*, *apud* (ne «*apud*!»), *malbona* (ne «*malbona*!»), *ekiri* (ne «*ekiri*»). Precipe hungaroj, ĉeĥoslovakoj kaj finnoj zorge atentu la ĝustan akcentadon, ĉar pro influo de sia gepatra lingvo ili tre emas akcenti la unuan silabon de la vorto («*la hungaraj esperantistoj tutkore bonvenigas vin*» anstataŭ *la hungaraj esperantistoj tutkore bonvenigas vin*).

Ankaŭ en la kunmetitaj vortoj akcenton havas la antaŭlasta silabo de la tuta vorto: *dompordo*, *buterpano* (ne «*buterpano*», kiel kelkaj diras), *kolorriĉa* (ne «*kolorriĉa*»), *matenmanĝo* (ne «*matenmanĝo*»). Sed kiam estas necese aparte substreki la unuan vorton de la kunmetaĵo, oni escepte transportas la akcenton al ĝi, same kiel ankaŭ en la frazo oni akcentas tiun vorton, pri kiu oni volas speciale atentigi: *Matenmanĝon mi deziras, ne tagmanĝon!* Same ĉe prefiksoj: *Iru maldekstren, ne dekstren!* *Li estas nia patro, ne bopatro.*

## 9. Longeco de la vokaloj.

Komparu la du *e* en la vorto *vetero* kaj vi trovas, ke ili ne estas egalaj: la dua, akcentata, estas pli longa ol la unua, senakcenta. Tiel

estas pri ĉiuj vokaloj – la akcentataj estas longaj, la senakcentaj estas mallongaj: *makadami, honoro, murmuri, ĉevaleto*.

Plue komparu *a* en la vortoj *paro* kaj *parto* kaj vi trovas, ke en *paro* ĝi estas pli longa ol en *parto*. La kaŭzo estas tio, ke en *paro* post *a* estas nur unu konsonanto, sed en *parto* du konsonantoj. Kiam akcentatan vokalon sekvas neniu aŭ nur unu konsonanto, ĝi estas longa, sed kiam ĝin sekvas du aŭ pli multaj konsonantoj, ĝi estas mallonga: *poŝo – poŝto, kreto – kresto, nuko – nukso, viro – virto, kamforo – komforta, barako – barakti*.

Kiam unusilaba vorto finiĝas per konsonanto, la vokalo estas mallonga: *dum* (sed en *dume* estas longa *u*), *per* (sed *pere*), *min* (sed *mia*). En la vorto *unu* ambaŭ vokaloj estas mallongaj, same en *apud*. *Patro* estas elparolata de kelkaj kun longa, de aliaj kun mallonga *a*.

Ne elparolu la vokalojn tro longe kaj tire, ankaŭ ne tro mallonge, hake, sed sekvu la oran mezvojon!

## 10. Vortklasoj.

La lingvo konsistas el vortoj, kiuj dividiĝas je 9 klasoj:

1. **Substantivoj** estas vortoj, kiuj respondas al la demando «kio ĝi estas?» kaj nomas objektojn, estaĵojn k.t.p.: *lampro, maŝino, libro, hundo, birdo, homo, knabo, Karlo, elektro, amo, libereco*. La substantivoj havas la finaĵon *-o*.

La substantivoj siavice dividiĝas je komunaj nomoj kaj propraj nomoj. La komunaj nomoj distingas certan specon de objektoj kaj estaĵoj (*lampro, libro, floro, pomo, seĝo, homo, amo*), dum la propraj nomoj indikas unu solan, certan objekton, lokon aŭ estaĵon kaj diferencigas ĝin de ĉiuj aliaj el la sama speco (*Zamenhof, Petro, London(o), Hispanujo, Eŭropo, Esperanto, la Nigra Maro, Longstrato, Literatura Mondo*). La familiaj, personaj kaj lokaj nomoj estas kutime uzataj en ilia nacilingva formo (*Privat, Kalocsay, Jean Forge, Marta, Napoli, Tallinn*). Sed internacie konataj urbnomoj estas kutime esperantigataj (*Londono, Parizo, Berlino*), same ankaŭ internaciaj personaj nomoj (*Andreo, Johano, Henriko, Aleksandro, Teodoro*).

2. La **adjektivoj** respondas al la demando «kia ĝi estas?» kaj indikas kvaliton aŭ econ: *granda, bona, bela, varma, ruĝa*. Ĉiuj adjektivoj havas la finaĵon *-a*.

3. La **verboj** respondas al la demando «kion ĝi (li, ŝi k.t.p.) faras?» aŭ «kio okazas?» kaj esprimas agon aŭ staton: *skribas, dormis, manĝos, promenus, stari, venu, pluvas, estas*. La verboj havas la finaĵojn *-as, -is, -os, -us, -i* kaj *-u*.

4. La **pronomoj** anstataŭas substantivojn kaj adjektivojn: *mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, ili, tio, kiu, ĉia, nenia*.

5. **Numeraloj**: *unu, du, tri, dek, cent, mil*.

6. La **adverboj** precizigas verbojn, adjektivojn kaj aliajn adverbojn kaj indikas manieron, tempon, lokon, cirkonstancon k.t.p.: *bone, bele, frue, nokte, hieraŭ, ankaŭ, supre, jes, ne*. La derivitaj adverboj havas la finaĵon *-e*.

7. **Prepozicioj** estas uzeblaj nur kune kun substantivoj kaj pronomoj (neniam memstare) kaj indikas ilian rilaton al aliaj partoj de la frazo: *sur (la tablo), en (la poŝo), ekster (la domo), super (la urbo), kun (mi)*.

8. La **konjunkcioj** kunligas frazojn kaj frazpartojn: *kaj, sed, nek ... nek, aŭ, kvankam, tamen, do, ĉar, ja, se, ol, ĉu*.

9. **Interjekcioj**: *ha! ho! he! fi! st! brr! miaŭ, voŭ-voŭ! zzzzz!*

## 11. Majuskloj kaj minuskloj.

La literoj dividiĝas je minuskloj aŭ malgrandaj literoj (*a, b, c, d...*) kaj majuskloj aŭ grandaj literoj (*A, B, C, D...*).

### Granda komeclitero estas uzata:

1. En la komenco de ĉiu memstara frazo: *La vetero estas bela*.

2. En la propraj nomoj: *Julio Baghy, Budapest, Francujo, Ameriko, la Balta Maro, Internacia Esperanto-Muzeo, Literatura Mondo, Petro la Granda*. (Povas ja troviĝi multaj grandaj kaj ankaŭ malgrandaj Petroj, sed ekzistas nur unu kun la nomo *Petro la Granda* [rusa caro]).

**Rimarko:** La popolnomoj (*franco, anglo, germano, svedo* k.t.p.) estas ne propraj, sed komunaj nomoj. Tial mankas kaŭzo skribi ilin per granda komeclitero. Same iliaj adjektivaj formoj (*la itala lingvo, la norvega literaturo* k.t.p.) devas esti skribataj per minusklo. Sed la vorto *Esperanto* estas kutime skribata per granda komeclitero (kvankam en multaj naciaj lingvoj oni skribas ĝin



minuskle), ĉar ĝi estas ja propra nomo, same kiel *Amsterdam*, *Goldsmith* k.t.p. Por diferencigi ĝin de la verbo *esperi* multaj uzas ankaŭ ĝian adjektivan kaj adverban formon majuskle (*la Esperanta literaturo*, *ni parolas Esperante*; *esperante* signifas *dum ni esperas*), sed ĝiaj derivaĵoj per la afiksoj estu kompreneble skribataj minuskle (*esperantisto*, *esperantigi*, k.t.p.).

3. Per granda komenclitero oni personigas, idealigas, esprimas respekton: *la Homo*, *la Ora Epoko*, *Dio*. Kelkfoje, precipe en leteroj, oni skribas ankaŭ la vorton *vi* per majusklo (*Vi*), volante elmontri specialan respekton.

4. Per granda komenclitero estas ofte skribataj la nomoj de la monatoj (*Januaro*, *Februaro*, *Marto*), sed multaj skribas ilin ankaŭ minuskle (*januaro*, *februaro*, *marto*). La tagoj de la semajno estas ĉiam skribataj per malgranda komenclitero: *dimanĉo*, *lundo*, *mardo*, k.t.p.

5. Kutime ankaŭ la mallongigoj de la titoloj: *doktoro* kaj *profesoro* estas skribataj per granda komenclitero: *D-ro Zamenhof*, *Prof. Collinson*. Sed la mallongigoj de *sinjoro* (*s-o* aŭ *s-ro*), *sinjorino* (*s-ino*), *fraŭlino* (*f-ino*), *samideano* (*s-ano*), *samideanino* (*s-anino*), *kamarado* (*k-do*) kaj *kamaradino* (*k-dino*) estas kutime skribataj per minusklo. Kelkfoje, kiam oni volas elmontri specialan respekton, precipe ĉe alparolo en leteroj, ankaŭ tiuj vortoj estas skribataj per granda komenclitero, same kiel *Vi*.

## **TASKO 1.**

*(Elskribu aparte ĉiujn substantivojn, adjektivojn k.t.p.!)*

### **Skeptika vilaĝanino**

Maljuna vilaĝanino venis al Moskvo. Kun granda intereso ŝi rigardis la urbon kaj admiris la aŭtomobilojn kaj tramojn, ĉar la unuan fojon en sia vivo ŝi estis en granda urbo.

Interalie ŝi vizitis ankaŭ la bestan ĝardenon, kie ŝi vidis diversajn strangajn bestojn, kiajn ŝi neniam antaŭe vidis. Kiam ŝi fine venis al loko, kie estis du ĝirafoj kun longegaj koloj, ŝi ne povis plu teni sin kaj ekkriis indigne: «Tio estas trompo! Tiaj bestoj ne povas ekzisti!»

Poste oni montris al ŝi kamelon. Kiam la simpla maljunulino ekvidis tiun malbelan beston, si tuj ekkriis kolere:

«Ho, tiuj komunistoj! Kion ili faris el la ĉevalo!»

# DUA LEClONO

## 12. Nedifina artikolo.

Nedifina artikolo en Esperanto ne ekzistas. Jam per si mem la vortoj estas nedifinitaj: lampo = iu lampo, tablo = iu tablo, k.t.p.

Kelkfoje tamen *unu* estas uzata kiel nedifina artikolo («*Unu vidvino havis du filinojn*» ĉe Zamenhof), sed tio ne estas imitinda, ĉar *unu* kiel numeralo indikas ja nombron, kaj dirante *unu vidvino* oni asertas, ke ne temas pri du aŭ pli multaj vidvinoj, sed pri unu sola. La uzado de *unu* kiel nedifina artikolo povas kaŭzi eĉ miskomprenojn: se vi diros «*mi havas unu bonan edzinon*», oni eble opinios, ke vi havas kelkajn edzinojn, el kiuj nur unu estas bona. Sed ja ne tio estis la intenco! Diru tial tute simple *mi havas bonan edzinon*, ĉar estas ja memkompreneble, ke vi havas unu edzinon, ne du.

Volante speciale akcenti nedefinitecon, oni uzas la nedifinan vorton iu: '*iu dana samideano skribis al mi*', '*En iu gazeto mi trovis tre interesan artikolon*'.

## 13. Difina artikolo.

**A)** La difina artikolo (*la*) estas uzata:

1. Kiam temas pri io konata, difinita, por diferencigi ĝin de ĉiuj aliaj el la sama speco: *Mi legas libron; la libro* (= tiu libro, kiun mi legas) *estas interesa*. *En la ĝardeno* (= konata, certa ĝardeno) *sub mia fenestro kreskas multaj floroj; la floroj* (= tiuj floroj, kiuj kreskas sub mia fenestro) *estas tre belaj*. *Mi sidas ĉe la tablo* (= certa, difinita tablo, **mia** tablo) *kaj skribas*. *Li metis la manon* (= sian manon) *en la poŝon* (= sian poŝon). *La itala lingvo* (= tiu lingvo, kiu estas ĝenerale konata sub la nomo «itala») *estas bela*.

**Rimarko:** Kiam kelkaj substantivoj sekvas unu la alian, ne estas necese ripeti la artikolon antaŭ ĉiu el ili, sed sufiĉas, se ĝin havas nur la unua: *La libro, plumo kaj kajero kuŝas sur la tablo.* Sed pro klareco oni povas ja ankaŭ diri: *la libro, la plumo kaj la kajero.*

2. Kiam parolante pri io aŭ iu oni ĝeneraligas, t.e. pensas pri **ĉiuj** el la sama speco: *La homo* (= ĉiu homo) *havas du piedojn.* *La ŝuisto* (= ĉiu ŝuisto) *riparas ŝuojn kaj botojn.* *Oni diras, ke la vero* (= ĉiu vero) *ĉiam venkas.* – Same en multnombro: *La svedoj* (= ĉiuj svedoj) *vivas en Svedlando.* *La birdoj* (= ĉiuj birdoj) *havas du flugilojn.*

3. Kiam oni celas **tuton** de io: *Donu al mi la kafon!* (= la tutan, la priparolitan aŭ la montratan kafon)! *La knabo manĝis la panon* (= la tutan aŭ la priparolitan panon). Sed kiam temas pri **parto** de io, artikolo ne estas uzata: *Donu al mi kafon* (= iom da kafo)! *Sur la stratoj iras homoj* (= nedifinita nombro da homoj).

4. Kutime antaŭ **plej** + **adjektivo**: *Li estas la plej bona homo en la tuta mondo.* – Kelkfoje antaŭ **plej** + **adverbo** (*Margareto kantas la plej bele el ĉiuj*), sed tio ne estas imitinda.

## **B)** Artikolo **ne** estas uzata:

1. Antaŭ **propraj nomoj**. Sekve neniam «*la Kopenhago, la Eŭropo, la Petro, la Esperanto*», sed simple: *Kopenhago, Eŭropo, Petro, Esperanto*. Kun la nomoj de riveroj kaj montoj kelkaj tamen uzas artikolon: *la Danubo, la Alpoj*. Sed tio estas evidente imitado de nacilingva kutimo.

Artikolo **ne** estas uzata ankaŭ tiam, kiam antaŭ la propra nomo troviĝas iu **titolo** aŭ alia vorto, indikanta rangon aŭ profesion (*sinjoro, sinjorino, fraŭlino, doktoro, advokato, ŝuisto, ŝoforo* k.t.p.): *Ĉu vi konas sinjorinon Isbrücker* (ne «*la s-inon Isbrücker*»!). *Esperanto estas kreita de D-ro Zamenhof* (ne «*de la D-ro Z.*»!).

**Rimarko:** Sed kiam antaŭ la propra nomo staras adjektivo, oni devas uzi artikolon: *La bela Stockholm.* *La fama Julio Baghy.* *La facila Esperanto.* *La malnova Eŭropo.* *La blua Danubo.* Same: *La urbo Stockholm.* *La rivero Volga.* *La monto Sinaj.* Kaj ankaŭ: *la Balta Maro, la Altaj Tatroj, la Granda Urso*, k.t.p.

2. Antaŭ la nomoj de la **monatoj** kaj **semajnotagoj**: *La 6-an de*

*novembro* (ne «*la novembro*»!). *Dimanĉo* (ne «*la dimanĉo*»!) estas la plej bona tago de la semajno.

3. Kiam oni ĝenerale parolas pri la **substancoj** kaj **sezonoj**: *Ŝtalo estas fleksebla, sed ŝtono ne estas fleksebla. Vitro estas rompebla kaj travidebla. Somero estas la plej varma kaj vintro estas la plej malvarma sezono.* Sed oni povas diri ankaŭ *la somero, la vintro* k.t.p.

4. Kiam iu **alia difina vorto** (*tiu, mia, via* k.t.p.) estas uzata: *Tiu ĉambro* (ne «*la tiu*» aŭ «*tiu la ĉambro*») estas bela. *Mia patro* (ne «*la mia patro*») estas maljuna.

5. Kutime en **librotitoloj**: *Ĉeĥoslovaka antologio. Bela Joe. Krime kaj puno. Stranga Heredaĵo. Tamen ofte artikolo estas uzata: La Ora Ŝtuparo. La viro el Francujo. La junulino el Stormyr.*

Kun la nomoj de organizoj k.s. oni kelkfoje uzas artikolon (*la Ligo de Nacioj*), sed tio ŝajnas deveni de la influo de naciaj lingvoj kaj estas pli logike uzi ilin kiel proprajn nomojn sen artikolo.

**Rimarko:** La artikolo ne estas superflua balasto, kiel eble opinias slavoj kaj aliaj, en kies gepatra lingvo ĝi mankas, sed ĝi estas nepre necesa por la klareco kaj precizeco de la esprimoj, al kiuj ĝia uzo aŭ neuzo donas ofte tute alian sencon.

## 14. Malfeliĉa komercisto.

*(Atentu la uzadon de la artikolo!)*

Juna homo (= iu juna homo), kiu ne havis laboron (= ian laboron) en sia urbo, veturis al Londono por serĉi helpon (= ian helpon) ĉe sia parenco. La parenco (= tiu parenco, ĉe kiu la junulo serĉis helpon) donis al li kelkajn ĉapelojn kaj konsilis al li stari sur la strato (= strato en Londono, do certagrade difinita strato) kaj vendi ilin. Ĝoja, ke nun li povos iom perlabori, la junulo (= tiu junulo, pri kiu ni parolas) prenis la ĉapelojn (= tiujn ĉapelojn, kiujn la parenco donis al li) kaj iris kun ili al homplena strato (= iu homplena strato) kaj ekstaris en oportuna anguleto (= iu oportuna anguleto).

En la vespero (= en la sama vespero) li revenis al la parenco, kaj tiu demandis: «Nu, ĉu vi multe vendis?» – «Ha», malgaje respondis la junulo, «eĉ unu ĉapelon mi ne vendis» – «Kial? Ĉu vi al neniu proponis? Kion do vi faris dum la tuta tago?» – «Mi tenis la ĉapelojn

bone kaŝite en la korbo (= en tiu korbo, kiun li kunhavis), por ke la polvo (= polvo ĝenerale, aŭ la polvo de la strato) ne difektu ilin. Sed en la daŭro (temas pri la daŭro de la tago) de la tuta tago mi ne havis okazon (= ian okazon) proponi ilin al iu, ĉar ĉiuj homoj, kiuj preteriris sur la strato (= sur tiu strato, kie la junulo staris), jam havis ĉapelon (= ian ĉapelon) sur la kapo (= sia kapo).»

## **TASKO 2.**

*(Alskribu artikolon tie, kie ĝi estas necesa.)*

### **Bifsteko kun fungoj**

Angla komercisto kun nomo John Bull vojaĝis dum libertempo en Hispanujo. Sed ĉar li ne scipovis hispanan lingvon, li ne povis paroli kun hispanoj, kaj tial li ofte havis malagrablajojn.

En Sevilla li iris en restoracion kaj mendis sian plej ŝatatan manĝaĵon –bifstekon kun fungoj. Sed kelnero ne komprenis lin. Tiam anglo ekhavis bonan ideon: li prenis paperon kaj krajonon, desegnis sur papero belan bovon kaj fungon kaj triumfe transdonis ĝin al kelnero. Kelnero rigardis desegnaĵon, tuj komprenis deziron de anglo kaj foriris por plenumi ĝin.

Sed dum longa tempo li ne revenis. Anglo atendis kaj atendis, lia stomako grumblis kaj li estis kolera kaj malfeliĉa. Fine venis kelnero, ŝvitante kaj peze spirante, kaj kun triumfa rideto sur vizaĝo li transdonis al anglo –ĉu bongustan bifstekon kun fungoj? tute ne!– bileton al bovbatalo kaj grandan pluvombrelon.

Anglo rigardis malfeliĉe bileton kaj pluvombrelon, ekkomprenis grandan valoron de internacia lingvo, kaj kiam li revenis hejmen al Anglujo, li tuj aĉetis al si Esperantan lernolibron.

## **15. Akuzativo**

**aŭ**

### **la arto ekstermi ratojn.**

Tiun ĉi arton mi lernis en Kiruna trans la polusa cirklo, kiam mi gvidis tie Esperantajn kursojn. La infanoj instruis ĝin al mi, kaj ĝi estas tre simpla kaj facila – per la **Esperanta akuzativo** aŭ «la

grava litero: N».

Certe vi komprenas la frazon

**La kato manĝas la rato.**

Sed mi ne komprenas ĝin! Ĉar ĝi ne montras, kiu manĝas, ĉu la kato aŭ la rato; kiu estas manĝata, ĉu la rato aŭ la kato. Tio nenion diras, ke ni komencas la frazon per la kato, ĉar en Esperanto la **vortordo estas libera** kaj ne influas la sencon de la frazo. La frazoj

**La kato estas besto.**

**Besto estas la kato.**

**Estas besto la kato.**

**La kato besto estas.**

**Besto la kato estas.**

**Estas la kato besto.**

estas tute samsencaj, kvankam ilia vortordo ne estas egala<sup>1</sup>.

Tial ankaŭ

**La kato manĝas la rato**

kaj

**La rato manĝas la kato**

devas havi egalan sencon. Tio fariĝas ebla per «la litero *n*», kiu montras **la celon de la ago**, al kiu aŭ kio la ago estas direktita.

Sekve:


**La kato manĝas la ratoN.**

**La ratoN manĝas la kato.**

Nun ni klare vidas, ke ili estas vere samsencaj, kvankam unu komenciĝas tie, kie la alia finiĝas. En ambaŭ frazoj la kato estas tiu, kiu manĝas, kaj la rato estas manĝata (dank' al Dio!). La kato plenumas la agon, dum la rato estas la celo, la objekto de tiu ago. Al la rato la ago estas direktita, kaj tion montras la litero *n*.

Ni signu tion per sagoj:

  
**La kato manĝas la ratoN.**

**La ratoN manĝas la kato.**  


En tiuj lingvoj, kie akuzativo ne ekzistas kaj kie la vortordo pro tio ne estas libera, la dua frazo (*la raton manĝas la kato*) devas esti

tradukata kun la sama vortordo kiel la unua (*la kato manĝas la raton*). Por tamen konservi la inversan vortordon, oni aŭ pasivigas la verbon (*la rato estas manĝata de la kato*) aŭ uzas ĉirkaŭskribon (*la rato estas tiu, kiun la kato manĝas*). Tio montras, kian simplecon, flekseblecon kaj klarecon de esprimoj la akuzativo ebligas kaj ke ĝi estas grava avantaĝo de Esperanto.

Por ke la manĝanto kaj manĝato interŝanĝu siajn rolojn, oni nur bezonas ŝanĝi la lokon de *n*:

**La katoN manĝas la rato.**

**La rato manĝas la katoN.**

Tiamaniere mi klarigis la akuzativon al la infanoj en Kiruna, kaj poste mi kontrolis, ĉu ili komprenas la aferon.

Ili respondis jene: «Se oni metas la literon *n* al la rato, tiam la kato manĝas kaj la rato estas manĝata; se oni metas ĝin al la kato, tiam la rato manĝas kaj la kato estas manĝata».

Se do vi volas ekstermi la ratojn en via domo, pendigu belan *n* sur ilia vosto, tiam la kato venos kaj formanĝos ilin ĉiujn. Sed ne faru eraron kaj ne metu *n* sur la voston de la kato, ĉar tiam la ratoj venos kaj formanĝos vian belan katon!

## 16. Subjekto kaj objekto.

Ĉiu vorto en la frazo havas sian specialan taskon, same kiel ĉiu parto de la aŭtomobilo. La ĉefan rolon ludas la verbo (motoro), ĉirkaŭ kiu grupiĝas la ceteraj partoj de la frazo – subjekto, objekto kaj aliaj. **Subjekto** estas estaĵo aŭ objekto, **kiu agas**, kiu faras tion, kion la verbo esprimas, la **objekto** (aŭ rekta komplemento) indikas tiun aŭ tion, kiu estas la celo de la ago, al kiu la ago estas direktita. Se ekz. kato manĝas raton, la kato estas la aganto (subjekto), dum la rato estas la celo (objekto) de la ago »manĝi«.

Atentu bone tiun ĉi gravan regulon:

Subjekto havas **neniam** la finaĵon *n*, dum objekto ĉiam havas ĝin.

**EKZEMPLOJ:** (subjekto **diklitere**, objekto *klinlitere*):  
**Knabo** batas *hundoN*. **Urso** ŝatas *mieloN*. **Leono** havas *fortajN dentojN*. **Ŝi** skribis *multajN leterojN*. **Mi** amas *ŝiN*. **Li** ne komprenas *tioN*.

La normala vortordo estas: **subjekto + verbo – objekto** (*Mi*

*amas vin*). Sed la ordo de la vortoj povas esti ankaŭ tute mala, kiel ni jam vidis (*la raton manĝas la kato*). Ĝuste en tiaj okazoj oni devas esti speciale atentema kaj nepre elserĉi la subjekton kaj objekton!

**EKZEMPLOJ:** (subjekto **diklitere**, objekto *klinlitere*):  
*ĈokoladoN* manĝas la **knabino** (= Tio estas ĉokolado, kion la knabino manĝas). *HundoN* batas la **knabo** (= Tio estas hundo, kiun la knabo batas). *Multajn leterojN ŝi* skribis hodiaŭ. *LiN* amas **ŝi**. *TioN mi* ne komprenas.

Tiel subjekto kiel objekto povas konsisti el nur unu vorto ('**Knabo** trinkas *akvon*') aŭ el tuta grupo da vortoj. **Ĉiuj** objektvortoj devas havi la finaĵon *n*, ne sole unu el ili: **Multaj diverslandaj esperantistoj** vizitis la *grandaN EsperantaN kongresoN* en Stockholm.

### TASKO 3.

(*Korektu tiujn ĉi frazojn, substreku la verbojn kaj signu la subjekton kaj objekton per sago – la pinto de la sago montru al la objekto, la vosto al la subjekto*):

Mia frato lernas Esperanto. La fraŭlino skribas letero. Ĉu vi konas ŝi? Ŝia patro havas du grandaj domoj. Kial vi ne salutis li? Ĉar mi ne vidis li. Kafo mi ne deziras, sed mi petas lakto. Kio diris la knabo? Tio ŝi neis. Mi tute ne kredas, kio ŝi diras. Prenu kraĵono kaj skribu mallonga rakonto! Mi li vidis, sed li mi ne vidis. Ĉu vi komprenis tio, kio mi diris?

---

<sup>1</sup> «*Estas la kato besto?*» ne impresas kiel demando. Ĉiuj demandoj devas komenciĝi per iu DEMANDA VORTO (kiu? kio? ĉu? k.t.p.), ĉe kio la vortordo ne ŝanĝiĝas. Do ne «*Estas la kato besto?*», sed **Ĉu** *la kato estas besto?*



# TRIA LEKIONO

## 17. Verbo kaj objekto.

Komparu la frazojn:

**Li tuŝis la muroN.**  
**Knabo portas seĝoN.**  
**Ŝi legas libroN.**

kaj

**Li staris la muron.**  
**Knabo sidas seĝon.**  
**Ŝi iras libron.**

Ni vidas, ke la tri unuaj frazoj estas bonaj, dum la tri lastaj estas «malsanaj». Kial? Ĉar la **verboj** *tuŝas*, *portas*, *legas* kaj *staras*, *sidas*, *iras* **ne estas egalaj**. La unuaj tri havas rektan objekton (akuzativ-objekton: *muron*, *seĝon*, *libron*), ĉar ili estas **transitivaj**; la aliaj tri ne povas havi rektan objekton, ĉar ili estas **netransitivaj**. La diferenco inter transitiva kaj netransitiva verbo estas tio, ke la ago de la transitiva verbo **celas** iun aŭ ion, **estas direktita** al iu aŭ io, ekz. *Patrino vekis Petron* (Petro estas la celo de la ago «vekigi»), sed la ago de la netransitiva verbo tian celon ne havas, ekz. *Petro vekigis*.

Ĉar la verboj *staras*, *sidas*, *iras* estas netransitivaj kaj ne povas havi rektan objekton, ni devas ŝanĝi tiujn frazojn: *Li staras ĉe la muro*. *Knabo sidas sur seĝo*. *Ŝi iras kun libro*. En ili mankas la akuzativa finaĵo *-n*, ĉar *ĉe la muro*, *sur seĝo* kaj *kun libro* ne estas rektaj objektoj.

## Kelkaj transitivaj verboj:

havas (monoN), trinkas (kafoN), manĝas (bananoN), skribas (leteroN), parolas (EsperantoN), aŭdas (muzikoN), aŭskultas (radioN), vidas (filmoN), rigardas (bildoN), komprenas (nenioN), k.t.p.

## Netransitivaj verboj:

estas, sidas, staras, kuŝas, iras, dormas, plaĉas, apartenas, ŝajnas, kreskas, vivas, loĝas, mortas, fartas, ploras, ridas, eraras, pluvus, neĝas, hajlas, degelas, brilas, k.t.p.

Nur malgranda parto de la verboj estas netransitiva, dum la plej multaj estas transitivaj. Atentu precipe tion, ke **havas** estas transitiva kaj havas sekve rektan objekton, dum **estas** estas netransitiva kaj **neniam** povas ĝin havi. Plue en bona Esperanto oni diras **ne** «*apartenas min, plaĉas ŝin, ŝajnis ilin*», sed *apartenas al mi, plaĉas al ŝi, ŝajnis al ili*.

En kelkaj **maloftaj** okazoj oni tamen povas uzi rektan objekton ankaŭ kun netransitivaj verboj, nome kiam la verbo kaj objekto estas formitaj el la sama radiko aŭ estas sence parencaj: *Ĉiu iru sian vojon. Tiel li vivis sian tutan vivon. Li mortis gloran morton. Ŝi ploris krokodilajn larmojn.*

### Resumo.

La rekta objekto de la transitivaj verboj havas la finaĵon *-n*. La subjekto havas ĝin **neniam**. La prepozicioj (*al, kun, pri* k.t.p.) regas ĉiam nominativon.

## 18. Adjektivo.

La adjektivo staras kutime antaŭ la substantivo, kiu ĝi rilatas (*bona patro*), sed en esceptaj okazoj povas stari ankaŭ post ĝi (*patrino kara, lingvo internacia*) precipe en poezia stilo kaj kiam oni volas apartigi du adjektivojn (*la bela lingvo itala*). La adjektivo devas kaze (nominativo kaj akuzativo) kaj nombre (ununombro kaj multnombro) akordi kun sia substantivo: *BonaJ patroj. Mi vidis interesaN filmoN. Aĉetu freŝaJN pomoJN!*

Anstataŭ *ruĝa domo kaj verda domo*, kie la vorto *domo* ripetiĝas, oni povas pli mallonge diri *ruĝa kaj verda domoj*. *DomoJ*, ĉar temas ja pri du domoj, el kiuj unu estas ruĝa, la alia estas verda. La frazon *ruĝa kaj verda domo* oni povus kompreni tiel, ke temas pri unu sola domo, kiu estas samtempe kaj ruĝa kaj verda (dukolora). *Ruĝa kaj verdaJ domoJ* signifas: unu ruĝa domo kaj kelkaj verdaj domoj.

Same oni povas anstataŭ *acida lakto kaj acida kremo* diri pli mallonge *acidaJ lakto kaj kremo*, por eviti ripetiĝon de la vorto *acida*. La multnombra *acidaJ* rilatas samtempe kaj al lakto kaj al kremo. La esprimo *acida lakto kaj kremo* povus esti komprenata tiel, ke nur la lakto estas acida, ne la kremo.

### 19. *La ĉambro estas varma.*

En la frazoj *La ĉambro estas varma* kaj *La patro estas bona* la adjektivoj (*varma*, *bona*) rilatas samtempe al la subjekto (*ĉambro*, *patro*) kaj verbo (*estas*). Tia adjektivo havas ĉiam la saman nombron kiel la substantivo, al kiu ĝi rilatas: *La ĉambro estas varma*. *La ĉambroJ estas varmaJ*. Sed **neniam** ĝi povas havi la finaĵon *-n*, ĉar ĝi ne estas objekto!

Atentu la diferencon inter la frazoj: *Ŝiaj lipoj estas ruĝaj* kaj: *La koloro de ŝiaj lipoj estas ruĝa*. En la unua okazo la multnombra *ruĝaJ* rilatas al *lipoj*, sed en la dua okazo la ununombra *ruĝa* rilatas al *koloro*.

### 20. *La kato estas besto.*

En la sama maniero estas uzataj ankaŭ substantivoj: en la frazo: *La kato estas besto* la vorto *besto* rilatas samtempe al la subjekto (*kato*) kaj verbo (*estas*). Ankaŭ tia substantivo devas nombre akordi kun la subjekto (*Oslo estas urbo*. *Ili estas lernantoJ*), sed neniam povas havi akuzativan finaĵon. La netransitiva verbo *esti* entute ne povas havi rektan objekton. Oni povas ĝin image anstataŭigi per signo de egaleco (=), kaj kompreneble la komponentoj ambaŭflanke de tiu signo devas esti egalaj.

Kiam tia substantivo aŭ adjektivo post *estas* rilatas al **kelkaj** subjektoj, ĝi estas multnombra, kvankam la subjektoj mem estas ununombraj: *Londono kaj Parizo estas urboJ*. *Tablo kaj seĝo estas mebloJ*. *Rozo kaj lilio estas floroJ*. *La libro kaj krajono estas flavaJ*. *Elefanto kaj leono estas fortaJ*. Same: *La koloroJ de la domoJ estas ruĝa kaj verda*. Temas ja pri **du** koloroj, el kiuj unu estas ruĝa, la alia estas verda.

### 21. *Estas kaj havas.*

Komparu la frazojn *Tio estas mia kato* kaj *Mi havas katoN*. En

ambaŭ troviĝas la vorto *kato*, sed ĝi ne havas en ili la saman rolon. En *Mi havas katon* la vorto *kato*N estas objekto de la transitiva verbo *havas*, kaj tial havas la finaĵon *-n*. Sed en *Tio estas mia kato* la vorto *kato* rilatas samtempe al la subjektoj *tio* kaj la netransitiva verbo *estas* kaj ne povas havi la finaĵon *-n*, ĉar ĝi ne estas objekto.

**EKZEMPLOJ:** *Mi havas frato*N. *Karlo estas mia frato*. *La ĉambro havas kvar fenestroj*N. *La fenestroj de la ĉambro estas grandaj*. *Jen estas mia skribmaŝino!* Ĉu vi havas skribmaŝinoN? *Svedlando havas bela*N *ĉefurbo*N. *Stockholm estas la sveda ĉefurbo*.

## 22. Miaj gepatroj.

Miaj gepatroj estas maljunaj kaj kadukaj. Jam antaŭ multaj jaroj mi forlasis ilin kaj la patrodomon (= patran domon, domon de la patro), kiu estas al ĉiu homo la plej kara loko sur la tero. Depost tiu tago mi tre malofte vidis ilin. Sed ofte miaj pensoj migras al ili, precipe en kristnaska vespero. Miaj okuloj pleniĝas per larmoj, kian mi pensas pri la karaj gemaljunuloj, kiuj sian tutan vivon dediĉis al la filoj kaj nun solaj malĝojas en la malplena nesto.

Miaj patro kaj patrino loĝas en Nordurbo. Tio estas malgranda, sed tre bela urbeto ĉe la Balta Maro. En Nordurbo estas multaj belaj somerdomoj, ĉar ĝi estas populara somerloko. Sed miaj gepatroj ne havas vilaon: ili estas malriĉaj kaj loĝas en malnova dometo ĉe la arbarrando (= rando de arbaro, arbara rando).

La patro estas ŝuisto kaj la patrino estas kudristino, aŭ pli ĝuste ili estis tiuj, ĉar pro la maljuneco ili ne kapablas plu labori kaj vivas nur el la malmulto, kiun la filoj sendas al ili ĉiumonate. Kaj el la espero ricevi maloftan leteron de siaj «infanoj» kaj eble ankaŭ revidi ilin. Sed la «infanoj» estas jam delonge plenkreskaj, havas siajn proprajn familiojn, al kiuj ili devas dediĉi sian tutan atenton kaj laborpovon.

La amplenaj, sulkaj (= sulkoplenaj) vizaĝoj de la karaj gemaljunuloj restos ĉiam en mia memoro.

## TASKO 4.

*(Korektu la erarojn en tiu ĉi rakonto, substreku la transitivajn kaj ĉirkaŭstreku la netransitivajn verbojn):*

## **Ĉu la negroj havas nigraj larmoj?**

Petro estas inteligenta knabo. En la lernejo li lernas ankaŭ Esperanto kaj ofte li skribas leteroj en tiu lingvo al infanoj en fremdaj landoj. Kaj kiam li ricevas longa respondo, li estas tre feliĉa.

Foje li ricevis longa letero de sia nigra amiko el Afriko. Li malfermis la letero kaj trovis sur ĝi kelkaj nigraj inkmakuloj. Petro iris al sia patrino, montris al ŝi la makuloj kaj diris: «Panjo, mia nigra amiko estas tre malfeliĉa, ĉar li ploris, kiam li skribis tiu ĉi letero al mi. Jen, sur la letero estas liaj larmoj!»

# KVARA LEKIONO

## 23. La konsisto de la vortoj.

La vorto *maljunulo* konsistas el 4 partoj: *mal, jun, ul, o*. La plej grava el ili, sen kiu la vorto ne estas ebla, estas *jun*. Ĝi estas la **radiko**.

Antaŭ la radiko estas *mal-*. Ĝi estas **prefikso**. La aliaj prefiksoj: *bo-, dis-, ek-, eks-, ge-, mis-, pra-, re-, fi-*.

Post la radiko estas *-ul-*. Ĝi estas **sufikso**. La aliaj sufiksoj: *-aĉ-, -ad-, -aĵ-, -an-, -ar-, -ebl-, -ec-, -eg-, -em-, -estr-, -et-, -id-, -ig-, -iĝ-, -il-, -in-, -ind-, -ing-, -ism-, -ist-, -obl-, -on-, -op-, -uj-, -um-, -ĉj-, -nj-*.

La prefiksoj kaj sufiksoj nomiĝas per komuna nomo **afiksoj** kaj ludas tre gravan rolon, ĉar per ili oni povas **deveniĝi** aŭ **derivi** senliman nombron da novaj vortoj kun memstara signifo. Tio nomiĝas **derivado**.

En la fino de la vorto *maljunulo* troviĝas la litero *o*. Ĝi estas **gramatika finaĵo**. Nur la substantivoj (*-o*), adjektivoj (*-a*), verboj (*-as, -is, -os, -us, -i, -u*) kaj derivitaj adverboj (*-e*) havas specialan gramatikan finaĵon, sen kiu ili ne estas uzeblaj. La ceteraj vortoj (pronomoj, numeraloj, originaj adverboj, prepozicioj, konjunkcioj kaj interjekcioj) gramatikan finaĵon ne havas kaj estas uzataj kiel puraj radikoj.

## TASKO 5.

(Dispartigu la subajn vortojn je prefiksoj, radikoj, sufiksoj kaj gramatikaj finaĵoj kaj traduku ilin al via gepatra lingvo):

patro, patrino, gefratoj, bofilino, meblisto, tranĉilo, bonega, laborema, laŭdinda, malboneco, malgrandigi, trinkaĵo,

manĝebla, arbareto, geurbanoj, plumingo, knabaĉo, diskuri, ekiras, revenu, dispartigis, komprenebleco, hundidino, malsanulejo, kuŝemulo.

## 24. La karaktero de la radikoj.

Ekzistas teorio, ke tiuj radikoj, kiuj ne estas uzeblaj sen gramatika finaĵo (ekz. *cigar*, *jun*, *skrib*) per si mem estas nek substantivoj, nek adjektivoj, nek verboj, sed fariĝas tiuj nur post almeto de koncerna finaĵo. Kiam ni almetas al ili la finaĵon *-o*, ili fariĝas substantivoj (*cigaro*, *juno*, *skribo*), kun *-a* ili estas adjektivoj (*cigara*, *juna*, *skriba*), kun *-e* adverboj (*cigare*, *june*, *skribe*) kaj kun verba finaĵo ili fariĝas verboj.

Sed tiu ĉi teorio apartigus Esperanton de ĉiuj aliaj lingvoj, kie ĉiu radiko havas certan karakteron, kaj pro tio senbezzone malfaciligus ĝian lernadon kaj uzadon. Ĝi kontraŭas ankaŭ nian lingvo-senton: aŭdante aŭ vidante la radikon *cigar*, ni ne pensas pri kvalito, ago aŭ maniero, sed antaŭ niaj okuloj klare prezentiĝas konkreta objekto; la radiko *jun* elvokas en ni tuj klaran imagon pri certa kvalito kaj *skrib* impresas nin sendube kiel ago.

Kaj laste – ankaŭ la praktika lingvo-uzo, precipe la derivado, kontraŭas tiun ĉi hipotezon: la substantivaj kaj adjektivaj radikoj estas nur malofte uzeblaj kun verba finaĵo, kaj ni havas afiksojn, kiuj povas esti uzataj nur kun substantivoj (*bo-*, *ge-*, *eks-*, *-ano*, *-ĉjo*, *-njo*, *-estro*, *-ido*, *-ino*, *-aro*, *-ero*, *-ingo*, *-ujo*), nur kun verboj (*dis-*, *mis-*, *ek-*, *re-*, *-ado*, *-ilo*, *-ema*, *-ebla*, *-inda*) aŭ kun adjektivoj (*-eco*, *-ulo*).

## 25. *Patro, patra, patre.*

Per simpla interŝanĝo de gramatika finaĵo oni povas transporti la vortojn el unu vortklaso en alian, kiel okazas ankaŭ en la naciaj lingvoj, kvankam ne tiel regule kiel en Esperanto. Tiamaniere oni povas el ĉiu substantivo devenigi adjektivojn (per la finaĵo *-a*) kaj adverbojn (*-e*): *patro* – *patra* – *patre*; *homo* – *homa* – *home*; *knabo* – *knaba* – *knabe*; *letero* – *letera* – *letere*; *ŝipo* – *ŝipa* – *ŝipe*; *buŝo* – *buŝa* – *buŝe*; *maŝino* – *maŝina* – *maŝine*; *telegrafo* – *telegrafa* – *telegrafe*, k.t.p.

## 26. Ekzerco.

En la patra domo (= domo de la patro) mi pasigis miajn plej feliĉajn jarojn. En la instruisto Ernesto trovis vere patran amikon (= amikon, egalan al patro). La instruisto zorgis patre (= en patra maniero, kiel patro) pri Ernesto. Dum longa tempo ili staris antaŭ la doma pordo (= pordo de la domo). Hunda bojado (= bojado de hundo aŭ hundoj) aŭdiĝis tra la vilaĝo. Li estas hunde fidela (= fidela kiel hundo) al sia edzino. Inka makulo (= makulo de inko) estas sur la papero. Ĉu vi skribis la leteron inke (= per inko) aŭ krajone (= per krajono)? La aŭtomobila veturo (= veturo per aŭtomobilo) estis tre laciga. Ni veturis aŭtomobile (= per aŭtomobilo) de Tallinn al Riga. Jen estas via hejma tasko (= tasko por la hejmo)! Dum la tuta tago ŝi sidis hejme (= en la hejmo) kaj laboris. Ĉu vi apartenas al iu Esperanta klubo (= klubo de Esperanto)? Ni parolas Esperante (= en Esperanto).

## 27. Kunmetitaj vortoj.

Kunmetitaj vortoj estas formataj per simpla kunmetado de radikoj, ĉe kio la ĉefa vorto lokiĝas en la fino. Kunmetante la radikojn *benk* kaj *ped*, ni ricevas la kunmetaĵojn *benkpedo* kaj *pedbenko*, kiuj kompreneble tute ne estas egalaj. *Benkpedo* signifas: piedo, kiu estas karakterizata per benko, kiu apartenas al benko (= benka piedo aŭ piedo de benko). Sed *pedbenko* signifas: benko, kiu estas karakterizata per piedo, kiu estas difinita por piedoj (= pieda benko aŭ benko por piedoj).

Por eviti malĝustajn kaj miskomprenigajn kunmetaĵojn, oni devas do bone atenti, ke la ĉefa vorto troviĝu ĉiam en la fino de la kunmetaĵo. Okaze de dubo analizu la vortojn, apartigante la radikojn kaj provizante ilin per la finaĵoj, kiuj estas necesaj por kompreni la esprimon. Tiam vi tuj vidas, kiu vorto estas la ĉefa kaj kiu estas akcesora. Se vi ne povas elekti ekz. inter *foliarbo* kaj *arbofolio*, dispartigu ilin ambaŭ kaj la rezultato estos: *foliarbo* = folia arbo, arbo kun folioj; *arbofolio* = arba folio, folio de arbo.

**EKZEMPLOJ:** dompordo = doma pordo, pordo de domo; cigarstumpo = cigara stumpo, stumpo de cigaro; fabriklaboristo = fabrika laboristo, laboristo de fabriko; stratangulo = strata angulo, angulo de strato; skribmaŝino – skriba maŝino, maŝino por skribi; vetkuri = vete kuri; finlegi = legi ĝis fino; homplena = plena de homoj; altkreska = de alta kresko; grizhara = kun



grizaj haroj; nudpieda = kun nudaj piedoj; frumatene = frue matene; bonvolu = bone volu; sukerpeco = sukera peco, peco de (da) sukero; pecsukero = peca sukero; hejmlando = hejma lando, lando de la hejmo.

Ĉe kunmeto de certaj radikoj povas amasiĝi tro multaj konsonantoj, kiujn estas malfacile aŭ preskaŭ neeble eldiri: *ĉambrpordo, tondrkrako, nigrhara*. En tia okazo oni enŝovas taŭgan gramatikan finaĵon: *ĉambrOpordo, tondrOkrado, vitrOpordo, manĝOtablo, dormOĉambro, fenestrOkadro, nigrAhara, neĝEblanka, pafiIpreta*. Sed tian helpvokalon uzu nur ĉe vera bezono kaj forlasu ĝin, kiam ĝi ne estas necesa. Do ne diru *domOpordo, buterOpano, matenOmanĝo*, sed pli simple kaj mallonge *dompordo, buterpano, matenmanĝo*. Same *longtempe* kaj *kelkfoje* estas pli bonaj ol *longAtempe* kaj *kelkAfoje*.

Kelkfoje la kunmetitaj vortoj fariĝas tro longaj (*fervojkonduktoro, parlamentprezidanto, redakcisekretario*), malfacile kompreneblaj (*monujenhavo*) aŭ eĉ miskomprenigaj (*altondo, ĉevale*). En tia okazo estas bone apartigi la radikojn per streketo aŭ – ankoraŭ pli bone – skribi ilin aparte: *fervoj-konduktoro* aŭ *fervoja konduktoro, parlament-prezidanto* aŭ *parlamenta prezidanto, redakcia sekretario, monuj-enhavo* aŭ *enhavo de (la) monujo, alt-ondo* aŭ *alta ondo* (*altondo* = al-tondo); *ĉe-vale* aŭ *ĉe la valo* (*ĉevale* signifas: kiel ĉevalo!). Same *vitra pordo* estas pli bona ol *vitropordo, urba biblioteko* estas pli bona ol *urb(o)biblioteko, printempa vetero* estas pli bona ol *printempvetero*, k.t.p. Entute evitu uzi tro multajn kunmetaĵojn kaj preferu simplajn vortojn, per kio la stilo fariĝas pli malpeza, gracia kaj facile komprenebla.

La kunmetaĵoj *meznokto, mezsomero, centjaro, miljaro* kaj *piednuda*, kiujn oni kelkfoje renkontas, ne estas regulaj. Devus esti: *noktomezo* (= nokta mezo, mezo de la nokto), *somermezo* (= somera mezo, mezo de somero), *jarcento* (= jara cento, cento da jaroj), *jarmilo* (= jara milo, milo da jaroj), *nudpieda* (= kun nudaj piedoj).

Kelkfoje kunmetitaj vortoj havas tute specialan, propran sencon, kiu ne estas egala al la analizaj formoj: ne ĉiu urba domo aŭ domo de urbo (= domo, kiu troviĝas en urbo aŭ apartenas al urbo) estas *urb(o)domo*; Finnlando estas sendube parto de la mondo, sed tute ne *mondparto* (= kontinento); liberan tempon oni havas ja ĉiam, kiam oni ne estas okupita per io, sed *libertempon* oni ricevas nur unu

fojon jare; k.t.p.

## TASKO 6.

*(Kunmetu la diklitere presitajn esprimojn!)*

Kutime **fera vojo** estas pli rekta ol **landa vojo**. La nomoj de la kvin **partoj de la mondo** estas: Eŭropo, Ameriko, Azio, Afriko kaj Aŭstralio. La hundo estas besto **kun kvar piedoj**. Mia patrino kudras per **kudra maŝino**. Mia frato donacis al mi por **la tago de mia naskiĝo** belan **tranĉilon de papero**. Ĉu vi ŝatas **kapti fiŝojn**? Unu **parto de la urbo** en Tallinn estas nomata Vosto de Kato. **La tago de mia nomo** estas la 19-an de januaro. **La anoj de la nordaj landoj** estas kutime **kun blondaj haroj** sed multaj el ili estas ankaŭ **kun brunaj haroj** kaj eĉ **kun nigraj haroj**. Ĉe la **strata angulo** estas **vendejo de tabako**.

# KVINA LEKCIONO

## 28. Estas varme.

Kiam el la frazo *La vetero estas varma*, kie la vorto *varma* samtempe rilatas al la subjekto (*vetero*) kaj al la verbo (*estas*), oni forigas la subjekton, la rolo de la vorto *varma* fariĝas alia, kaj ĝi ekhavas ankaŭ alian finaĵon: *Estas varmE*. Tiu ĉi ŝanĝo okazas pro tio, ke nun la vorto *varma* rilatas nur al la verbo, ĉar subjekto mankas, kaj **adjektivo ne povas rilati al verbo**. Tial oni devas la adjektivon adverbigi. En kelkaj lingvoj oni uzas en tia okazo «formalan subjekton» (*il est chaud* france, *es ist warm* germane, *det är varmt* svede), sed io simila en Esperanto ne estas ebla.

**EKZEMPLOJ:** Tio estas bonA. Estas bonE. BonE. La libro estas interesA. Estas interesE. InteresE. La ĉambro estas varmA. Tie ĉi estas varmE (*tie ĉi estas ne subjekto, sed montras lokon*).

**Rimarko:** Oni ne povas diri *Tio estas bone* sed oni devas elekti inter *Tio estas bonA* kaj: *Estas bonE*.

## 29. Adverbo.

Same estas pri la frazoj: *Ŝia kanto estas bela* kaj: *Ŝi kantas bele*. En la unua frazo *bela* rilatas samtempe al la verbo kaj subjekto, en la dua *bele* rilatas nur al la verbo. Tial ne: *Ŝi kantas bela*, sed: *Ŝi kantas beE*. La diferenco inter adjektivo kaj adverbo estas do tio, ke adjektivo povas rilati nur al substantivo (aŭ al substantivo kaj verbo samtempe), dum adverbo rilatas al verbo, kion aludas ankaŭ ĝia nomo (latine *ad + verbum = al + verbo*).

La adverboj respondas al la demando: kiel?

**EKZEMPLOJ:** La aeroplano flugas rapide kaj alte. La flugo de la aeroplano estas rapida kaj alta. La infano dormas profunde.

La dormo de la infanoj estas profunda. La junulo parolis ĝentile. La parolo de la junulo estis ĝentila. Ne parolu tiel (aŭ tiom) laŭte! Via parolo estas tro laŭta.

Krom al verbo, adverbo povas rilati ankaŭ al adjektivo aŭ al alia adverbo: *Antaŭ kelkaj semajnoj ŝi estis gravE malsana. Pro la sorto de sia edzo ŝi estis profundE malfeliĉa. Tio estas tutE bona! Mia onklino estas mortE malsana. Jan Kiepura kantas eksterordinarE bele. Vi faris vian taskon laŭdinde bone. TutE vere, respondis la viro.*

## TASKO 7.

*(Bonvolu aldoni la mankantajn finaĵojn!)*

Antaŭ kelkaj tagoj mi fartis malbon\_, ĉar mi estis malsan\_, sed nun mi fartas denov\_ boneg\_. Parolu ĉiam laŭt\_, kuraĝ\_, kaj elegant\_! Estas tre agrabl\_, kiam dum vintro en la ĉambro estas varm\_. Ho, kiel bel\_ estas tie ĉi! Rajdi sur leono estas danĝer\_. Estas bon\_, ke vi venis. Jen mallong\_ lia historio: li naskiĝis, suferis kaj mortis. Li mortis subit\_. Bel\_ kanto ne estas long\_, diras prav\_ la estonoj. La italoj parolas ital\_ kaj la hispanoj parolas hispan\_. Esperanto estas bel\_ kiam oni ĝin bel\_ parolas. Bon\_ ridas tiu, kiu last\_ ridas. Tion ni scias bon\_! Ho, kiel bon\_ vi estas! Ne estas grav\_!

## AKTIVAJ PARTICIPOJ

### 30. -anto, -into, -onto.

La esprimo *tiu, kiu dormas* estas tro longa kaj nepraktika. Tial ni diras pli simple *dormanto* (= dorm+anto).

ManĝAnto = tiu, kiu manĝas.

PromenAnto = tiu, kiu promenas.

SkribAnto = tiu, kiu skribas.

ParolAnto = tiu, kiu parolas.

*Dormanto* estas do persono, kiu kuŝas en la lito kaj ronkas. *Manĝanto* sidas ĉe la tablo kaj enbuŝigas manĝaĵon. *Promenanto* moviĝas malrapide en parko aŭ sur strato. *Skribanto* kondukas plumon aŭ krajonon sur papero.

La finaĵo de la participo estas *-ant-* (dorm + ant + o), en kiu ni

rekonas la vokalon de la estanta tempo de la verboj (*a: dormAs, skribAs*). Sekve tiuj ĉi participoj rilatas al la estanta tempo.

Sed ĉar la verboj havas ankaŭ pasintan kaj venontan tempon, ekzistas kompreneble ankaŭ koncernaj participoj, formataj per interŝanĝo de la preparolita *-a-* per *-i-* (*dormIs, skribIs*) aŭ *-o-* (*dormOs, skribOs*).

### **Pasinta tempo:**

DormInto = tiu, kiu dormis.

ManĝInto = tiu, kiu manĝis.

PromenInto = tiu, kiu promenis.

ParolInto = tiu, kiu parolis.

Dorminto estas persono, kiu jam vekigis. Manĝinto estas sata kaj kontenta, dum promeninto estas laca kaj malsata. Parolinto jam finis sian paroladon kaj aŭskultas nun la aliajn parolantojn.

### **Venonta tempo:**

DormOnto = tiu, kiu dormos.

VojaĝOnto = tiu, kiu vojaĝos.

MortOnto = tiu, kiu mortos.

Dormonto estas persono, kiu oscedas kaj preparas sin por enlitiĝo. Vojaĝonto pakas siajn valizojn, pripensas la vojaĝplanon kaj provizas sin per la necesa mono. Mortonto estas senespere malsana, povas kiam ajn atendi la morton kaj skribas sian testamenton, dum la mortanto agonias kaj la mortinto jam estas malvarma aŭ kuŝas en la tombo.

**Rimarko 1:** Ĉar *sidanto, amanto* k.t.p. jam per si mem indikas personon, la personiga sufikso *-ulo* estas en ili superflua. Tial neniam «*sidantulo, lernantulino*», sed simple *sidanto, lernantino*.

**Rimarko 2:** Same kiel *venanto* kaj *irinto*, ankaŭ *pasinto, estanto* kaj *estonto* indikas personon, ne tempon, kvankam ili estas uzataj ankaŭ en la lasta signifo. Pli ĝustaj estas la formoj *pasinta, estanta, estonta (venonta) tempo*, aŭ pli mallonge *pasinteco, estanteco, estonteco*. Sed ĉar tiuj formoj estas iom pezaj, preferindaj estas *pasinto, estanto, venonto* – miskompreno ja ne povas okazi.

**Rimarko 3:** La diferenco inter *tradukanto* kaj *tradukisto* estas tio, ke *tradukanto* okupas sin nur okaze ĝuste nun pri tradukado, dum *tradukisto* estas profesiulo. Same granda estas la diferenco

inter *skribanto* kaj *skribisto*, *verkanto* kaj *verkisto* k.t.p. Estas do eraro diri «*la verkisto de la libro*», ĉar tio signifus, ke lia profesio estis verki tiun unu solan libron! Ĝusta estas: *la verkinto* (= tiu, kiu verkis) *de la libro*.

**Rimarko 4:** Ĉar *lernanto*, *petinto* k.t.p. estas substantivoj, ili ne povas havi akuzativ-objekton. Do ne «*lernanto Esperanton*, *petinto monon*», sed: *lernanto de Esperanto*, *petinto de* (aŭ *pri*) *mono*, *kredanto je Dio*; k. t. p.

### 31. -anta, -inta, -onta.

Anstataŭigante la substantivan finaĵon -o per la adjektiva -a ni ekhavas adjektivajn participojn, kiuj estas egalaj al la ordinaraj adjektivoj (*granda*, *bela*, *varma*): *grandA hundo*, *dormantA hundo* (= hundo, kiu dormas); *mortintaJ katoJ* (= katoj, kiuj mortis); *venonta tempo* (= tempo, kiu venos), k.t.p.

Same kiel la ordinaraj adjektivoj, ankaŭ la participoj devas kaze kaj nombre akordi kun sia ĉefvorto: *Pasinta somero estis tre varma*. *La falintaJ pomoJ kuŝas sur la tero*. *Ne timu bojantaJN hundoJN*, ĉar ili ne mordas.

## KUNMETITAJ TEMPOJ DE LA VERBO

### 32. estas -inta.

La frazo *La kato estas malsana* (kiA? – malsana) estas laŭ la formo plene egala al *La kato estas mortinta* (kiA – mortinta). Sekve la vorto *mortinta* indikas staton de la kato, dum en la frazo: *La kato mortis* la vorto *mortis* indikas agon. Tio estas la ĉefa diferenco inter la simplaj kaj kunmetitaj tempoj de la verbo.

Komparu la frazojn *Mi skribis leteron* kaj *Mi estas skribinta leteron*. La unua, kun la simpla verbo, ne montras, ke mi **finis** la leteron, dum la dua, kun la participo, faras tion. Sekve *estas -inta* indikas finitan agon (**perfekton**), dum *-is* povas esprimi ankaŭ nefinitan, **interrompitan** agon (**imperfekton**). Sed ĉar la participaj formoj estas iom pezaj, oni kutime evitas ilin kaj uzas simplajn formojn ankaŭ ĉe finita ago, kiam danĝero por miskompreno ne ekzistas.

Krome atentu, ke la simplaj verbformoj (*venis*, *manĝis*) povas kune kun iu preciziga komplemento (*hieraaŭ*, *antaŭ unu horo*, *ĵus*

k.t.p.) esprimi ankaŭ la **tempon** de la ago, dum *estas -inta* nur ĝenerale konstatas, ke la ago **jam** okazis (kiam, tio ne gravas).

Krom *estas -inta* troviĝas kompreneble ankaŭ la formoj *estis -inta* kaj *estos -inta*, kies diferenco estas esprimata per la finaĵoj de la verbo *esti*: *EstAs skribinta* signifas, ke nun, kiam ni priparolas tion, la ago jam okazis kaj estas finita; *estIs skribinta* – jam **antaŭ** certa tempo la ago estis finita; *estos skribinta* – la ago estos finita **post** certa tempo.

Ni revenu al la kato:

*La kato estas mortinta* – nun la kato ne vivas plu.

*Jam hieraŭ la kato estis mortinta* – jam hieraŭ ĝi ne vivis plu.

*Morgaŭ la kato estos mortinta* – nun ĝi ankoraŭ vivas, sed morgaŭ ĝi ne vivos plu.

*Havi* ne estas helpverbo en Esperanto kaj ĝi ne estas uzebla por formado de kunmetitaj tempoj. Sekve neniam «*havas skribinta*» aŭ io simila! *Havi* enhavas ĉiam la ideon de posedo, aparteno (*mi havas bildon* – mi posedas bildon, la bildo apartenas al mi). Same nebla kiel «*mi havas malsana*» estas ankaŭ «*mi havas skribinta*»!

## EKZERCO

Mia onklino estas tre malsana, kaj la kuracisto estas jam perdinta ĉian esperon pri ŝia resaniĝo. Ankoraŭ ŝi ne estas mortinta, kvankam jam hieraŭ vespere ni forte timis, ke eble matene ŝi estos mortinta. Oni diras, ke jam antaŭ kelkaj semajnoj ŝi estis farinta sian testamenton, ĉar ŝi estis aludinta tion al mia patrino.

### 33. *estas -anta*.

La diferenco inter *mi manĝas* kaj *mi estas manĝanta* estas tio, ke la unua esprimas agon, la dua – staton. *Kia mi estas? Manĝanta*. Samtempe la partecipa formo forte precizigas la tempon, enhavante la ideon «ĝuste nun». En la sama maniero diferencas inter si *manĝis* kaj *estis manĝanta*, *manĝos* kaj *estos manĝanta*.

## EKZERCO

Mi estis ĝuste manĝanta, kiam venis mia bona amiko. «Ho, ĉiam vi estas manĝanta, kiam mi vin vizitas!» li diris ŝerce. «Sed la venontan fojon mi venos je alia tempo, kaj tiam vi certe

ne estos manĝanta. Pardonu do, ke mi ĉiam malhelpas vian tagmanĝon!»

### 34. *estas -onta.*

Kompreneble ankaŭ *li fumos* kaj *li estas fumonta* ne havas la saman sencon. *Li fumos* povas rilati al iu ajn tempo de estonteco, sed *li estas fumonta* enhavas la ideon «**tuj**». La ceteraj formoj: *hieraŭ li estis fumonta* (= estis preta por fumi), *morgaŭ li estos fumonta* (= estos preta por fumi).

### EKZERCO

Tiu domaĉo, kiun vi tie vidas kaj kiu estas tute disfalonta, estis en la sama stato jam antaŭ tridek jaroj. Jam tiam ĝi estis disfalonta, kiam mi estis malgranda knabo, kaj eble ĝi estos en la sama stato ankoraŭ post dudek jaroj kaj eĉ tiam ankoraŭ estos disfalonta, sed ne disfalinta.

### 35. Prefikso: *mal-*,

kiu estas uzebla kun ĉiaj radikoj (kiam nur permesas la senco) kaj ne influas ilian karakteron (el adjektivoj ĝi devenigas adjektivojn, el verboj – verbojn, k.t.p.), esprimas rektan malon, kontraŭon: *bona – malbona; ami – malami; frue – malfrue; antaŭ – malantaŭ; paco – malpaco*. *Mal-* estas la plej produktiva kaj ofte uzata afikso, kiu grave faciligas la lernadon kaj uzadon de la lingvo.

Atentu, ke *mal-* per si mem ne enhavas la ideon «malbona», kiel la respektivaj prefiksoj de naciaj lingvoj: *malvarma* ne signifas «malbone varma» aŭ «malmulte varma», sed estas simple rekta kontraŭo de varma.

### 36. *-et- kaj -eg-*,

kiuj estas rektaj maloj unu al la alia (*-et-* malgrandigas, *-eg-* grandigas), estas ankaŭ uzeblaj kun ĉiaj radikoj, ne influante ilian karakteron: *urbeto* (= tre malgranda urbo) – *urbego* (= tre granda urbo); *varmeta – varmega; beleta – belega; rideti – ridegi; treege; iomete* (= tre malmulte).

*-et-* enhavas ankaŭ la karesan nuancon: *patrineto, mia kara patrineto; frateto, hundeto, ĉevaleto* k.t.p.



-eg- estas komparebla kun *tre*, sed esprimas ankoraŭ pli fortan grandigon: *tre granda* – *grandega*; *tre varma* – *varmega*.

Jen la diversaj gradoj de la vorto varma:

varmega  
tre varma  
varmeta  
varma

malvarmeta  
malvarma  
tre malvarma  
malvarmega

# SESA LEClONO

## 37. Skemo pri la kunmetitaj tempoj de la verbo.

Ni diru, ke mi trinkas kafon ĉiutage je la 8-a matene. Sekve:

*Ĉiutage je la 7-a mi estAs trinkOnta kafon  
je la 8-a mi estAs trinkAnta kafon  
je la 9-a mi estAs trinkInta kafon*

*Hieraŭ je la 7-a mi estIs trinkOnta kafon  
je la 8-a mi estIs trinkAnta kafon  
je la 9-a mi estIs trinkInta kafon*

*Morgaŭ je la 7-a mi estOs trinkOnta kafon  
je la 8-a mi estOs trinkAnta kafon  
je la 9-a mi estOs trinkInta kafon*

Faru tian tabelon ankaŭ en via gepatra lingvo!

## 38. Mallongigado de frazoj.

Dum la kunmetitaj verbformoj kiel tro pezaj estas malofte uzataj kaj kutime anstataŭigataj per simplaj verboj, la participoj estas tamen tre praktikaj kaj utilaj, kiam ili servas por mallongigi frazojn kaj esprimojn:

*La knabo, kiu staras tie, ploras = La knabo, staranta tie, ploras.  
La viro, kiu venis hieraŭ, estas mia frato = La viro, veninta hieraŭ,  
estas mia frato. La aŭtomobilo, kiu veturos al Praha, staras ankoraŭ en la garaĝo = La aŭtomobilo, veturonta al Praha, staras ankoraŭ en la garaĝo. Ĉu vi vidis la motorbiciklon, kiu pasis tie ĉi antaŭ unu horo? = Ĉu vi vidis la motorbicikloN, pasintaN tie ĉi antaŭ unu horo? Oni devas savi homon, kiu dronas = Oni devas savi dronantaN homoN (aŭ: homoN dronantaN). Jen estas la viro, kiu helpos min = Jen estas la viro, helponta min (aŭ: min helponta).*

Sed atentu bone, ke ne estas eble mallongigi frazojn de tipo: *Jen estas la viro, kiuN mi helpos* (kuiN estas akuzativ-objekto!). Tia frazo devas resti senŝanĝa, ĉar komplementa frazo povas esti mallongigata nur tiam, kiam *kui* estas subjekto.

### 39. -ante.

Ankoraŭ pli praktikaj kaj uzindaj estas la adverbaj participoj (kun la finaĵo *-e*), kiuj indikas la rilaton (tempo, maniero, kaŭzo) inter la participo kaj la ĉefverbo. Per ili oni povas en gracia maniero mallongigi multajn esprimojn kaj igi la stilon malpeza kaj eleganta.

Anstataŭ la tro pezaj *dum mi dormis, mi sonĝis* aŭ *dum la dorm(ad)o mi sonĝis* ni do diru prefere: *dormante mi sonĝis*. La finaĵo *-ante* enhavas sekve la ideon «*dum*» kaj indikas, ke ambaŭ agoj (tie ĉi la dormado kaj sonĝado) okazas samtempe.

**EKZEMPLOJ:** *Kisante* (= *kiam aŭ dum ŝi kisis*) ŝi fermis la okulojn. Komencante la lernadon, mia frato estis nur sesjara. Sidante en kafejo ili ludis sakon. Kantante marŝas la soldatoj. La ĉevaloj dormas starante. Atendante vian baldaŭan respondon, mi kore salutas vin. Ne atendante li eniris.

**Rimarko 1:** La *e*-formoj de la participoj, same kiel ĉiuj adverboj, estas kompreneble senpersonaj. Tial io simila al «*mi starante*» ne estas ebla.

**Rimarko 2:** Adverba participo estas uzebla nur tiam, kiam la participo kaj verbo rilatas al sama persono. Sed frazoj, similaj al *li venis, kiam mi dormis*, kie la verboj rilatas al malsamaj personoj, ne estas mallongigeblaj (ne «*li venis mi skribante*»!).

### 40. -inte.

La frazon *Post kiam Karlo vekigis, li tuj eklaboris* oni povas mallongigi je *vekiĝinte Karlo tuj eklaboris*, kiu estas evidente multe pli gracia kaj eleganta.

*-inte* signifas «*post kiam -is*» kaj ĝi estas uzata, kiam la ago, kiun esprimas la participo, okazas antaŭ tiu de la verbo: unue Karlo vekigis kaj poste li eklaboris. Kaj *laborinte Karlo ripozis* signifas, ke unue li laboris kaj poste li ripozis.

**EKZEMPLOJ:** Ricevinte de la patro kvin centimojn, Paŭlo iris

en vendejon por aĉeti ĉokoladon. Biciklante dum kelkaj horoj, ili ripozis kaj manĝis. Lerninte siajn taskojn, la infanoj ekludis. Veninte hejmen, li trovis sian edzinon morte malsana. Li haltis, ne atinginte la celon.

#### 41. -onte.

*Manĝonte li trinkis glason da lakto* signifas: antaŭ ol manĝi (aŭ: antaŭ la manĝ[ad]o) li trinkis glason da lakto. Sekve unue li trinkis kaj poste li manĝis. La senco estas do tute mala al *-inte*: *Manĝinte li trinkis glason da lakto* = post la manĝo li trinkis.

**EKZEMPLOJ:** Elironte li prenis sian ĉapelon kaj bastonon. Dormonte oni malvestas sin. Mortonte la riĉulino testamentis sian tutan havaĵon al Esperanto. Vojaĝonte ŝi aĉetis grandan valizon. Enironte privatan ĉambron oni kutimas frapi. Laboronte li surmetis siajn laborvestojn.

#### 42. Mia unua skiado.

Multajn dimanĉojn mi estas pasiginta en la bela Norvegujo, sed tiu februara dimanĉo, pri kiu mi nun estas rakontonta, estas la plej ĉarma kaj interesa, kiun mi estas iam havinta.

Matene ni vekiĝis frue. Vestinte nin per specialaj skivestoj, ni ekveturis per aŭto (= aŭtomobilo) al la montaro (t. e. ni unue vestis nin kaj poste ekveturis; se ni dirus *vestante*, tio signifus, ke ni samtempe vestis kaj ekveturis). Estis bela vintra vetero. Nokte estis falinta freŝa neĝo (la neĝo jam kuŝis sur la tero; falonta signifus, ke neĝos nur la venontan nokton), brilanta (= kiu brilis) en la radioj de la suno (la neĝo brilis dum nia veturado, *brilanta* signifus, ke la neĝo brilis antaŭ nia ekvojaĝo, kaj nun ne brilis). Ni estis tre feliĉaj, ĉar nun estis realiĝonta nia longa deziro skii en la belega norvega naturo (ne *realiĝanta*, ĉar ni ja ankoraŭ ne komencis la skiadon!). Jam kelkajn tagojn ni estis revintaj kaj nokte ni estis eĉ sonĝintaj pri tio (*revintaj* kaj *sonĝintaj*, ĉar tio okazis antaŭ nia ekskurso; *revantaj* kaj *sonĝantaj* signifus, ke ni faris tion dum la veturo).

Ĉe la skidometo estis kolektiĝintaj jam multaj gesamideanoj (ne *kolektiĝantaj*, ĉar ili jam estis tie). Salutinte ĉiujn kunvenintojn, trinkinte kafon kaj manĝinte bongustajn kukojn, ni almetis la skiojn (unue ni salutis, trinkis kaj manĝis, kaj poste ni almetis la skiojn;

*salutAnte*, *trinkAnte*, *manĝAnte* signifus, ke samtempe kun tiuj agoj ni almetis la skiojn; *salutOnte*, *trinkOnte*, *manĝOnte* signifus, ke antaŭ ĉio ni almetis la skiojn kaj nur post tio salutis, trinkis kaj manĝis). Nun estis venonta grava momento en nia vivo – la unuaj paŝoj sur skioj (nek *venInta*, nek *venAnta* taŭgas, ĉar la skiado ankoraŭ ja ne komenciĝis)! Mi tremis febre, pensante pri tio (mi tremis kaj pensis samtempe: *pensInte* signifus, ke mi unue pensis kaj poste tremis, *pensOnte* – ke mi unue tremis kaj poste pensis).

Sed baldaŭ la ekscito estis foriginta kaj mi «gracie kaj elegante» (ĉu vi kredas?) glitis sur la brilanta neĝo. Jes, kelkfoje mi estis falonta (= preskaŭ falis), sed tamen mi retrovis la ekvilibron, kaj baldaŭ mi staris forte kiel roko. Ho, se vi estus vidintaj (ne *vidAntaj*, ĉar tio okazis antaŭ longe), kun kia plezuro mi skiis! Sed eble vi estus ankaŭ ridintaj, ĉar certe mi aspektis sufiĉe komika sur skioj.

Skiinte dum longa tempo, mi iris (antaŭe mi skiis kaj post tio mi iris) kune kun la aliaj skiantoj (ne *skiIntoj*, ni ankoraŭ ne finis la skiadon, nek *skiistoj*, ĉar neniu el ni profesie okupos sin pri tio) en kafejon, trinkante kafon kaj iom ripozante (= por trinki kaj ripozi; *trinkAnte* signifus, ke ni samtempe iris kaj trinkis; *trinkInte* – ni unue trinkis kaj post tio iris en kafejon). Estis tre agrable sidi en la kafejo, trinkante kafon, manĝante buterpanojn, aŭskultante gramofonan muzikon kaj interparolante.

Vespere estis okazonta en la kafejo festo (*okazOnta*, ĉar la festo ne komenciĝis ankoraŭ), kie la gajnintoj de la unua skikonkurso en la mondo (ne *gajnAntoj*, ĉar la konkurso estis jam finita) estis ricevontaj premiojn (ili ankoraŭ ne ricevis) kaj pokalojn. Tiu festo estis eble la plej interesa kaj originala, kiun mi iam estas ĉeestinta: la dancantoj estis vestitaj per skikostumoj, ankaŭ la sinjorinoj, kaj ĉiuj estis portantaj pezajn skibotojn (= ili surhavis la botojn dum la festo). Vilaĝa harmonikisto estis ludanta (= ludis dum la tuta tempo) norvegajn popolajn dancojn, estantajn (= kiuj estis) tre belaj. Poste estis disdonataj diversaj premioj al la partoprenintoj de la konkurso.

Vespere malfrue reveturante hejmen per la aŭto, mi estis tre feliĉa (*reveturante*, ĉar dum la reveturo), ĉar la tago estis estinta tre interesa kaj agrabla (*estinta*, ĉar la tago estis jam finita). Ankaŭ pro tio mi multe ĝojis, ke ankaŭ mi estis ricevinta premion (= mi jam havis la premion; *ricevanta* signifus, ke oni ĝuste transdonis ĝin al mi), kvankam la unuan fojon en mia vivo mi estis starinta sur skioj.

**Rimarko:** En la supra rakonto estas pro pedagogiaj kaŭzoj intence amasigitaj multaj participaj formoj. Ne imitu tion, sed esprimu vin laŭeble simple! Anstataŭ kunmetitaj verbformoj preskaŭ ĉiam sufiĉas simplaj verboj, kiujn en okazo de bezono oni povas precizigi per la klarigaj vortetoj *jam, ĝuste, tuj, preskaŭ* k.a. Tial estas preferinde komenci tiun ĉi rakonton jene: «*Multajn dimanĉojn mi jam pasigis en la bela Norvegujo, sed tiu februara dimanĉo, pri kiu mi nun rakontos, estas la plej ĉarma kaj interesa, kiun mi iam havis*».

## TASKO 8.

(Alskribu la mankantajn silabojn.)

### 43. La gastama provinco

Migr.... komercisto estis vojaĝ.... en provinco. Ĉirkaŭvag.... la tutan tagon, li venis iun vesperon laca kaj dormema al malgranda bieno, kie estis loĝ.... edzo kaj edzino kun siaj ses infanoj. Pet.... permeson tranokti tie, li tuj ricevis ĝin. Vespermanĝ.... la komercisto rimarkis, ke la patrino metas la infanojn po du en la liton. Kiam la unua paro estis ekdorm...., oni transportis ilin sur la plankon, kaj nova paro ricevis lokon en la lito. Ekdorm...., ili siavice devis cedi ĝin al la lasta paro, Kiam jam ĉiuj infanoj estis tiamaniere ekdorm...., la mastro diris al la fremdulo:

«Bonvolu, nun la lito estas je via dispono!»

La komercisto kuŝiĝis kaj tuj ekdormis. Matene vekig...., li trovis sin kuŝ.... sur la planko apud la infanoj, sed en la lito estis trankvile ronk.... la mastro kaj mastrino (= gemastroj).

(Svenska Dagbladet.)

### 44. -aĉ- kaj fi-.

Same kiel *mal-*, *-et-* kaj *-eg-*, ankaŭ tiuj ĉi du afiksoj estas uzeblaj kun ĉiaj radikoj, ne influante ilian karakteron.

1. Sufikso *-aĉ-* esprimas malsaton, mizerecon, sentaŭgecon: *domaĉo* = aspekte mizera, kaduka kaj malbela domo (ĝi tute ne bezonas esti dometo, sed ĝi povas esti ankaŭ domego; kaj dometo siavice povas esti tre bela kaj eleganta); *ĉevalaĉo* = mizera kaj malgrasa ĉevalo, vera «skeletono»; *homaĉo* = malo de ideala homo;

*knabaĉo*; *skribaĉi* = fari «hieroglifojn», malzorge kaj malbone skribi; *rigardaĉi*; *aĉa* = sentaŭga, senvalora, malŝatinda; *aĉe*; *aĉaĵo*.

2. La prefikse uzata interjekcio *fi-* indikas **moralan** maltaŭgecon, abomenon: *fidomo* = domo, kie oni faras abomenaĵojn; *fihomo* = abomeninda homo; *fiaĝi* = agi abomene; *fiaĵo* = abomenaĵo.

## 45. -isto kaj -ismo.

Sufiksoj *-isto* kaj *-ismo* estas substantivigaj, t.e. ili devenigas ĉiam substantivojn, ankaŭ el verbaj kaj adjektivaj radikoj.

1. *-isto* indikas personon, kiu profesie okupas sin pri tio, kion la radiko esprimas: *instrui* – *instruisto*, *pentri* – *pentristo*, *maro* – *maristo*, *ŝuo* – *ŝuisto*, *ĉambro* – *ĉambristino*, *scienco* – *sciencisto*, *lingvo* – *lingvisto*, *kriminala* – *kriminalisto*, *sociala* – *socialisto*. Anstataŭ. *sciencisto* estas uzata ankaŭ *scienculo* kaj anstataŭ *policisto* – *policano*, sed la formoj kun *-isto* estas pli logikaj. *Esperantisto* devus logike signifi personon, kiu profesie okupas sin pri Esperanto, dum *esperantano* – adepto de Esperanto. Sed ĉar *esperantisto* jam enradikiĝis en la lingvo kaj ankaŭ naciaj lingvoj uzas tiun formon, ĝi estas preferinda. La formoj *geologo* kaj *geologiisto*, *geografo* kaj *geografiisto*, *fotografo* kaj *fotografisto* estas samsencaj kaj ambaŭ estas uzataj. La respektivaj sciencoj nomiĝas *geologio*, *geografio*, *fotografio* k.t.p.

**Rimarko:** Komparu la formojn *skribanto*, *verkinto* k.t.p. en § 30, rim. 3!

2. *-ismo* indikas doktrinon, instruon: *kristano* – *kristanismo*, *katoliko* – *katolikismo* (ankaŭ *katolicismo*), *Esperanto* – *esperantismo*, *internacia* – *internaciismo*, *sociala* – *socialismo*, *ĵurnalo* – *ĵurnalismo*, *aŭtomobilo* – *aŭtomobilismo*, *kanibalo* – *kanibalismo*, *anglo* – *anglismo*, *franco* – *francismo* (ankaŭ *galicismo*), k.t.p. En multaj internaciaj vortoj *-ismo* apartenas al la radiko kaj ne estas sufikso: *turismo*, *militarismo*, *naturalismo*, k.t.p.

# SEPA LECIONO

## 46. Prepozicioj.

Ĉiuj prepozicioj (*sur, en, ĉe, inter* k.t.p.) havas firman sencon kaj ne estas uzablaj en alia senco ol ili origine havas. Tiel ne estas en la naciaj lingvoj, kie la sama prepozicio ofte povas havi diversajn signifojn, depende de la kunteksto. Ekz. en kelkaj lingvoj oni diras «*sur la stacio*» anstataŭ «*en la stacio*», «*sur Esperanto*» anstataŭ «*en Esperanto*», «*mi pensas sur vi*» anstataŭ «*pri vi*», k.t.p. Tial oni ne povas laŭvorte traduki la nacilingvajn prepoziciojn, sed oni devas ĉiam elserĉi ilian logikan signifon kaj traduki ĝin. Jam sole pro tio ĉi Esperanto estas multe pli facila ol kiu ajn nacia lingvo, ĉar en Esperanto la uzado de la prepozicioj estas tute logika kaj regula kaj oni ne bezonas lerni parkere ĉiun unuopan esprimon.

## 47. La kazo post la prepozicioj.

Ĉiuj prepozicioj per si mem regas ĉiam nominativon: *en mi, al vi, kun ŝi, sen li, sur la tablo, sub la benko* k.t.p. Kelkfoje kun la prepozicioj estas uzata ankaŭ akuzativo, sed tio ne dependas de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj, kaj en tiaj okazoj akuzativo estus uzata ankaŭ sen prepozicio,

## 48. Direkto.

Komparu la frazojn:

*Petro estas hejme.*

*Li estas tie.*

*Petro iras hejmeN.*

*Li iras tieN.*

La vortoj *hejme* kaj *tie* indikas **lok**on, kie la persono troviĝas, dum *hejmeN* kaj *tieN* montras la **cel**on aŭ **direk**ton, al kiu li moviĝas: li ne estas hejme, sed li iras en la direkto de la hejmo (= *hejmen*). Tiun celon aŭ direkton, transiron de unu loko al alia,



montras la finaĵo *-n*, kiu signas ja ankaŭ la celon de la ago ĉe la transitivaj verboj. Temas do fakte pri la sama akuzativo!

Indikante transiron de unu loko al alia, oni devas kompreneble uzi ankaŭ verbojn de movo: *iras, kuras, flugas, naĝas, metas, ĵetas, veturas, vojaĝas, rapidas*, k.t.p. Ne estas grave, ĉu ili estas transitivaj aŭ netransitivaj. La sama rilato kiel supre estas ankaŭ inter la frazoj

La kraĵono estas en la poŝo.

La ĉapelo estas sur la kapo.

kaj

Mi metas la kraĵonon en la poŝon.

Mi metas la ĉapelon sur la kapon.

La unuaj frazoj montras la lokon, kie la kraĵono kaj ĉapelo troviĝas, dum la lastaj du indikas ilian transmeton al nova loko. *En la poŝon* kaj *sur la kapon* havas la akuzativan finaĵon ne pro la prepozicioj *en* kaj *sur*, sed pro tio, ke ili esprimas celon de movo. Kaj la vortoj *kraĵono* kaj *ĉapelo* estas akuzativaj, ĉar ili estas rektaj objektoj de la transitiva verbo: *metas*.

Do ni vidas, ke la akuzativo estas uzata por du celoj:

1. por montri celon (objekton) de ago kaj por indiki celon (direkton) de movo. La esenco estas la sama.

### PLUAJ EKZEMPLOJ:

1. **Loko:** La lernanto estas en la lernejo. La libro kuŝas sur la tablo. Muso sidas sub la lito. Ŝi iris apud la edzo. La seĝo staras antaŭ la piano. Arbo kreskas malantaŭ la domo. La vagonaro veturis inter montoj. La dometo staras trans la rivero. La mastro laboras ekster la domo. Aeroplano flugis super la urbo.

2. **Celo de movo:** La lernanto iras en la lernejon. Mi metas la libron sur la tablon. Muso kuris sub la liton. Ŝi iris apud sian edzon. Li metis la seĝon antaŭ la pianon. La fremdulo iris malantaŭ la domon. La vagonaro enveturis inter la montojn. La birdo flugis trans la riveron. La viro iris ekster la domon. Flugmaŝino venis super la urbon.

**Rimarko:** Atentu, ke la verboj de movo ne ĉiam indikas movon (transiron) de unu loko al alia, sed povas montri ankaŭ movon en la sama loko: *Mi iras en la ĉambro* = mi estas en la ĉambro kaj ĉirkaŭiras **tie**. *La birdo flugis trans la rivero* = la birdo **jam estis** trans la rivero kaj flugis **tie**

## 49. Senakuzativaj prepozicioj.

Ĵus ni pritraktis prepoziciojn, kiuj havas du signifojn: kun nominativo ili indikas lokon, kie io troviĝas, kun akuzativo ili montras la celon, al kiu io moviĝas. Tiaj prepozicioj estas: *sur, en, sub, apud, antaŭ, malantaŭ, post, inter, trans, ekster, super, ĉirkaŭ, kontraŭ*.

Al tute alia kategorio apartenas: *al, ĝis, de, el*. Ili neniam indikas lokon, sed montras nur **direkton**. Tial mankas kaŭzo por uzi kun ili akuzativon – ili estas ĉiam sekvataj de nominativo. Sekve neniam: »*al la kontoron, el la domon, de la tablon, ĝis la matenon*«, sed ĉiam simple: *al la kontoro, el la domo, de la tablo, ĝis la mateno*.

Al tiu ĉi kategorio apartenas verdire ankaŭ: *ĉe, tra* kaj *preter*, kvankam kelkfoje – laŭ nia opinio senbezone – ili estas uzataj en ambaŭ sencoj (loko kaj direkto). Kutime *ĉe* indikas nur lokon, *tra* kaj *preter* nur direkton. Tial mankas kaŭzo por uzi kun ili akuzativon kaj sufiĉas nominativo, same kiel *ĉe*: *al, ĝis, de* kaj *el*. Do ne »*mi iris tra la pordon, li iris preter la domon*«, sed tute simple *mi iris tra la pordo, li iris preter la domo*. Same ankaŭ la francismo *venu ĉe min*, kiun oni kelkfoje renkontas, ne estas rekomendinda. Pli bona kaj simpla estas: *venu al mi*.

### Akuzativo estas neniam uzata

kun: *al, ĝis, de, el, da, pri, pro, por, per, kun, sen, je, dum, laŭ, malgraŭ* kaj prefere ankaŭ ne kun: *ĉe, tra, preter*.

### TASKO 9.

(Alskribu la finaĵon -n kie ĝi estas necesa!)

Matene la laboristoj iras en la fabriko kaj dum la tuta tago ili laboras en la fabriko. Post la promenado mi iris hejme kaj hejme mi skribis letero al mia amiko. Jam antaŭ unu horo la mastrino metis la manĝo sur la tablo kaj ankoraŭ nun ĝi atendas vi sur la tablo. Pro la pluvo jam kelkaj homoj staris sub la granda arbo kaj ankaŭ ni kuris sub ĝi. El la katedro la pastro iris antaŭ la altaro kaj nun li preĝas antaŭ altaro. La libro glitis malantaŭ la sofo kaj serĉante ĝi li trovis malantaŭ

la sofo ankaŭ la malaperinta gazeto. Post mallonga tempo la instruisto venis el sia ĉambro kaj iris al la nigra tabulo . Subite ŝi iris trans la strato, ĉar trans la strato staris ŝia amikino. De kie vi venas kaj kie vi iras?

## 50. -ano-.

Tiu ĉi substantiva sufikso, kiu indikas membron, adepton, enloĝanton, estas uzebla nur kun substantivoj: *klubo – klubano; kurso – kursano; Kristo – kristano; samideano; urbo – urbano; kamparo – kamparano; Ameriko – amerikano; Parizo – Parizano (aŭ parizano)*, k.t.p.

La formo *hungarano* estas kompreneble absurda; plene sufiĉas *hungaro*. Alia afero estas pri *hungarlandano, hungarujano, hungariano* == persono, kiu loĝas en Hungarlando, Hungarujo, Hungario). Li povas esti germano, rumano, slovako aŭ kiu ajn alia kaj li tute ne bezonas esti hungaro. Same: *polo – pollandano* aŭ *polujano* (= enloĝanto de Polujo; li povas esti polo, judo, germano, ruso k.t.p.); *finno – finnlandano* (ne ĉiuj finnlandanoj estas finnoj – inter ili estas ankaŭ svedoj, laponoj k.a.), *ruso – ruslandano*, k.t.p.

## 51. -ulo.

La substantiviga sufikso *-ulo*, kiu indikas personon, karakterizatan per la radiko, aglomeriĝas kutime al adjektivoj kaj prepozicioj: *juna – junulo; dika – dikulo; konata – konatulo; kontraŭ – kontraŭulo; super – superulo*; k.t.p. El prepozicio *post* estas derivata *postEulo* (poste + ulo), por diferencigi ĝin de *postulo*.

Ĝi estas tamen uzata ankaŭ kun substantivaj kaj verbaj radikoj: *ĝibo – ĝibulo; bruto – brutulo; kapo – ventkapulo; kruro – longkrurulo; drinki – drinkulo; babilo – babilulo; timi – timulo*, k.t.p. Sed fakte en la unua okazo la substantivo estas unue adjektivigata (*ĝibo – ĝiba – ĝibulo; bruto – bruta – brutulo; kapo – ventkapa – ventkapulo*) kaj en la dua okazo temas pri mallongigoj, kie la adjektiviga sufikso *-ema* estas eliminata. La plenaj formoj estas do *drinkemulo, babilemulo, timemulo* k.t.p, kiuj malgraŭ sia longeco kelkfoje estas ankaŭ uzataj. Ĉe la plej multaj verboj tiaj mallongigoj tamen ne estas farataj: *lernemulo* (ne »lernulo«!), *skribemulo*, k.t.p.

La sufikso *-ino* estas aldonata al *-ul-*: *junulino, belulino, virgulino*

k.t.p. Kelkaj mallongigas ankaŭ tiujn formojn kaj diras ekz. *virgino*, sed tio ne estas laŭregula.

**Rimarko:** Kelkfoje *-ulo* estas uzata ankaŭ por bestoj (*kvarpedulo, vertebrulo, rampulo*) kaj ankaŭ en la vorto *trimastulo* (= trimasta ŝipo).

# OKA LEKONO

## 52. Mallonga sintakso.

Kiel jam dirite (§ 16), ĉiu vorto en la frazo havas sian specialan taskon, same kiel ĉiu parto de la aŭtomobilo. Tiu parto de la gramatiko, kiu pritraktas la konstruon kaj konsiston de la frazoj, estas nomata sintakso. Por havi klaran bildon pri la lingvo, oni devas koni ankaŭ ĝian sintakson.

## 53. Predikato.

La plej gravan rolon en la frazo ludas la verbo, kiu indikas, kion tiu **faras**, pri kiu ni parolas. Tia verbo estas nomata **predikato**. La predikato povas havi la finaĵojn: *-as, -is, -os, -us, -u*, sed neniam *-i*: *Jakobo skribas. Mi dormis. Ĉu vi venos? Ho, se mi estus riĉa! Ni ekiru!*

## 54. Subjekto.

La subjekto indikas tiun, kiu **plenumas la agon** de predikato: *Jozefino legas. Knaboj kuras. Tablo estas meblo*. La subjekto neniam povas havi la finaĵon *-n*!

Kiel subjekto povas servi:

a) **Substantivo:** *Johano* parolas. *Birdoj* flugas.

b) **Pronomo:** *Ŝi* venas. *Ili* iras.

c) **Infinitivo de verbo:** *Vojaĝi* estas interese. *Labori* estas necese.

Certaj verboj estas uzataj sen subjekto: *pluvas* (ne «ĝi pluvas»!) = pluvo falas, *neĝas* = neĝo falas, *hajlas*, *fulmas*, *tondras*, *ŝajnas al mi*, *okazas kelkfoje*, *estas necese*, *estas konate*, *se plaĉas al vi*, k.t.p.

## 55. Objekto.

La rekta objekto de la verbo indikas tiun aŭ tion, kiu estas la celo de la ago, al kiu la ago estas direktita. Se ekzemple knabo batas hundon, la knabo estas la aganto (subjekto) kaj la hundo estas la celo de la ago (objekto). La rekta objekto devas ĉiam havi la akuzativan finaĵon *-n*: *Jakobo skribas leteroN. La ĉasisto trafis neniun leporoN. Ĉu mi faris multajn erarojn?*

La akuzativ-objekto estas rekta komplemento de transitiva verbo. La netransitivaj verboj kutime ne povas havi akuzativ-objekton (vidu § 17).

Kiel objekto povas servi:

a) **Substantivo**: *Kato manĝas ratoN. Adamson ne havas harojN.*

b) **Pronomo**: *Nikolao amas ŝin. Ĉu vi vidis ilin?*

c) **Infinitivo de verbo**: *Diligenta homo ŝatas labori. La bestoj ne povas paroli.*

Kompreneble infinitivo neniam povas havi la finaĵon *-n*!

d) **Adjektivo en kelkaj maloftaj okazoj**: *Ili amas unu la alian.*

## 56. Epiteto.

La predikato, subjekto kaj objekto estas la ĉefaj partoj de la frazo, ĉirkaŭ kiuj grupiĝas la ceteraj frazpartoj.

La epiteto estas komplemento de substantivo.

Kiel epiteto povas servi:

a) **Adjektivo**: *Bona patro. Belaj kantoj ne estas longaj Ford havas multaN monoN. Ni detruos la lingvajN murojn. Esperanta libro. Mia patrino. La gepatroj amas siajn infanojn. La unua tago. La mortinta kato. En la apuda ĉambro. La hieraŭa tago.*

La adjektiva epiteto staras kutime antaŭ sia ĉefvorto, sed povas stari ankaŭ post ĝi, precipe en poezio: *Lingvo internacia. Filo mia. Patrino kara. Homo granda kaj potenca.*

La adjektivo devas nombre kaj kaze akordi kun sia ĉefvorto: *granda domo; grandaj domoj; grandajn domojn.*

Sed kiam la sama adjektivo komplementas samtempe plurajn substantivojn, ĝi estas ofte multnombra, eĉ se la substantivoj mem estas ununombraj: *varmaJ rostaĵo, terpomoj kaj saŭco.* Se la adjektivo estus ununombra, oni povus pensi, ke ĝi rilatas nur al la

unua substantivo (en tiu ĉi okazo tiu ĉi okazo *rostaĵo*), ne al la ceteraj. Male, la adjektivo estas ununombra, kiam ĝi rilatas nur al unu el la objektoj, kiujn la multnombra substantivo indikas: *granda kaj malgranda domoj* (= du domoj, el kiuj unu estas granda kaj la alia estas malgranda).

b) **Substantivo**, malofte ankaŭ pronomo, kun prepozicio: *La domo de la patro. Mono por ĉokolado. Skatolo el ligno. Kafo sen kremo. La libro de li* (kutime oni diras *lia libro*). Tia epiteto devas ĉiam troviĝi **post** la substantivo, kies komplemento ĝi estas.

c) Anstataŭ substantivo kun prepozicio oni povas ofte havi kunmetitan vorton, ĉe kio la ĉefvorto staras ĉiam en la fino kaj la epiteto antaŭ ĝi: *patrodomo, ligna skatolo, dompordo*. Oni povas ankaŭ tute simple adjektivigi la epiteton: *patra domo, ligna skatolo, doma poro, senkrema kafo*. Ekzistas do entute 3 eblecoj: *domo de la patro, patra domo, patrodomo*.

d) La difina artikolo: la ĉambro.

e) La vortoj *ia, kia, tia, ĉia, nenia* kaj *iu, kiu, tiu, ĉiu, neniu*: *Tiu libro estas tro dika*.

## 57. Predikata suplemento.

Predikata suplemento (predikativo) kompletigas la predikaton kaj rilatas samtempe al ĝi kaj al la subjekto. Neniam ĝi povas havi la finaĵon *-n*, sed nombre ĝi akordiĝas kun la subjekto (vidu §§ 19 kaj 20).

Predikata suplemento povas esti:

a) **Substantivo**: *Oslo estas urbo. Ni ĉiuj estas homoj*. Kiam la predikata suplemento rilatas al pluraj ununombraj subjektoj, ĝi estas multnombra: *Parizo kaj Kopenhago estas urboj*.

b) **Adjektivo**: *La ĉambro estas varma. La libroj estas Esperantaj*. Kiam la predikata suplemento rilatas nur al unu el la objektoj, kiujn la multnombra subjekto indikas, ĝi estas ununombra: *La kraĵonoj estas verda kaj flava* (= unu kraĵono estas verda, la alia estas flava).

c) Kiam la frazo ne havas subjekton aŭ la subjekto estas infinitivo aŭ tuta frazo, la predikata suplemento devas esti adverbo: *Tie ĉi estas tro varme. Lerni Esperanton ne estas malfacile. Estus bone, se nun estus somero. Estas vere, ke mi estis hieraŭ malsana*.

## 58. Adverbialo (adjekto).

El ĉiuj frazpartoj la plej ampleksa estas tiu kategorio, kiun ni nomas **adverbialo**, ĉar ĉio, kio ne estas predikato, subjekto, objekto, epiteto aŭ predikata suplemento, estas adverbialo. Jam la nomo aludas, ke temas pri komplemento de verbo, sed ĝi povas esti ankaŭ komplemento de adjektivo kaj adverbo. Adverbialo estas kutime adverbo kaj substantivo aŭ pronomo kun prepozicio.

Oni povas dividi la adverbialojn je diversaj subklasoj:

a) Loko: *Mi estas hejme. Kie oni kantas? La kafo estas sur la tablo. Li sidis apud la ŝoforo.*

b) Direkto: *Kien vi iras? Mi iras hejmen. Metu la manojn sur la tablon. Li prenis la revolveron el la poŝo. Venu al mi!*

c) Nerekta aŭ dativ-objekto: *Donu al mi panon. Ŝajnas al mi. La domo apartenas al s-ro Ormonto. Nenio plaĉas al ŝi.*

d) Tempo: *Somere estas varme. Tage ni laboras kaj nokte ni dormas. Mi skribis dum longa tempo. Longan tempon ŝi ne vidis lin. En tiu ĉi semajno estas du festotagoj. Ĉu li jam venis? Ne, li ankoraŭ ne venis. Kion vi faris hieraŭ? Iam estis reĝo.*

e) Maniero: *Kiel vi fartas? Dankon, bone. La ĉevaloj dormas starante. Venu rapide!*

f)Kaŭzo: *Kial vi ploras? Li ruĝiĝis pro (aŭ de) kolero.*

Krom tio: deveno, materialo, celo, rimedo, kvanto k.t.p.

## 59. Vortordo.

En § 15 ni diris, ke en Esperanto la vortordo estas libera kaj ne influas la sencon de la frazo. Sed tio estas kompreneble relativa, same kiel ĉio en la mondo estas relativa.

La normala vortordo estas subjekto + predikato + objekto, ĉirkaŭ kiuj grupiĝas la ceteraj frazpartoj: *La bona lernanto rigardas al la nigra tabulo.* Sed pro stilaj kaŭzoj kaj por speciale akcenti la objekton aŭ iun alian parton de la frazo, oni ofte ŝanĝas la vortordon: *Al la nigra tabulo rigardas la bona lernanto. La bona lernanto al nigra tabulo rigardas. Lin mem mi ne vidis, sed lian edzinon mi renkontis sur la strato. Sur la strato mi renkontis lian edzinon.*

La bona stilo postulas, ke oni ne apartigu tiujn partojn de la frazo, kiuj rilatas unu al la alia kaj kompletigas unu la alian. Pro tio la frazo



«*Mi lian edzinon sur la strato renkontis*» ne estas modela, ĉar la predikato *renkontis* estas lokita tro malproksime de la subjekto *mi*. Bonstile oni esprimas sin en unu el la sekvantaj manieroj: *Mi renkontis lian edzinon sur la strato. Lian edzinon sur la strato mi renkontis. Sur la strato mi renkontis lian edzinon. Sur la strato lian edzinon mi renkontis.*

La samo validas ankaŭ pri la ceteraj partoj de la frazo: ĉiu frazparto troviĝas ĉiam ĉe tiu vorto, al kiu ĝi rilatas. Adjektivo staras ĉe substantivo. Kutime antaŭ, sed kelkfoje ankaŭ post ĝi, precipe en poezia stilo. Adverbo lokiĝas kutime post, sed ofte ankaŭ antaŭ verbo kaj ĉiam antaŭ adjektivo: *Vi parolas bone. Vi bone parolas. Tio estas treege interesa.* Kiam oni volas speciale akcenti la adverbbon, oni lokas ĝin en la komenco de la frazo: *Bone vi parolas. Treege interesa estas tio.*

La subjekto lokiĝas kutime antaŭ la predikato: *Nun mi komprenas* (ne «*Nun komprenas mi*»!). *En Svedlando la vintro estas longa* (ne: «*En Svedlando estas la vintro longa*»). *Tio estas bona, li diris.* Sed: *Tio estas bona, diris Petro. Tion mi ne kredas, respondis la patro de mia amiko.* Tiuj frazoj ŝajnas esti pli fluaj ol: *Tio estas bona, Petro diris. Tion mi ne kredas, la patro de mia amiko respondis.* Nu, estas afero de gusto!

La loko de la prepozicioj, numeraloj kaj konjunkcioj ne estas ŝanĝebla: *Inter la popoloj estas altaj lingvaj muroj* (ne «*la popoloj inter*»!). *Sep tagoj pasis* (ne «*tagoj sep*»!). *Ni timis, ke neniu venos.*

La artikolo devas esti laŭeble proksime al sia ĉefvorto. Tial la germanismo «*Oni akceptis la de li faritan proponon*» tute ne estas modela, sed en bona Esperanto oni diras: *Oni akceptis la proponon, faritan de li*; aŭ: *Oni akceptis proponon, de li faritan* (tie ĉi temas ja fakte pri mallongigita frazo, kies origina formo estas: *Oni akceptis la proponon, kiun li faris*).

La vortoj *ne, ankaŭ, nur* kaj *eĉ* staras ĉiam antaŭ tiu vorto, al kiu ili rilatas. Tion oni devas bone atenti, ĉar de ilia loko dependas la senco de la tuta frazo: *Mi ne skribis leteron. Mi skribis ne leteron* (= mi skribis, nur ne leteron, sed ion alian). *Ne mi skribis la leteron* (= ne mi, sed iu alia faris tion). *Hodiaŭ mi estis ankaŭ hejme* (= mi estis en diversaj lokoj kaj interalie ankaŭ hejme). *Hodiaŭ ankaŭ mi estis hejme* (= la aliaj estis hejme kaj ankaŭ mi faris tion). *Ankaŭ hodiaŭ mi estis hejme* (= mi estis hejme en la antaŭaj tagoj kaj ankaŭ

hodiaŭ). *Mi tute ne kredas tion. Mi ne tute kredas tion* (= mi kredas nur parte). *Hieraŭ mi nur legis* (= mi faris nenion alian). *Hieraŭ nur mi legis* (= neniu alia faris tion). *Nur hieraŭ mi legis* (= en la ceteraj tagoj mi ne legis aŭ hieraŭ estis la unua fojo, kiam mi legis). *Eĉ li ridas pri tio. Li ridas eĉ pri tio. Li eĉ ridas pri tio.*

## **TASKO 10.**

*(Elserĉu la diversajn frazpartojn!)*

### **Talenta besto.**

Persson aĉetis al si papagon, kiu laŭ certigo de la birdkomercisto povas paroli. Sed bedaŭrinde eĉ unu sonon la papago ne eligis dum pluraj tagoj. Persson estis tre ĉagrenita pro tio, sed li opiniis, ke eble unu vorton oni tamen sukcesus instrui al la bestaĉo. Tial li ekstaris antaŭ la kaĝo de la birdo kaj vokadis senĉese dum pli ol duonhoro: «Hallo, hallo, hallo!» Nenia rezulto. Persson daŭrigis ankoraŭ dum tuta kvaronhoro, ĝis kiam fine la papago respondis: «Okupita!»

(Götenborgs-Posten).

# NAŬA LECIONO

## 60. Pasivaj participoj.

Al la 3 aktivaj participoj kun la finaĵoj *-int-*, *-ant-* kaj *-ont-* (vidu la kvinan kaj sesan lecionon!) respondas 3 pasivaj participoj kun la finaĵoj *-it-*, *-at-* kaj *-ot-*.

La diferenco inter tiuj du specoj de participoj estas tio, ke ĉe la aktivaj la subjekto mem estas la plenumanto de la ago (*dormanto*, *vidanto*), dum ĉe la pasivaj la subjekto estas la celo de la ago kaj ludas do la saman rolon kiel objekto en aktiva frazo. Esence ĝi ankaŭ estas objekto, nur laŭ la formo ĝi estas subjekto. Pasivan frazon oni povas ĉiam transformi je aktiva, kaj tiam la subjekto de la pasiva frazo fariĝas rekta objekto en la aktiva. Ni klarigu tion per ekzemploj:

*La knabo batas la hundoN – La hundo estas batata de la knabo. La patrino vekis la infanojN – La infanoj estis vekataj (estis aŭ estas vekitaj) de la patrino. La kelnero lernas EsperantoN – Esperanto estas lernata de la kelnero. Policisto arestis krimuloN – Krimulo estis arestata (estis aŭ estas arestita) de policisto. Oni nomas liN Paŭlo – Li estas nomata Paŭlo. Mi skribis tion ĉi – Tio ĉi estas skribita (estis skribata) de mi.*

Pasivajn participojn povas havi nur tiuj verboj, kiuj povas havi akuzativ-objekton, t. e. transitivaj verboj. La netransitivaj verboj ne havas pasivan participon. Sekve tiaj formoj kiel «*estita*, *starata*, *kuŝota*» k.t.p. estas tute neeblaj! Sed aktivajn participojn havas ĉiuj verboj, egale, ĉu ili estas transitivaj aŭ netransitivaj.

Tiu, kiu en la pasiva frazo plenumas la agon kaj sekve esence (sed ne laŭforme) estas subjekto, estas rilatigata al la participo per la prepozicio *de*: *La hundo estas batata de la knabo. La libro estas verkita de mi.* Ĉe aktivigo de la pasiva frazo la aganto fariĝas subjekto de la aktiva frazo: *La knabo batas la hundon. Mi verkis la libron.*

## 61. -ata, -ato.

**-at-** indikas, ke la ago daŭras, ne estas ankoraŭ finita: *Manĝata banano. Konata fakto – estas fakto, kiun ĉiuj konas. Historio estas lia plej ŝatata temo. Johano estas plej amata filo. Konato – estas persono, kiun oni konas. Vokato – estas tiu, kiun oni vokas, sed vokaNto estas tiu, kiu mem vokas. Amato estas tiu, kiun oni amas, sed amaNto estas tiu, kiu mem amas. Amatino. Konatino.*

Ĉar la substantivaj participoj jam per si mem indikas personon, la personiga sufikso *-ulo* estas ĉe ili superflua same kiel ĉe la aktivaj participoj (vidu §30, rim. 1). Sekve ankaŭ en la tre ofte uzataj vortoj *konatulo* kaj *konatulino* la sufikso *-ulo* fakte ne estas necesa.

La adjektivaj participoj estas plene egalaj al la ordinaraj adjektivoj: *Bela hundo. Batata hundo = hundo, kiun oni batas. La vino estas bona. La vino estas trinkata.* Same kiel oni povas diri *la vino estIs bona, estOs bona, estUs bona, devus estI bona* k.t.p., oni povas diri ankaŭ *la vino estIs trinkata, estOs trinkata, estUs trinkata, devus estI trinkata* k.t.p.

**EKZERCO:** Dum du monatoj la krimulo estis serĉata, sed li scipovis tiel bone kaŝi sin, ke eĉ nun ankoraŭ li estas serĉata, kaj eble ankaŭ post pliaj du monatoj li estos ankoraŭ serĉata.

## 62. -ita, -ito.

**-it-** indikas, ke la ago estas **jam finita**, ne plu daŭras: *La manĝita kuko estas jam en la stomako. Farita laboro = preta laboro. Presita libro = libro, kies presadon oni jam finis. Korektitaj eraroj. Irita vojo = vojo, kiun ni jam iris kaj kiu estas jam malantaŭ ni. Venkito estas tiu, kiun oni venkis, dum la venkiNto mem venkis iun. Mortigito estas tiu, kiun oni mortigis, sed mortigiNto mortigis iun alian homon; mortigisto estas tiu, kies profesio estas mortigi.*

**EKZERCO:** Li timis, ke baldaŭ lia mono estos elĉerpita, sed tute subite li ricevis grandan sumon kaj sekve eĉ nun ankoraŭ lia mono ne estas elĉerpita. Li diris, ke foje estis tempo, kiam lia mono estis jam preskaŭ elĉerpita.

**Rimarko 1:** Pro influo de la naciaj lingvoj, kiuj ne havas *at-*participon kaj anstataŭ ĝi ofte uzas *it-*formojn, multaj estas tentataj ankaŭ en Esperanto trouzi la *it-*formojn je konto de la *at-*formoj. Oni devas do bone atenti tion kaj uzi ĉiam tiun formon, kiu respondas al

la logika senco de la esprimo, sed ne blinde imiti la naciajn lingvojn! Tute ne estas egale, ĉu oni diras *li estas nomita Petro* aŭ *li estas nomata Petro*. La unua frazo kun *nomita* signifas, ke oni **pli frue** nomadis lin Petro, sed nun **ne plu** faras tion, aŭ ke oni ĵus donis al li la nomon Petro. Sed *li estas nomAta Petro* signifas, ke lia nomo estas Petro kaj ke oni ĉiam nomas lin tiel. Same *konIta fakto* signifas fakton, kiun oni iam konis, sed nun *ne plu* konas. Fakto, kiun oni **nun** konas, estas konAta fakto.

**Rimarko 2:** La verbo *okupi* havas du nuancojn: 1) preni en posedon kaj 2) okupi sin pri io, havi okupon, laboron, oficon. De tiuj nuancoj dependas ankaŭ la uzado ĝiaj *at-* kaj *it-*formoj: *Tiu ĉi loko estas jam okupIta* = oni **jam** prenis ĝin en posedon. *La urbo estas okupita de la malamiko* = la malamiko **jam** prenis ĝin en posedon. *La urbo estas okupAta de la malamiko* = ĝia submetado ne estas ankoraŭ finita. *Mi estas tre okupita* = mi tute ne havas liberan tempon. *Mi estas okupIta per (pri) Esperanto* = por aliaj aferoj al mi ne restas tempo. *Li estas okupAta en la vendejo de sia patro* = li laboras, havas okupon en la vendejo de la patro. *Nuntempe mi estas okupAta pri la verkado de tiu ĉi libro* = mi verkas tiun ĉi libron, sed faras ankaŭ aliajn laborojn.

### 63. -ota, -oto.

**-ot-** indikas, ke la ago ankoraŭ ne komenciĝis: *Konstruota domo* = domo, kiun oni intencas konstrui. *Farota laboro* = laboro, kiun oni ankoraŭ ne komencis. *Vizitotaj lokoj* = lokoj, kiujn oni intencas viziti. *Elektoto* = iu, kiun oni intencas elekti (sed *elektito* = iu, kiun oni jam elektis). *Mortpafoto* = iu, kiu estis difinita por morti per pafado (sed *mortpafoto* = iu, kiu estas difinita por mortpafi iun alian).

**EKZERCO:** Jam lastjare la vojo estis riparota, sed la koncerna oficejo funkcias tiel malrapide, ke eĉ nun oni ankoraŭ ne komencis la laboron kaj ĉiam ankoraŭ la vojo estas riparota. Troviĝas homoj, kiuj timas, ke eĉ la venontan jaron la vojo ne estos riparita, sed ĉiam ankoraŭ riparota.

**Rimarko:** *-ota* per si mem ne enhavas la ideon «*devi*», kiun esprimas la sufikso *-enda* (= devas esti *-ata*): *Farota laboro estas laboro, kiun oni intencas fari, kiun oni ankoraŭ ne komencis, sed farenda laboro estas laboro, kiun oni devas fari*. En la praktika lingvouzo la diferenco tamen ne estas granda kaj ofte oni povas uzi

-ota anstataŭ -enda.

## 64. Mallongigado de frazoj.

### a) -ata, -ita, -ota.

En § 38 ni havis la frazon *Jen estas la viro, kiuN mi helpos*, pri kiu ni diris, ke ĝi ne estas mallongigebla per aktiva participo. Sed en tiaj okazoj oni povas per **pasivaj** participoj en gracia maniero mallongigi la frazojn: *Jen estas la viro, helpota de mi*. Sekve *helpota de mi* signifas *kiuN mi helpos*. Analogie *helpata de mi* signifas *kiuN mi helpas* kaj *helpita de mi* – *kiuN mi helpis*.

**EKZEMPLOJ:** Oni revenis al la loko, **kiuN oni forlasis** antaŭ nelonge = Oni revenis al la loko, **forlasita** antaŭ nelonge. La teatraĵo, **kiuN oni nuntempe prezentas** en la Granda Teatro, havas grandan sukceson = La teatraĵo, nuntempe **prezentata** en la Granda Teatro, havas grandan sukceson. Li rakontis anekdotojnN, **kiujN oni aŭdis** jam multfoje. = Li rakontis anekdotojnN, **aŭditajnN** jam multfoje. La knabino difektis la pupoN, **kiuN oni ĵus donacis** al ŝi = La knabino difektis la pupoN, ĵus **donacitaN** al ŝi.

Atentu, ke la pasiva participo, same kiel la aktiva, havas la saman kazon kaj nombron kiel la substantivo, al kiu ĝi rilatas.

### b) -ate, -ite, -ote.

1. Ni diras: *La aero estas varmA*, sed: *Estas varmE*, ĉar kiam la frazo ne havas subjekton, la predikata suplemento devas havi adverbajn finaĵojn (vidu § 57, c). Same estas pri la pasivaj participoj: *Tio estas konatA*. *Estas konatE*.

**EKZERCO:** Estas konatE, ke Esperanto estas facila kaj praktika lingvo. En la artikolo estas skribitE, ke fine oni trovis rimedon kontraŭ kancero. Kiel diritE, mi ne povas prunti al vi monon, ĉar mi mem ne havas.

2. Anstataŭ *Post kiam oni purigis la aŭtomobilon, ĝi aspektis tute nova*, oni povas pli mallonge diri: *Purigite aŭtomobilo aspektis tute nova*. La procedo ĉe tiaj mallongigoj estas la sama kiel ĉe la aktivaj participoj (§§ 39, 40, 41), nur la senco estas nun pasiva. *Purigate* respondas al *dum oni purigas* (aŭ *purigis*) kaj *purigote* = antaŭ ol

*oni purigos (aŭ purigis).*

**EKZEMPLOJ:** Lavote la manoj estas malpuraj, lavate ili estas malsekaj, lavite ili estas puraj. Dresote la leono estis tute sovaĝa kaj furioza, dresate ĝi fariĝis pli kaj pli kvietaj, dresite ĝi estis milda kiel kato.

## **TASKO 11.**

*(Alskribu la mankantajn finaĵojn!):*

### **Letero de barono Münchhausen.**

Estas ĝenerale kon...., ke dum mia aventura vivo mi estas travojaĝ.... la tutan civiliz.... kaj neciviliz.... mondon. Sed kvankam mi estas lern.... multajn lingvojn kaj entute estas homo alte instru...., tamen en multaj landoj mi nek povis ion kompreni, kiam mi estis alparol.... en la loka lingvo, nekon.... por mi, nek mi mem sukcesis igi min kompren.... Tial mi ofte estis devig.... uzi la helpon de ridindaj gestoj kaj grimacoj, neniel respond.... al mia natura digno.

Estas do kompreneble, ke leg.... en kelkaj gazetoj pri la vasta uz....eco de la angla lingvo, mi tuj fariĝis konvink...., ke per tiu lingvo, parol.... kaj kompren.... en la tuta mondo, miaj malagrablaĵoj estos fin.... por ĉiam. Sed lern.... la nom.... lingvon dum tri jaroj kaj uz.... ĝin dum miaj gloraj vojaĝoj en la diversaj landoj, mi estis ĉie akcept.... kaj trakt.... kiel anglo, kaj tio ĉiam profunde dolorigis mian sinceran germanan koron. Krom tio mi havis ankaŭ tiun maldolĉan sperton, ke en la plej multaj Eŭropaj landoj mi trovis angle parol... preskaŭ nur inter la pordistoj de luksaj hoteloj kaj ke en Ameriko kaj kelkloke eĉ en Anglujo mem la lingvo estis parol.... en tute alia maniero ol mi estis lern.... ĝin ĉe mia instruisto. Ofte mi sukcesis kompreni nenion kaj same ofte mi estis kaŝe pririd.... pro mia «ĵargono».

Pro tio, aŭd.... pri la nacie neŭtrala kaj matematike simpla kaj regula Esperanto, mi tuj estis kapt.... de tiu granda kaj nobla ideo, sav.... la homaron el la lingva Babelo. Ellern.... dum kelkaj semajnoj tiun est.... duan lingvon de ĉiu kulturhomo, mi jam kun granda sukceso uzas ĝin dum miaj vojaĝoj, ĉie renkont.... helpemajn esperantistojn. Bedaŭrinde multaj homoj estas ankoraŭ katen.... de la kon.... homa konservativeco kaj

antaŭjuĝemo kaj ne komprenas ankoraŭ la grandan rolon, lud.... de la facila kaj neŭtrala helplingvo. Sed la saman sorton havis ja ankaŭ ĉiuj aliaj novaj ideoj kaj eltrovaĵoj!

## 65. Posedo (genitivo).

Posedo estas esprimata per la prepozicio *de*, kiu estas lokigata ĉiam antaŭ tiu substantivo, kiu indikas la posedanton: *Floro havas odoron – laodoro de lafloro. La patro havas ĉapon – laĉapo de la patro. La kreto havas blankan koloron – la koloro de la kreto estas blanka. Li havas filon – la filo de li. Instruisto de Esperanto.*

La personaj pronomoj (*mi, vi* k. t. p.) estas tre malofte uzataj kun *de* por esprimi posedon, sed preskaŭ ĉiam oni adjektivigas ilin, t.e. per la finaĵo *-a* oni devenigas el ili posedajn pronomojn (*mia, via* k.t.p.). Do ne «*la filo de li*», kiu formo estas tre malofte uzata, sed *lia filo. Kio estas via nomo? Mia nomo estas Frederiko. Ŝia ĉapelo estas moderna. Nia lingvo estas jam tre disvastigita. Ĉu vi vidis iliajn novajn vestojn?*

Entute oni povas ofte anstataŭ *de* uzi adjektivan formon: *Domo de patro – patra domo. Skatolo de cigaredoj – cigareda skatolo. Pordo de ĝardeno – ĝardenapordo. Per tio la nuanco de posedo tamen malfortiĝas kaj la kvalito estas pli akcentata. En la esprimoj *la stilo de Zamenhof* kaj *Zamenhofa stilo* (= stilo, kiu estas simila al tiu de Z.) la diferenco estas jam tre granda. Sekve ne ĉiam oni povas anstataŭigi *de* per adjektivo! Anstataŭ *de* oni povas ofte uzi ankaŭ kunmetitan vorton, ĉe kio la vortordo inversiĝas: *Pordo de domo – doma pordo – dompordo. Limo de lando – landa limo – landlimo.**

La serio *ia, kia, tia, ĉia, nenia* indikas nur econ, ne posedon. Por la lasta celo ni havas la vortojn *ies, kies, ties, ĉies, nenies*, anstataŭ kiuj oni povas en esceptaj okazoj uzi ankaŭ formojn kun *de*: *ies = de iu, de io*, k.t.p. *Kies skribmaŝinon vi uzas? Mi uzas mian propran skribmaŝinon.* Al la personaj pronomoj oni neniam povas doni la finaĵon *-es* kvankam pro analogio oni kelkfoje estas tentata tion fari (*kies – mies*). Do ne «*mies*» sed *miA!*



# DEKA LEClONO

## 66. Adverboj de loko.

En § 29 ni preparolis la adverbojn de maniero (*bone, bele*), kiuj respondas al la demando *kiel?* Nun temas pri tiaj adverboj, kiuj respondas al la demando ***kie?*** Al tiu kategorio apartenas ankaŭ la serio ***ie, tie, ĉie, nenie, kie.***

**EKZEMPLOJ:** *KIE* estas la vundita fajrobrigadisto? *Li* estas hejme. *Supre* sur la monto estas neĝo. *La* lernejo estas tute proksime. *Interne* li tute ne estas tiel malbona kiel oni povus supozi laŭ lia aspekto. *La* infanoj ludas eksterE. *La* kato kuris antaŭE kaj la hundo malantaŭE. *La* banejo estas tuj apude. *Sube* loĝas gesinjoroj Müller. *TransE* de la rivero estas la malnova urboparto. Multaj homoj staris ĉirkaŭE.

Kun la finaĵo *-n* tiuj ĉi adverboj indikas direkton (vd. § 48): *KieN* vi iras? *Mi* iras hejmeN. *Ili* veturis per lifto supreN al la kvara etaĝo. *Ŝi* iris kuraĝe antaŭeN.

Malofte precipe en poezio estas uzataj ankaŭ la formoj *urbe* (= en la urbo), *urben* (= en la urbon); *arbare* (= en la arbaro), *arbaren* (= en la arbaron); *dome* (= en la domo), *domen* (= en la domon); *ene* (= interne), *ele* (= ekstere), k.t.p.

## 67. Kunmetitaj vortoj.

### Prepozicio + substantivo.

Anstataŭ *sur la tablo* oni povas pli mallonge diri *surtable*: *La lampo* estas *surtable*. Same: *enlande* (= en la lando), *eksterlande* (= ekster la lando), *surdorse* (= sur la dorso), *ĉekore* (= ĉe la koro), *permane* (= per la mano[j]), *senveste* (= sen vestoj), *ĝisgenuE* (= ĝis la genuoj), *laŭvice* (= laŭ la vico), k.t.p. Ankaŭ ili alprenas kompreneble la finaĵon *-n*, kiam ili indikas direkton: *eksterlandeN*, *surdorseN*, k.t.p.

Tiaj kunmetaĵoj el prepozicio kaj substantivo povas havi ankaŭ aliajn gramatikajn finaĵojn kaj alpreni diversajn sufiksojn: *eksterlanda*, *eksterlando*, *eksterlandano*, *pertranĉile*, k.t.p.

**EKZERCO:** En ĉiuj landoj oni propagandas: aĉetu nur **enlandajn** varojn! Estono estas **enlandano** en Estonio, sed **eksterlandano** en la aliaj landoj. La studento loĝas en malgranda **subtegmenta** ĉambro. Ĉu en via lando ekzistas **subĉiela** (liberaera) muzeo? La preĝanto staras **surgenue**. Oni batis lin **ĝismorte**. Esperantistoj portas **surbruste** verdan stelon. En **apudmaraj** (ĉemaraj) regionoj pluvigas multe. **Intertempe** ni ripozis iomete. La **interakto** daŭris vere tro longe. Ne parolu **sensencaĵojn!**

## 68. -igi.

Anstataŭ *La patrino faras la ĉambrom puran* oni diras kutime *La patrino purigas la ĉambrom*. Sekve *purigas* signifas «faras pura». Same: *varmigas* = faras varma, *sanigas* = faras sana, *kuraĝigas* = faras kuraĝa, *lumigas* = faras luma.

Anstataŭ *La bankroto faris lin ruina* oni diras pli mallonge *La bankroto ruinigis lin*. *Edzinigi* = fari edzino: *La komercisto edzinigis la filinon de la bankdirektoro*. *Amikigi* = fari amiko: *Komuna sorto ofte amikigas la homojn*.

Kun prepozicioj: *La kamentubo eligis densan fumon*. *Ŝtelisto enigis (= enmetis) sian manon en lian poŝon*. *Amo kunigas, malamo disigas*. *La milito senigis multajn infanojn je patro, edzinojn je edzo kaj gepatrojn je filoj*. *La sekretario aligis (= anigis, membrigis) al la klubo dek novajn membrojn*. *Napoleono subigis (= submetis) al si preskaŭ la tutan Eŭropon*. *La kamparano ĉirkaŭigis siajn kampojn per barilo* (komparu: *Barilo ĉirkaŭis la kampojn*). *La vorton «objekto» oni povas anstataŭigi per «aĵo»* (komparu: «*Aĵo*» povas anstataŭi la vorton «objekto».)

Kun numeraloj: *Usono = Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko*. *Per lerta reklamo la komercisto duobligis sian debiton*.

Verboj: Atentu la diferencon inter la frazoj *Li venis* kaj *Li venigis sian amikon*. La dua frazo kun la verbo *venigis* signifas, ke li faris, igis sian amikon veni. Pliaj ekzemploj: *Li mem sciis tion kaj sciigis tion ankaŭ al siaj amikoj* (aŭ: *sciigis [informis] pri tio siajn*

*amikojn). La viro dronigis la katidojn. La katidoj dronis. La vazo ne falis per si mem, sed iu faligis ĝin. Vilaĝano veturis al la foiro kaj veturigis kune ankaŭ sian tutan familion. Oni starigis la kristnaskan arbon en ingo, sed tamen ĝi staris iom malrekte. La maljunulo starigis sin malrapide. La instruisto sidigis Alberton en la unua benko, kvankam li ordinare sidis en la lasta. Estas jam tempo por kuŝigi la infanojn! Antaŭ ol eniri fremdan loĝejon oni devas **sonorigi**, aŭ, se la sonorilo estas difektita kaj ne sonoras, oni devas frapi sur la pordon. Malamo **estigas** (= kaŭzas, naskas) malamon.*

Plej ofte *-igi* estas uzata kun netransitivaj verboj, kiuj per tio fariĝas transitivaj kaj povas ekhavi rektan objekton kun finaĵo *-n*: *sidas* estas netransitiva, sed *sidigas* estas jam transitiva, *-igi* estas do transitiviga sufikso.

Kun transitivaj verboj *-igi* signifas: *igi* iun alian plenumi la agon de la verbo. Atentu la diferencon inter *La patrino vekis min matene* kaj *La patrino vekigis min matene*. En la unua frazo la patrino mem vekis min, sed en la dua ŝi petis iun alian fari tion. Same estas pri ĉiuj transitivaj verboj: *komenci, fini, vesti, konvinki, surprizi, atendi, estingi, fotografi, fari*, k.t.p. Sekve: *Ĉu mi atendigis vin tre longe* (= mi mem ne atendis, sed mi estis la kaŭzo de la atendado)? *Kie vi farigis la meblojn? Ili fotografiĝis sin sur la marbordo* (= ili mem ne fotografis sin, sed ili petis iun alian fari tion). *Nia klubo bindigis siajn librojn ĉe s-ano N.* (= s-ano N. bindis la librojn). *Mi presigis miajn vizitkartojn en «La Nova Presejo»* (= «La Nova Presejo» presis miajn vizitkartojn).

Do la transitivaj verboj sen la sufikso *-igi* signifas, ke la subjekto mem plenumas la agon, dum kun la sufikso *-igi* ili esprimas, ke iu alia faras tion laŭ peto aŭ ordono de la subjekto. Ĉiukaze ne trouzu la sufikson *-igi*, kion la komencantoj ofte faras: la bezono je *-igi* kun transitivaj verboj estas tre malofta. Kiam vi matene surmetas la vestojn, ne diru, ke vi «*vestigas*» *vin*, ĉar tio signifus, ke iu alia surmetas al vi la vestojn, sed diru simple, ke vi *vestas vin*; kiam vi sukcesas interesigi kaj kredigi iun pri la neceseco de Esperanto, ne diru, ke vi «*konvinkigis*» *lin*, sed simple, ke vi *konvinkis lin*; kaj kiam kiel prezidanto de kunveno vi deklaras, ke la kunveno estas finita, ne diru, ke vi «*finigas*», sed simple, ke vi *finas la kunvenon*.

**Rimarko:** «*La instruisto lasis la infanojn rerakonti la historion*» signifas, ke li **permesis** al ili tion fari, li ne malhelpis ilin

en tio. *La instruisto igis la infanojn rerakonti la historion signifas, ke li **petis, ordonis, devigis** ilin tion fari. Lasi signifas nur permesi, ne malhelpi kaj ne enhavas ideon pri ordono aŭ devigo.*

## 69. **Surtablighi, enpoŝigi.**

Anstataŭ *La mastrino metis la manĝaĵon sur la tablon kaj Ludoviko metis la kraĵonon en la poŝon* oni povas diri pli mallonge *La mastrino surtablighis la manĝaĵon kaj Ludoviko enpoŝigis la kraĵonon* (komparu § ).

**EKZEMPLOJ:** *Vespere la patrino **enlitigas** (= metas en la liton) kaj matene **ellitigas** (= prenas el la lito) la infanojn. La parolanto **elpoŝigis** naztukon, purigis per ĝi la nazon kaj denove **enpoŝigis** ĝin. La knabo **enbuŝigis** tutan pomon. Li **enkapigis** al si multajn gramatikajn regulojn. La luktantoj klopodis **surdorsigi** unu la alian. Bonvolu **altablighi** la seĝojn! La milito **senfiligis** multajn gepatrojn, **senedzigis** multajn virinojn kaj **senpatrigis** multajn infanojn. Antaŭ ol iri en akvon oni senvestigas (= malvestas) sin. Ne **senkulpigis** vin vane, ĉar vi ja nenion faris! Manĝinte oni **detablighas** la seĝojn.*

## 70. **-igi.**

La sufikso **-igi** (= igi sin) havas tute malan sencon al **-igi**: **-igi** esprimas, ke la ago transiras al iu alia, dum ĉe **-igi** la ago **revenas** al la **sama** persono (la subjekto, aganto):

*La fraŭlino subite **ruĝiĝis** (= fariĝis, iĝis ruĝa). Li **paliĝis** pro teruro – Teruro paliĝis lin. Miaj manoj **malpurigis** en la laboro – La laboro malpurigis miajn manojn. Antaŭhieraŭ li **malsaniĝis**, sed baldaŭ li **resaniĝis**. En la pluvo la vestoj **malsekiĝis** – La pluvo malsekigis la vestojn.*

Kun substantivoj: *Li **ruiniĝis** pro bankroto – Bankroto ruinigis lin. La filino de la bankdirektoro **edziniĝis** je (al) la komercisto. La komercisto **edziĝis** je (al) la filino de la bankdirektoro. Per (pro) komuna sorto la homoj ofte **amikiĝas** (= fariĝas, iĝas amikoj).*

Kun prepozicioj: *Densa fumo **eliĝis** el la kamentubo. Kiamaniere li **eniĝis** en la ĉambron, ĉar la pordoj estas ŝlositaj? Pro (per) la milito multaj infanoj **seniĝis** je patro. Dum la pasinta jaro dek*

novaj membroj aliĝis al nia klubo.

Kun numeraloj: Dum la pasinta jaro nia membraro duobliĝis.

Verboj: Komparu la frazojn *Mi vekigis* kaj *Mi vekis la dormantojn*. Oni ne povas diri «*Mi vekis min*», ĉar tio estas sensenca: oni povas veki aliajn, kiam ili dormas, sed sin mem oni ja ne povas veki! *-iĝi* enhavas la ideon «per si mem, aŭtomate» kaj ĉe la transitivaj verboj oni ne povas anstataŭigi ĝin per *-igi sin* aŭ nur *sin*: *La pordo fermigis* (neniu bezonis fermi ĝin, sed ĝi fermigis tute aŭtomate, per si mem). *Jus finiĝis la leciono de geografio kaj komenciĝis la leciono de Esperanto* (oni ne povas diri *leciono finis kaj komencis sin!*). *Neniu estingis la lampon, sed ĝi estingiĝis tute per si mem*. *Nur jus mi sciigis pri tio* (aŭ: *eksciis tion*). *Multe da homoj kolektiĝis ĉirkaŭ la muzikantoj*. *Kiam vi naskiĝis* («*naskis vin*» estas tute absurda!)? *Leviĝu iomete de la seĝo!*

*-iĝi* estas do refleksiva sufikso kaj servas por netransitivigi la transitivajn verbojn. Tute male al *-igi!*

Ĉe la netransitivaj verboj la senco de *-iĝi* ofte proksimiĝas al *-igi sin*, kvankam certa diferenco ĉiam restas inter ili: *Post kelktempa sidado mi stariĝis* (la ago okazas sen ia peno, kvazaŭ aŭtomate). Sed *La malsanulo stariĝis sin malrapide* signifas, ke pro la malforteco li devis streĉi sin, uzante la helpon de la manoj k.t.p. Malgraŭ tio *-igi sin* estas uzata anstataŭ *-iĝi* nome pro influo de naciaj lingvoj. En multaj okazoj la diferenco estas ja ankaŭ vere tre malgranda.

Ankaŭ la senco de prefikso *ek-*, kiu indikas komencon de ago aŭ subitan agon, ofte proksimiĝas al *-iĝi*: *Post kelktempa sidado mi ekstaris* (= komencis stari, subite staris), t.e. *stariĝis*. En ambaŭ okazoj la rezultato estas ja la sama, kaj tial kelkfoje *ek-* estas uzata anstataŭ *-iĝi*. Volante substreki, ke io okazas subite, oni ĉiuokaze devas uzi prefikson *ek-* (*ekstariĝis* = subite stariĝis aŭ komencis stariĝi; *ekstaris* = subite staris aŭ komencis stari).

**EKZEMPLOJ:** Li sidis sur seĝo, sed poste li sidiĝis sur sofo(n), kaj fine li eĉ kuŝiĝis sur la sofo. Kiam iu subite frapis sur la pordo, li rapide stariĝis. Kiamaniere estiĝis (ekestis) tiu ĉi miskompreno?

Ni atentigas ankaŭ pri la formoj *hejmeniĝi* (= hejmeniri aŭ iri hejmen) kaj *supreniĝi* (= supreniri aŭ iri supren): *Ni hejmeniĝis malfrue vespere*. *La balono supreniĝis* (= *leviĝis*) *al la ĉielo*. Sed *hejmiĝi* havas tute alian senco (iĝi hejmo aŭ iĝi hejma): *Por la*

*geedzoj la nova loĝejo jam tute hejmiĝis.*

-*iĝi* estas netransitiva (tute male al -*igi*) kaj povas sekve havi nek akuzativ-objekton, nek pasivan participon. Tiaj formoj kiel «*naskiĝita*» kaj «*estiĝita*» estas do tute neeblaj. Sed aktivajn participojn -*iĝi* kompreneble havas, same kiel ĉiuj aliaj verboj: *naskiĝiNta, estiĝiNta*.

*Iĝi* (= *fariĝi, estiĝi*) estas uzata ankaŭ kiel memstara verbo: *En la lasta tempo li iĝis (= fariĝis) tre silentema. Ĉu vi volas iĝi (= fariĝi) mia kunloĝanto?*

**Rimarko 1:** Anstataŭ *komenciĝi* kaj *finiĝi* oni renkontas kelkfoje la simplajn *komenci* kaj *fini*: *Ĝus finis la leciono de matematiko kaj komencis la leciono de geografio*. En tiaj okazoj povas temi pri mallongigoj, kie *esti* estas forlasita: *finis esti* (= *finiĝis*) kaj *komencis esti* (= *komenciĝis*). Pli regulaj estas tamen la formoj kun -*iĝi*.

**Rimarko 2:** -*iĝi* indikas kutime transiron de unu stato al alia, kaj tial oni ne bezonas uzi kun ĝi akuzativon de direkto: *Sidiĝu sur la seĝo!* Sed kelkfoje ĝi povas signifi ankaŭ transiron de unu loko al alia, kaj tiam la apliko de akuzativo estas pravigebla: *Li sidis sur seĝo, sed poste li sidiĝis sur sofoN, kaj fine li eĉ kuŝiĝis sur la sofo*. Tamen ankaŭ en tiaj okazoj oni povas tute bone uzi nominativon, kiam ne ekzistas danĝero por miskompreno (vidu ankaŭ paĝon 45 en «Lingvaj Respondoj» de D-ro Zamenhof).

**Rimarko 3:** Oni ne povas diri «*mi laviĝis, kombiĝis, raziĝis, vestiĝis*», ĉar tiuj agoj ne okazas aŭtomate, per si mem, kaj la homo ne restas pasiva ĉe tio; oni devas diri: *mi lavis min, kombis min, razis min, vestis min*.

**Rimarko 4:** *Fariĝi* havas la saman sencon kiel simpla *iĝi* (= veni en la staton): *Ŝi fariĝis malsana* (= *iĝis malsana, malsaniĝis*). *S-o B. fariĝis profesoro* (= *iĝis profesoro, profesoriĝis*) *en Ĝenevo*. Ĉar *malsana* kaj *profesoro* estas ne objektoj, sed predikataj suplementoj (vidu §§ 19, 20, 57), ili ne povas havi la finaĵon -*n*.

**Rimarko 5:** Oni devas diferencigi la formojn *interesi, interesigi* kaj *interesiĝi*: *Tio ne interesas min* = Mi ne havas intereson por tio. La saman sencon havas: *Mi ne interesiĝas pri tio. Mi interesigis lin pri tio* signifas, ke mi vekis (estigis) en li intereson por tio.

## 71. *Enlitiĝi, altabliĝi.*

Anstataŭ *Mi iris frue en la liton kaj La gastoj sidiĝis al la tablo* oni povas pli mallonge diri *Mi enlitiĝis frue kaj La gastoj altablĝis*. Komparu la diferencon inter *La patrino enlitigas* (= metas en la liton) *la infanojn* kaj *La infanoj enlitiĝas* (= iras en la liton).

**EKZEMPLOJ:** Mi ne scias, kiam mia poŝtuko elpoŝiĝis (= falis el la poso). Mi elpoŝigis (= prenis el la poŝo) naztukon. Ĉu vi ankoraŭ ne ellitiĝis (= leviĝis el la lito)? Post du-hora flugado la aeroplano alteriĝis (= venis al la tero). Falinte la knabo surpiediĝis (= leviĝis sur piedojn) denove. La ŝipo albordiĝis (= veturis al la bordo) malrapide. Enlitiĝinte mi tuj endorimiĝis (= falis en dormon, ekdormis).

## 72. Prefikso *ek-*,

kiu estas uzebla kun verbaj radikoj, ne influante ilian karakteron, indikas **komencan** de ago, **subitan** aŭ **mallonge-daŭran** agon: *Post la enlitiĝo mi tuj ekdormis. Tion aŭdinte li ekridis. Ni ekiru jam! Tio ne estas vera! Ŝi ekkriis. Fine ni ekvidis la turojn de la urbo. Nun mi ekkomprenas la aferon! La lumo ekbriletis kaj malaperis. Ŝi ekflamis tute senkaŭze. Ofte ek-* anstataŭas la pli longan *komenci*: *Mi eklernis librotenadon = Mi komencis lerni librotenadon.*

Kelkaj uzas *ek-* ankaŭ kun prepozicio *de*: *Ekde hieraŭ mi estas sola.* Pli ofte en tia okazo estas uzata tamen *depost* aŭ la simpla *de*: *depost hieraŭ, de hieraŭ.* Malofte *ek-* estas uzata eĉ kiel memstaia verbo: *Ni eku! = Ni komencu!* Kaj ankaŭ kiel speco de interjekcio ĝi estas kelkfoje uzata: *Ek al labor'! Ek al atak'!*

## **TASKO 12.**

*(Alskribu la mankantajn sufiksojn kaj mallongigu la diklitere presitajn esprimojn!)*

### **Kiel Kolumbo eltrovis Amerikon.**

Al la hispana reĝo **venis en la kapon** la ideo, ke Ameriko devas esti eltrovota. Li ven...is Kolumbon kaj demandis lin: «Kolumbo, ĉu vi povas eltrovi Amerikon?» – «Jes, mi povas!» aŭd...is la respondo.

Post kelkaj tagoj Kolumbo jam **iris en la ŝipon**, tenante

grandan ovon **en la mano**. Oni **metis en la ŝipon** ankaŭ la necesan provianton, kaj komenc...is la historia ekspedicio.

Dum la tuta vojaĝo Kolumbo sidis en la kajuto kaj penis star...i **sur la tablo** la kunprenitan ovon. Post kelkaj semajnoj li fine sukcesis pri tio, kaj tuj la kapitano sci...is al li, ke Ameriko jam vid...as. «Mi scias», respondis Kolumbo, «ĉar la ovo jam staras».

Nun la ŝipo direkt...is rekte al la lando, kaj post nelonge ili jam **venis al la bordo** en Ameriko. **Sur la bordo** staris granda amaso da indianoj. Kolumbo kun sia sekvantaro **iris el la ŝipo, iris en boaton** kaj rem...is sin **al la bordo**, kie la unuan fojon en la historio li star...is siajn piedojn sur la Amerika tero. Li proksim...is al la indianoj kaj demandis ilin: «Ĉu vi estas indianoj?» Kaj la indianoj respondis: «Jes, ni estas indianoj. Sed ĉu vi estas Kolumbo?»

Ricevinte jesan respondon, la indianoj pal...is kaj ekkriis: «Ho ve, nun ni estas eltrovitaj!»



## 73. Adverboj de tempo kaj mezuro.

1. Tempo: Anstataŭ *dum (la) nokto(j)*, *en (la) mateno(j)* oni uzas kutime la pli mallongajn *noktE* kaj *matenE*: *Nokte ni dormas kaj tage ni laboras*. Same: *vesperE*, *dimanĉE* (= *dum dimanĉo*, *en dimanĉo*), *lundE*, *monatE* (= *en monato*, *dum monato*), *jarE*, k.t.p. Tiuj ĉi adverboj respondas al la demando **kiam?** Krom la derivitaj adverboj ekzistas tuta serio da originaj adverboj kun la (pseŭdo)finaj -aŭ: *hieraaŭ*, *hodiaaŭ*, *morgaaŭ*, *baldaŭ*, k.t.p. (Ankaŭ parto de la prepozicioj havas la finaĵon -aŭ: *antaŭ*, *ĉirkaŭ*, *kontraŭ*, *anstataŭ*, *laŭ*, *malgraŭ*.)

2. Mezuro: Tiuj ĉi adverboj respondas al la demando **kiom?** *La dikulo manĝas tro multE*. *Hodiaŭ mi skribis nur malmultE*. *Mi devis longE atendi vin*. Tien ĉi apartenas ankaŭ la serio *iom*, *tiom*, *ĉiom*, *neniom*, *kiom*, dum la serio *iam*, *tiam*, *ĉiam*, *neniam*, *kiam* estas adverboj de tempo.

## 74. Silentemaj fiŝistoj.

Sabate matene maljuna fiŝisto (fiŝkaptisto) kun sia filo kaptis fiŝojn surmare. Ĉar la fiŝistoj neniam ŝatas multe babili, ankaŭ niaj herooj laboris silente kiel fiŝoj. Nur tagmeze, kiam kelkaj nubetoj aperis ĉe la horizonto, la filo diris al la patro: «Ŝajnas al mi, ke baldaŭ pluvos». La patro rigardis supren, sed li respondis nenion.

Tiel pasis la tuta tago. Dimanĉe ili ripozis, sed silentis kiel kutime. Lunde ili denove fiŝkaptis, sed same senparole kiel antaŭe. Pasis ankaŭ mardo, merkredo, ĵaŭdo kaj vendredo. Nur vendrede vespere, kiam jam vere pluis, la patro viŝis permane la frunton kaj respondis al la filo: «Jes, vi pravas».

## 75. Je.

Kiel jam dirite (§ 45), ĉiuj prepozicioj havas firman senco kaj oni ne povas ilin uzi en alia senco ol ili origine havas. Sed kelkfoje okazas, ke la senco de la frazo ne montras klare, kiun prepozicion oni devas elekti, aŭ neniu el la prepozicioj taŭgas por tiu celo. En tia okazo la naciaj lingvoj uzas kiun ajn prepozicion (en figura senco), fiksitan de la tradicioj. D-ro Zamenhof solvis tiun ĉi problemon per enkonduko de la ĝenerala prepozicio *je*, kiu ne havas firman senco kaj estas uzbla en ĉiuj dubaj okazoj.

**EKZEMPLOJ:** *Ĉu vi kredas je Dio (= ke Dio ekzistas)?* Neniu alia prepozicio taŭgas en tiu ĉi okazo. *Kredas al Dio* kaj *kredas Dion* (= kredas, kion Dio diris) havas ja alian senco. Same la esprimoj *fidas lin*, *fidas al li* kaj *fidas je li* ne estas egalaj: *Mi fidas lin* (= fidas al li), *ĉar li estas honesta homo*. *Mi fidas je li*, *ke li ne lasos min en embaraso*. Sed ne trouzu *je* kaj apliku ĝin nur en okazo de vera bezono! Tiuj okazoj ne estas multaj.

*Li esperis je sia bonŝanco* (t. e. ke la bonŝanco ne trompos lin). *Mi sopiras je* (ankaŭ *pri* kaj *al*) *mia hejmlando*. *Li estas tiel* (ankaŭ *tiom*) *komika*, *ke ĉiuj ridas je* (ankaŭ *pri* kaj *al*) li. *Georgo edziĝis je* (aŭ *al*) *Margareto*. Sed ne «kun Margareto», ĉar Georgo sola edziĝis, dum Margareto edziniĝis, ne edziĝis.

*Je* estas uzata ankaŭ kun la vortoj *plena*, *malplena*, *riĉa*, *abunda*: *La vojo estas plena je ŝtonoj* (= plena de ŝtonoj, ŝtonplena). *Svedlando estas riĉa je arbaroj* (= riĉa de arbaroj, arbarriĉa). *La libro abundas je preseraroj* (= abundas de preseraroj).

Por indiki la horon, kiam oni faras ion aŭ io okazas, estas senescepte uzata *je*: *Hieraŭ mi ellitiĝis je la sepa (horo)*. *La tagmanĝo estas ordinare je la tria*. Sed kompreneble responde al la demando *kioma horo (estas nun)?* ĝi ne estas uzata: *Nun estas la kvina (horo)*.

## 76. Akuzativo anstataŭ prepozicioj.

En § 17 ni havis kelkajn netransitivajn verbojn kun akuzativobjekto, kvankam laŭregule ili ne devus ĝin havi: *Ĉiu iru siaN vojoN!* *Tiel li vivis siaN tutaN vivoN* k.t.p. Fakte tie ĉi tamen ne temas pri akuzativ-objekto, sed pri mallongigitaj frazoj: *ĉiu iru laŭ sia vojo* kaj *Tiel li vivis dum sia tuta vivo*. Tiuj frazpartoj, kiuj tie ĉi havas la finaĵon *-n*, estas do fakte adverbialoj! Pro la bonega kaj

praktika regulo, ke je bezono oni povas prepozicion anstataŭigi per akuzativo, ili havas la finaĵon *-n*. Tial la adverbialoj havas la formon de akuzativ-objekto, per kio malpligrandiĝas ankaŭ la diferenco inter la transitivaj kaj netransitivaj verboj, ĝis tia grado, ke kelkaj netransitivaj verboj povas havi eĉ pasivan partupon: *La tuta vojo estas jam irita. Lia vivo estas jam vivita.*

Laŭ la sama regulo oni povas anstataŭ *sopiras je ŝi, ridas pri* (aŭ *je*) *li, plaĉas al mi, apartenas al ili, ŝajnas al mi* diri ankaŭ *sopiras ŝin, ridas lin, plaĉas min, apartenas ilin, ŝajnas min*. Tamen la prepoziciaj formoj estas kutime preferindaj, ĉar ili estas pli simplaj kaj klaraj.

Jam pli ofte oni povas anstataŭ *pardonu al mi, mi dankas al vi, li demandis al si, infanoj demandas pri ĉio, li instruos al ni, li instruas pri geografio* diri *pardonu miN, mi dankas viN, li demandis ŝiN, infanoj demandas tioN, li instruos niN, li instruas geografioN*. Sed ĉiam oni devas eviti duoblan akuzativon! Oni ne povas do diri «*pardonu min mian eraron*», «*li demandis ŝin tion*», «*li instruos nin geografion*», «*donu min*», ĉar tio havus tute alian sencon. Komparu frazojn *Donu al mi akvoN* kaj *Donu miN al akvo*.

## 77. Akuzativo de tempo.

Laŭ la supra regulo, ke prepozicio povas esti anstataŭigata per akuzativo, okazas ankaŭ la sekvantaj mallongigoj: *Mi promenis dum longa tempo = Mi promenis longaN tempoN. Ŝi ploris dum tagoj kaj noktoj = Ŝi ploris tagojN kaj noktojN* (aŭ *tagE kaj noktE*). *Li dormis dum sep horoj = Li dormis sep horojN. Ŝi funebris dum tri jaroj = Ŝi funebris tri jarojn. En iu bela tago mi renkontis ŝin = IuN belaN tagoN mi renkontis ŝin. Dum (en) la pasinta somero mi biciklis multe = La pasintaN someroN mi biciklis multe. D-ro Zamenhof naskiĝis en (je) la dekkvina de Decembro 1859 = D-ro Z. naskiĝis la dek kvinaN de Decembro 1859.*

En la sama maniero estas indikata la dato en la leteroj: *Moravska Ostrava, la triaN (3-aN) de Januaro 1937.*

Tiuj ĉi akuzativoj kompreneble estas ne objektoj, sed adverbialoj. Tial oni povas anstataŭigi ilin per adverboj: *Ŝi ploris tage kaj nokte. Mi promenis longtempe (= longan tempon). Mi ofte banis min pasintsomere (= la pasintan someron)*. Sed memkompreneble oni ne povas diri «*iu-beltage*» anst. *iun belan tagon* kaj ankaŭ ne

«*sephore*» anst. *sep horojn*.

**Rimarko:** Tia frazo kiel «*Sep jarojn estas longa tempo*» estas erara, ĉar *sep jaroj* en tiu ĉi okazo estas ne adverbialo, sed subjekto, kaj la subjekto ja neniam povas havi la finaĵon *-n*. Do: *Sep jaroj estas longa tempo*. Ankaŭ «*longan tempon*» ne estus ĝusta, ĉar ĝi estas ja predikata suplemento, kiu ankaŭ neniam povas esti akuzativa.

## 78. Akuzativo de mezuro.

Akuzativo estas uzata anst. prepozicio ankaŭ por indiki mezuron: *La monto estas du mil metrojn (= je 2000 metroj) alta. La rivero estas ducent kilometrojn longa. Li estas tri jarojn (= je tri jaroj) pli aĝa ol lia frato. La valizo estis dek kvin kilogramojn peza.*

La esprimoj *2000 metrojn* k.t.p. estas ne objektoj, sed adverbialoj, kaj ili tute ne rilatas al la verbo *esti*, sed al la vortoj *alta, longa, aĝa, peza*: *2000 metrojn alta, 15 kilogramojn peza*. Oni povas diri ankaŭ: *alta 2000 metrojn, longa 5 kilometrojn*, k.t.p.

**Rimarko:** La frazo «*Mia aĝo estas 32 jarojn*» estas erara, ĉar *32 jaroj* estas ne adverbialo, sed predikata suplemento. Tial: *Mia aĝo estas 32 jaroj*. Same: *Kvin frankoj kuŝas sur la tablo*. Ne «*kvin frankojn*», ĉar ĝi estas subjekto.

## 79. Resumo de la akuzativo.

Akuzativo estas uzata en jenaj okazoj:

1. Kiel rekta objekto de transitiva verbo: *Elefanto havas longan nazon. Ŝi mi amas. Li ne komprenas tion.*

2. Por esprimi celon de movo: *Mi iras hejme. Ŝi iras en la kontoron. Muso kuris sub la lito. Li devis veturi Berlino.*

3. Anstataŭ prepozicioj:

a) *sopiras ŝin* (je ŝi, pri ŝi), *ridas lin* (je li, pri li), *esperas tion* (pri tio), *sciigas lin* (al li);

b) por indiki tempon (anst. *dum, en, je*): *longa tempo* (*dum longa tempo*), *sep jarojn* (*dum sep jaroj*), *iu bela tago* (*en iu bela tago*), *la 14-a de Aprilo* (je la 14-a de Aprilo).

c) por indiki mezuron (anst. *je*): *2000 metrojn alta, 5 kilometrojn longa, 32 jarojn aĝa*.

En ĉiuj aliaj okazoj estas uzata nominativo. Atentu speciale la

subjekton, predikatan suplementon kaj la prepoziciajn formojn!

## 80. Kiel.

Post *kiel* oni povas laŭbezone uzi nominativon aŭ akuzativon, depende de tio, kion oni volas esprimi:

*Mi ŝatas lin kiel homo* (kiel homo rilatas al la subjekto *mi*). *Mi ŝatas lin kiel homoN* (kiel homoN rilatas al la objekto *lin*). *S-o Verdo laŭdis lin kiel prezidanto* (= s-o Verdo estas prezidanto). *S-o Verdo laŭdis lin kiel prezidantoN* (= ne s-o Verdo estas prezidanto, sed tiu «li», kiun li laŭdis). *La kolonelo riproĉis lin kiel oficiro* (= la kolonelo riproĉis lin en oficira maniero, en sia rolo de oficiro). *La kolonelo riproĉis lin kiel oficiroN* (= la kolonelo riproĉis lin en lia rolo de oficiro). Do la senco varias laŭ tio, ĉu ni uzas nominativon aŭ akuzativon.

## 81. Anstataŭ kaj krom.

Same ankaŭ kun la prepozicioj *anstataŭ* kaj *krom* oni uzas kaj nominativon kaj akuzativon, depende de tio, ĉu ili rilatas al subjekto aŭ objekto. En la lasta okazo temas fakte pri mallongigita frazo, kie la akuzativa formo estas objekto de la eliminata verbo.

### Anstataŭ.

*Anstataŭ la knabo la patrino batis la hundon* (t. e. ne la knabo, sed la patrino batis la hundon). *Anstataŭ la knaboN la patrino batis la hundon* (= anstataŭ bati la knabon la patrino batis la hundon, t.e. la patrino batis ne la knabon, sed la hundon). *KnaboN* estas tie ĉi rekta objekto de la subkomprenata verbo *bati*, kaj tial havas la finaĵon *-n*. *Li vizitis la onklon anstataŭ la onklino* (la onklino ne povis viziti la onklon, tial li faris tion). *Li vizitis la onklon anstataŭ (viziti) la onklinoN* (t.e. li iris ne al la onklino, sed al la onklo). *Hodiaŭ li laboris anstataŭ sia amiko. Anstataŭ (trinki) kafoN, ni trinkis bieron*. En la lasta frazo oni povas diri ankaŭ *anstataŭ kafo*, ĉar ia miskompreno ja okazi ne povas.

### Krom.

*Krom Karlo (ankaŭ) mi vizitis kinon* (t.e. Karlo vizitis kinon kaj ankaŭ mi faris tion). *Krom KarloN mi vizitis kinon* (= mi vizitis kaj Karlon kaj kinon). *Krom la knabo (ankaŭ) la patrino batis la*

*hundon* (ili ambaŭ batis). *Krom la knaboN la patrino batis (ankaŭ) la hundon* (= ŝi batis kaj la knabon kaj la hundon).

Ankaŭ tie ĉi *Karlon* kaj *knaboN* estas fakte objektoj de eliminata verbo: *Krom viziti KarloN mi vizitis kinon. Krom bati la knaboN la patrino batis ankaŭ la hundon. Krom lerni EsperantoN ŝi lernas ankaŭ la italan lingvon*. Sed en la lasta frazo oni povas diri ankaŭ simple *krom Esperanto*, ĉar ia miskompreno ja tamen okazi ne povas.

**Rimarko:** *Krom* havas ankaŭ alian sencon, tute malan al la supra: *Krom fakturoj mi legas ĉion* (= mi legas ĉion, escepte fakturojn). *Mi vizitis ĉiujn nordajn landojn krom Danujo* (t.e. nur en Danujo mi ne estis).

### **TASKO 13.**

(Alskribu la finaĵon *-n*, kie ĝi estas necesa!)

#### **Somera vojaĝo.**

La lasta jaro miaj instruistoj metis en mia kapo tro multe da gramatikaj reguloj kaj tial mi sentis mi preskaŭ malsana. Mi vizitis fama kuracisto, kiu malkaŝis al mi la grava sekreto de la sano, dirante al mi: vi devas forgesi ĉio, kio vi lernis. Plena de ĝojo pro tiu saĝa konsilo, mi decidis fari longa vojaĝo tra la plej bela lando de la mondo: mia patrolando .

Kun kelke da bonaj kamaradoj la tridek-unua de Junio mi forveturis per rapida vagonaro al la vilaĝo Katvosto, kie estas la moderna kastelo de la mezepoka kavaliro Fortbrak. La vagonaro tuta horo kuris preter urboj kaj arbaroj kaj poste dudek minutoj inter senarbaj rokoj .

La kastelo kuŝas tri kilometroj ekster la vilaĝo . Kun batantaj koroj ni eniris inter la malnovaj muroj de la kastelo, de kie blovetis la vento de la historio. Irinte tra malvastaj koridoroj kaj krutaj ŝtuparoj, ni atingis la granda salono. En tiu impona ĉambrego, kiu oni iam uzis por festenoj, staras granda ŝranko. Ĝi estas 9 metroj alta, 7 metroj larĝa kaj 837 kilogramoj peza. La gardisto de la kastelo rakontis, ke malantaŭ la ŝrankego en la muro estas sekreta pordo, tra kiu kavaliro Fortbrak kun sia juna edzino forkuris por savi sia vivo de la malamikoj, kiam li estis 99 jaroj aĝa. Li estis tiom forta, ke li povis per unu sola

ŝranko formovi la ŝranko .

Kontraŭ la ŝranko sur la muro pendis portreto de la kavaliro, pentrita laŭ malnova foto. Mi enrigardis malantaŭ la portreto por vidi la dua sekreta pordo, sed mi vidis nur araneaj retoj kun sekaj kadavroj de muŝoj, kiuj ne sukcesis savi sia vivo.

Apud la salono estas la dormoĉambro. Kiam ni eniris, ĉarma museto saltis de la tablo kaj kuris sub la lito, ĉar sub la mebloj estas la sekretaj pordoj de la musoj. La gardisto klinis si kaj prenis de sub la lito grava historia objekto: la pantofloj de kavaliro Fortbrak. Ni rigardis ili kun admiro kaj respekto.

Krom la salono kaj dormoĉambro ni rigardis ankoraŭ kvar ĉambroj, sed anstataŭ la turo, kiu estas proksimume 84.693 milimetroj alta, ni vizitis la kelo, kiu ne havas fenestro. Tie mi metis mia vizitkarto sur la pordo. Post tio ni revojaĝis hejme, ĉar ni ne havis plu mono kaj tempo. Hejme mi sentis mi denove sana kaj freŝa, kaj tuj mi decidis, ke la venonta somero mi daŭrigos mia interesa kaj agrabla vojaĝo .

\*

La teksto de tiu ĉi tasko apartenas al internacia Cseh-instituto de Esperanto, kun kies afabla permeso ni mallongigite reprenis ĝin. La instituto (Riouwstraat 172, DEN HAAG, Nederlando) havas tutan serion da similaj taskoj pri diversaj gramatikaj detaloj, kaj ankaŭ en ĝia gazeto «La Praktiko» ofte aperas utilaj kaj interesaj ekzercoj.

# DEK-DUA LEClONO

## 82. Verboj.

En multaj lingvoj la verboj havas apartan finaĵon por ĉiu persono kaj tial estas uzablaj ankaŭ sen pronomo. Sed en Esperanto ĉiuj personoj (*mi, vi, li, ni, ili*) havas la saman finaĵon (*-as, -is, -os, -us, -u*) kaj kiam mankas subjekto, ni ne scias, pri kiu persono temas. Kion signifas «*skribas leteron, iris hejmen, lernos Esperanton*»? Tiaj esprimoj ne estas kompreneblaj, ĉar ni ne scias, kiu skribas leteron, kiu iris hejmen, kiu lernos Esperanton. Tial la verbon devas ĉiam akompani konforma pronomo aŭ substantivo, kion atentu precipe la slavoj, italoj, hungaroj, finnoj, estonoj k.a.

**Rimarko 1:** Kiam la frazo havas plurajn predikatojn, ne estas necese antaŭ ĉiu el ili ripeti la subjekton: *Hejme mi legas, skribas, aŭskultas radion, ludas kun la infanoj, ripozas k.t.p.* Ofte ne estas necese ripeti la subjekton ankaŭ tiam, kiam du frazoj estas disigitaj per *sed*, precipe, kiam ili estas mallongaj: *Mi volas, sed ne povas.*

**Rimarko 2:** Ekzistas tuta vico da **senpersonaj verboj**, kiuj ne havas subjekton kaj kun kiuj oni ne povas uzi iun pronomon: *pluvas, negas, hajlas, fulmas, tondras, frostas, ŝajnas al mi, okazas kelkfoje, estas necese, estas konate, se plaĉas al vi*, k.t.p. Oni ne povas ja demandi «*kiu pluvas?*» Do ne estas ankaŭ eble diri «*ĝi pluvas*». Multaj naciaj lingvoj uzas en tia okazo «formalan subjekton», kiu mankas en Esperanto.

## 83. Tempo de la verboj.

La tempo de la verboj estas uzataj en Esperanto logike kaj oni ne rajtas intermiksi ilin, kiel ofte okazas en la naciaj lingvoj, uzante pasintecon, kiam fakte temas pri nuna tempo, kaj estantecon, kiam oni parolas pri venonta tempo: *Mia amiko skribis, ke antaŭ kelkaj semajnoj li estis malsana, sed ke nun li denove estas sana kaj*



*espereble ankaŭ restos sana, se nenio eksterordinara okazos. Vespere mi vizitos vin, se mi havos tempon. Ĉu vi konas la viron, kiu staris antaŭ la montrofenestro kaj nun transiras la straton? La knabino montris al ni sian grandan pupon, kiu povas fermi kaj malfermi la okulojn kaj pli frue povis eĉ diri la vorton «mama».*

En la naciaj lingvoj la uzado de la tempoj ofte ne estas logika, sed dependas de la kunteksto kaj de certaj reguloj, kiuj ne estas egalaj inter la diversaj lingvoj. Tio ĉi koncernas precipe la t.n. nerektan parolon, kiu en kelkaj lingvoj havas tre komplikitajn regulojn pri la sinsekvado de la tempo.

**Rekta parolo** nomiĝas tio, kiam iu mem diras ion (*Li diris: «Tio estas bona!»*). Sed kiam oni rerakontas, kion iu diris (*Li diris, ke tio estas bona*), ni havas nerektan parolon. En la naciaj lingvoj la verbo de la nerekta parolo havas kutime alian tempon ol en la rekta parolo, dum en Esperanto oni uzas ĉiam la saman, pure logikan tempon, egale, ĉu temas pri rekta aŭ nerekta parolo: *Li diris: «Tio estas vera!»* kaj: *Li diris, ke tio estas vera. Ŝi senkulpigis sin: «Mi ne venis, ĉar mi ne havis tempon»* kaj: *Ŝi senkulpigis sin, ke ŝi ne venis, ĉar ŝi ne havis tempon. Mi opiniis: «Vi laboros morgaŭ»* kaj: *Mi opiniis, ke vi laboros morgaŭ*. Do, kiam vi ne estas certa, kiun tempon uzi en nerekta parolo, transformu la frazon je rekta parolo, kaj tiam vi vidos, pri kiu tempo temas!

Entute ne traduku la formon de la nacilingvaj verboj, sed ilian logikan enhavon, ilian sencon. Atentu ankaŭ tion, ke en la naciaj lingvoj oni ofte bezonas kelkajn vortojn por nomi iun agon, dum en Esperanto kutime sufiĉas por tio unu vorto.

**Rimarko:** Volante viviĝi okazintaĵon aŭ okazontaĵon, kvazaŭ sorĉi ĝin antaŭ la okulojn de la aŭdanto aŭ leganto, oni rakontante uzas kelkfoje nuntempon anstataŭ pasinteco aŭ estonteco: *«Mi promenis ĉe arbara rando, kaj subite mi vidas – leporo saltas el arbusto, tute antaŭ mia nazo, kaj rapide-rapide kuras tra la kampo. Elkore mi bedaŭris, ke mi ne kunhavis mian pafilon»* .

## 84. Ordono kaj deziro.

Ordonon, peton kaj deziron (imperativo-optativo) al dua persono oni esprimas kutime per *u*-verbo sen pronomo (subjekto): *Venu! Iru! Skribu, Teodoro! Lernu diligente, infanoj, kaj obeu al viaj gepatroj*. Sed por akcenti la personon oni ja povas ankaŭ uzi la pronomon: *Vi*

*restu tie ĉi kaj mi iros serĉi ilin.*

Por la ceteraj personoj (unua kaj tria) oni ĉiam devas uzi koncernan pronomon, ĉar alie ja temus pri la dua persono: *Ni legu! Kiel mi komprenu tion? Li faru, kion li volas. Ŝi mem aĉetu tion! Ili kunprenu ankaŭ siajn infanojn.*

Ĉiam, kiam temas pri ordono, peto aŭ deziro, la verbo devas havi la finaĵon *-u* ankaŭ en nereкта parolo, ĉe kio validas la supra regulo, ke en nereкта parolo la verbo (predikato) devas havi la saman formon kiel en rekta parolo: *Mi deziras, ke vi tagmanĝU* (nek *-os* nek *-us* taŭgas, ĉar temas ja pri deziro!) *kun mi*. Rekta parolo: *TagmanĝU kun mi!* Same restas, kiam la predikato de la ĉefa frazo havas iun alian tempon: *Mi deziris, ke vi tagmanĝU kun mi. Mi dezirus, ke vi tagmanĝU kun mi.* K.t.p.

Pliaj ekzemploj: *La bibliotekisto petis, ke oni reportU ĉiujn librojn. La instruisto ordonis, ke la lernantoj stariĝU. La gepatroj volas, ke ilia filo fariĝU elektristo. Ŝi diris, ke oni plu ne parolU pri tio. La kunveno esprimis la deziron, ke la estraro ellaborU detalan agadplanon por la venonta jaro.*

Ankaŭ post *por* ke oni ĉiam uzas imperativon: *Li ŝlosis la biciklon, por ke oni ne ŝtelU ĝin. Skribu tuj, por ke la letero alvenU ĝustatempe.*

**Rimarko:** Pro sia nacia lingvo kelkaj uzas infinitivon anstataŭ imperativo: «*Silenti! Ne kraĉi sur la plankon!*» Sed tio ne estas ĝusta, ĉar per infinitivo oni ne povas esprimi ordonon aŭ deziron. Do: *Silentu! Ne kraĉu sur la plankon!* k.t.p. Volante esti speciale ĝentila, oni uzas la vorton *bonvolu*: *Bonvolu silenti! Bonvolu ne kraĉi sur la plankon!*

## 85. Predikativo.

En §§ 19, 20 kaj 57 ni jam pritraktis la predikatan suplementon, sed nur en rilato kun verbo *esti*: *Oslo estas urbo. La ĉambro estas varma, Tie ĉi estas mallume.* Sed predikatan suplementon povas havi ankaŭ pluraj aliaj verboj: *igi, iĝi, fari, fariĝi, kredi, opinii, supozi, konsideri, ŝajni, ŝajnigi, vidi, aŭdi, nomi, elekti, titoli, montriĝi* k.a.

**EKZEMPLOJ:** *La patrino faris la ĉambron pura. Oni elektis lin prezidanto. Oni nomas ŝin Rozino. Ĉiuj titolis lin*

*profesoro, sed poste li montriĝis simpla instruisto. Ho, kiel granda vi jam fariĝis! La almuzulo ŝajnis sin blinda. Oni konsideris tiun difekton tute sensignifa. Hejtu la ĉambro varma!*

Verdire tie ĉi temas pri mallongigitaj frazoj, ĉar en la plej multaj okazoj oni povas supozi, ke la verbo *esti* estas forlasita: *La almuzulo ŝajnis sin esti blinda. Oni konsideris tiun difekton esti sensignifa. Oni elektis lin esti prezidanto aŭ: ke li estu prezidanto. ,Hejtu la ĉambro tiel, ke ĝi estu varma.* Estas do denove la kutima *esti*, al kiu la predikata suplemento rilatas.

La frazon *Mi vidis, ke la knabo kuras* oni povas mallongigi je *Mi vidis la knabon kuri*, aŭ *kuranta*, *Ŝi aŭdis, ke la patrino kudras* = *Ŝi aŭdis la patrino kudri*, *Ni kredis, ke ili dormas* = *Ni kredis ilin dormi (dormantaj)*. *Ŝajnas, ke li jam venis* = *Li ŝajnas esti jam veninta*. *Ŝajnas, ke la kunveno estas jam finita* = *La kunveno ŝajnas esti jam finita*. Ankaŭ la partecipa predikata suplemento rilatas al verbo *esti*, kvankam ne ĉiam oni ĝin uzas: *Mi vidis la knabon esti kuranta*.

Kiel dirite, la predikata suplemento neniam povas esti akuzativa, kaj la ĵus pritrakitaj partecipaj formoj, kiam ili ekhavas la finaĵon *-n*, ne estas plu predikataj suplementoj, sed jam atributoj, kaj la tuta frazo ekhavas alian sencon: *Mi vidis la knabon kurantaN* - estas ja egala al: *Mi vidis la kurantan knabon*, *Mi kredis la viron dormanta* = *Mi kredis, ke la viro dormas*. *Mi kredis la viron dormantaN* = *Mi kredis la dormantan viron*. La diferenco estas ja granda!

Jam supre ni vidis, ke anstataŭ akuzativo kun partecipo (*Mi vidis la knabonN kuranta*) oni povas uzi ankaŭ akuzativon kun infinitivo: *Mi vidis la knabonN kuri*, *Ŝi aŭdis la patrinoN kudri*, *Ni kredis ilinN dormi*, *La nutristino igis la infanojnN manĝi*.

Anstataŭ *igi manĝi* oni kompreneble povas diri *manĝigi*, sed ĉe tio atentu, ke la lasta havas du sencojn: *igi manĝanta* kaj *igi manĝata*. Ekzemple *La vilaĝano manĝigas* (= nutras) *sian ĉevalon per aveno* kaj: *La vilaĝano manĝigas* (= donas por manĝi) *avenon al sia ĉevalo*. Same *trinkiĝi*, *sciigi*, *konigi* k.a. transitivaj verboj: *Mi sciigis* (= informis) *lin pri la novaĵo*. *Mi sciigis la novaĵon al li*.

*Mi vidis la knabon kurantE* signifas: dum mi kuris, mi vidis la knabon. Ekzistas do 3 diversaj eblecoj, kiujn oni devas bone diferencigi:

1. Mi vidis la knabon kuranta = Mi vidis la knabon kuri = Mi vidis, ke la knabo kuras.
2. Mi vidis la knabon kurantaN = Mi vidis la kurantan knabon.
3. Mi vidis la knabon kurantE = Kurante mi vidis la knabon.

## **86. Prepozicioj kun infinitivo.**

Konforme al sia esenco la prepozicioj povas esti uzataj nur kun substantivo aŭ pronomo. Sekve oni ne povas diri «*kun saluti, dum tagmanĝi*» aŭ simile, sed nepre *kun saluto, dum tagmanĝo*, t.e. oni devas substantivigi la verbon.

Tamen kelkaj prepozicioj, nome *anstataŭ, krom, por, antaŭ* (kune kun *ol*) kaj kelkfoje ankaŭ *sen* estas uzataj ankaŭ kun infinitivo.

### **Anstataŭ:**

*Anstataŭ ripozu, li laboris. Anstataŭ iri hejmen, mi iris en kafejon. Anstataŭ viziti la kongreson, ŝi aĉetis al si novan robon.*

### **Krom:**

*Ŝi volas fari nenion alian krom kanti kaj muziki = Ŝi volas fari nenion alian krom kantado kaj muzikado = Ŝi volas nur kanti kaj muziki.* Vidu ankaŭ § 81.

### **Antaŭ ol:**

*Antaŭ estas uzebla kun infinitivo nur kune kun ol (analogie al post kiam kelkaj uzas antaŭ kiam anstataŭ antaŭ ol): Antaŭ ol ekdormi, mi legis dum duonhoro. Antaŭ ol manĝi, la infano kunmetis la manojn kaj preĝis. Antaŭ ol paroli, oni devas pensi.*

Same bone oni povas diri: *Ekdormonte mi legis aŭ Antaŭ la ekdormo mi legis.*

### **Sen:**

*Li foriris sen ion diri.* Kutime oni tamen diras *Li foriris nenion dirante (dirinte).*

## **87. Vi kaj ĉi.**

Same kiel angle ankaŭ en Esperanto estas uzata nur unu pronomo por la dua persono (*vi*) egale, ĉu temas pri unu aŭ multaj personoj, ĉu oni alparolas fremdulon aŭ amikon, altrangulon aŭ almozulon, plenkreskulon aŭ infanon, homon aŭ beston. En leteroj kelkaj

skribas ĝin per granda komenclitero (*Vi*), sed tio ne estas imitinda.

La familiara kaj intima «*ci*» estas uzata nur en esceptaj okazoj, precipe por traduki iun nuancon de nacia lingvo (ankaŭ verbe: *cii* = *diri ci*). Pro la malofta uzado ĝi impresas fremde, malvarme, repuŝe, tute ne intime kaj familiare. Tial laŭeble evitu ĝian uzadon, des pli, ke per tio multe gajnas la facileco kaj internacia unueco de nia lingvo, ĉar la uzado de *ci* kaj *vi* estas tre malegala en la diversaj lingvoj kaj ĉiu popolo uzas ilin alimaniere: ekz. la francoj diras «*vi*» eĉ al infano, dum la svedoj diras «*ci*» eĉ al persono, kiun ili la unuan fojon renkontas, se li estas proksimume samranga.

## 88. *Oni.*

La senpersona pronomo *oni* estas kutime uzata ununombre: *Vespere oni estas laca* (sed laŭbezone oni povas diri ankaŭ *lacaĵ*). La formo «*onij*» estas kompreneble neebla. Same kiel la ceteraj pronomoj, ankaŭ *oni* povas esti uzata adjektive (*onia*) kaj akuzative (*onin*), sed bezonon pro tio oni havas malofte.

## 89. *Si.*

Kiam la ago celas la saman personon, kiu ĝin plenumas, t.e. kiam tiu, kiu estas subjekto, samtempe estas ankaŭ objekto, oni uzas refleksivan pronomon. Por la unua kaj dua persono speciala formo de refleksiva pronomo ne ekzistas, sed oni ripetas la personan pronomon, same kiel en multaj aliaj lingvoj: *Mi amas min. Ni gardu nin! Vi trompas vin mem.*

Por la tria persono (*li, ŝi, ĝi*) kaj por *oni* la refleksiva pronomo estas *si*: *Li lavis sin per malvarma akvo. Ŝi rigardis sin en spegulo. Tie ĉi oni povas bani sin. La profesoro forgesis siajn galoŝojn en la teatro. La hundo amas sian mastron.* Por la unua kaj dua persono *si* uzebla ne estas. Do neniam «*ni lavis sin*» aŭ simile, sed *ni lavis nin*.

Estas granda diferenco inter la frazoj *Li prenis la horloĝon el sia poŝo* kaj *Li prenis la horloĝon el lia (aŭ ŝia) poŝo*. En la unua okazo la pronomo (*sia*) rilatas al la subjekto (t.e. li prenis la horloĝon el sia propra poŝo), dum *lia* montras, ke li prenis la horloĝon el fremda poŝo. Do, por konservi sian bonan nomon kaj eviti malagrablajojn kun polico, oni devas bone diferencigi inter *sia* kaj *lia* aŭ *ŝia* poŝo!

*Si, sin* kaj *sia* devas rilati ĉiam al la subjekto de la sama frazo, kie

ili troviĝas. Bedaŭrinde pro influo de naciaj lingvoj, kie oni ne diferencigas inter «*sia*» kaj «*lia*», kelkaj trouzas ilin kaj diras ekz. «*Li diris, ke sia patro estas malsana*», kiam fakte tute ne temas pri refleksiva pronomo kaj devas esti *Li diris, ke lia patro estas malsana*. Ĉar *lia* rilatas ja ne al la subjekto de la sama frazo (*patro*), sed al la subjekto de tute alia frazo (*li diris*).

Kelkaj uzas *si* ankaŭ en reciproka senco: *Ili batis sin*. Sed tio estas erara, ĉar fakte *ili batis sin* signifas, ke ĉiu el ili batis sin mem! La ĝustaj formoj estas: *Ili batis unu la alian* aŭ *Ili batis sin reciproke*. *La gefianĉoj amas unu la alian* = *La gefianĉoj amas sin reciproke*.

En la esprimoj *singarda*, *sinmortigo*, *siatempe*, *siavice* k.t.p. *si* estas neŝanĝebla, egale, al kiu persono ĝi rilatas: *Ni devas esti singardaj* (ne «*ningardaj*»!). *Mi pensis kelkfoje pri sinmortigo* (ne «*minmortigo*»). *Siatempe* (ne «*viatempe*») *vi havis tute alian opinion*.

Atentu tion, ke oni ne rajtas ĉiam laŭvorte traduki el la naciaj lingvoj, kie la refleksivaj pronomoj kelkfoje estas uzataj en okazoj, kie en Esperanto estas necesa nenia refleksiva pronomo, kaj kie pro manko de konforma afikso ili estas ofte uzataj ankaŭ en la senco de *-iĝi*: *Sidiĝu! Li kuŝigis*.

## TASKO 14.

(Alskribu la finaĵojn kaj komencliterojn, kie ili mankas)

### Drinkulo kaj porkino.

Mikaelo Botelkorko est... granda drinkulo: anstataŭ ir... hejmen el la fabriko, li sid... preskaŭ ĉiuvespere en drinkejo por dronig... ..iajn zorgojn en brando kaj biero. Sed interese: ju pli ofte li vizit... la drinkejon, des pli grandaj iĝ... ..iaj zorgoj kaj mizero! Ofte ...ia edzino est... devigata malfrue nokte venig... lin hejmen el la drinkejo, kvankam ĉiumatene ŝi pet..., ke hodiaŭ li ne ir... tien, sed rekte ven... hejmen.

Iun matenon, antaŭ ol ir... al la laboro, Mikaelo promes... al ...ia vivkunulino en la nomo de ĉiuj sanktuloj, ke tiun ĉi fojon li tute certe ven... rekte hejmen el la fabriko kaj eĉ ne pens... pri drinkejo. Sed, kiel kutime, la edzino dev... vane atend... lin. Fine, post noktomezo, ŝi decid... ir... por lin serĉ... kaj enig... hejmen.

Ĉar Botelkorko log... en kamparo ekster la urbeto, la edzino dev... kelkajn kilometrojn ir... laŭ la landvojo por ven... al la urbeto. Subite si ekvid... ..ian edzon, ebrian kiel porko, dorm... en fosaĵo apud la vojo, kaj apud li kuŝ... – grandan porkinon. Ŝi alir... la ĉarman kuŝantan paron kaj dir... indignite al ...ia edzo: «Fi! Ĉu vi ne hont... kuŝ... kun tia! Tuj leviĝ...!»

La porkino lev... la kapon, rigard... al la virino, stariĝ... kaj fortrot..., dum la viro rest... trankvile kuŝ...

# DEK-TRIA LEKONO

## 90. Korelativa tabelo.

		<i>i</i>	<i>u</i> = persono
			<i>o</i> = objekto
			<i>a</i> = kvalito
			<i>e</i> = loko
			<i>en</i> = direkto
			<i>om</i> = kvanto
			<i>am</i> = tempo
			<i>el</i> = maniero
			<i>al</i> = kaŭzo
			<i>es</i> = posedo
Demanda	<i>k</i>		
Montra	<i>t</i>		
Nedifina	-		
Kolektiva	<i>ĉ</i>		
Negativa	<i>nen</i>		

## 91. Kio, kiu, kia.

La serio kun la finaĵo *-o* (*io, kio, tio, ĉio, nenio*) estas veraj substantivoj (same kiel *libro, lampo*): *Tio estas bildo. Fino bona, ĉio bona. Nenio nova sub la suno. Io premas mian koron.*

Same kiel oni ne povas sencere monie apudmeti du substantivojn (ekz. «*domo patro*»), same oni ne povas ankaŭ la *io*-vortojn apudmeti al substantivoj: ili estas uzeblaj nur memstare, anstataŭ substantivoj. Sekve la esprimo «*Kion libron vi legas?*» estas erara.

Kun substantivoj estas uzeblaj la *ia*-vortoj (*ia, kia, tia, ĉia, nenia*) kaj *iu*-vortoj (*iu, kiu, tiu, ĉiu, neniu*): *Kian libron vi legas? Mi legas interesan (dikan, novan, Esperantan) libron. Kiun libron vi legas? Mi legas biblion.* Kiel la respondoj montras, *kia libro* kaj *kiu libro* ne estas egalaj: demandante per *kiA*, oni volas ekscii la ecojn (kvalitojn), demandante per *kiU*, oni volas ekscii la nomon.

Tiun ĉi diferencon inter la *ia*- kaj *iu*-vortoj oni devas bone atenti, ĉar de ili dependas la senco de la frazo: *KiAn malsanon li havas? Li havas gravan malsanon. KiUn malsanon li havas? Li havas ftizon.*



TiA homo (kia li estas) ne estas fidinda. TiU homo (kiu tie staras) ne estas fidinda. Ŝi ne fumis ĉiUjn cigaredojn (t. e. kelkajn ŝi restigis). Ŝi ne fumas ĉiAjn (ĉiaspecajn) cigaredojn, sed nur la plej bonajn.

**Rimarko:** La io-vortoj estas uzataj nur ununombre: *Per kio* (ne «kioj») iras la homoj? *Per la piedoj*.

## 92. Kunmetado kaj derivado.

Nian ĉiutagan panon donu al ni hodiaŭ. Li renkontis ŝin ĉiutage sur la strato. En la mondo ekzistas ĉiaspecaj (ĉiuspecaj, ĉiaj) homoj. Tiamaniere (= tiel) oni ne povas sukcesi. Tiutempe (= tiam) Esperanto estis ankoraŭ tute nekonata. Iufoje (iafoje, kelkiam) oni povas amuzi sin iomete. Kiomfoje mi jam diris al vi! La tiamaj (= tiutempaj) homoj estis tute aliaj ol la nunaj. Li estas dorlotita pro la ĉiamaj sukcesoj. Ili renovigis sian iaman amikecon. Antaŭ la vojaĝo al iu fremda urbo sciigu la tieajn esperantistojn pri via alveno. Kioma horo estas nun? La kasisto eksigis pro diversaj kialoj (= kaŭzoj). La brulo (= incendio) tute neniigis la domon. La tiamuloj povas rakonti interesajn historiojn pri tio.

## 93. Rilataj vortoj.

Por kunligi kaj rilatigi frazojn oni povas uzi nur la *k*-vortojn (*kiu*, *kio*, *kia*...): Tio, kion vi tie vidas, estas verŝajne ŝipo. La libro, kiu kuŝas sur la tablo, estas verda. Tia nebulo, kian ni hodiaŭ havas, estas vera Londona nebulo. Mi ne scias, kien ŝi iris. Ĉu li diris, kiam li revenos? Nun vi vidas, kiel oni kaptas fiŝojn.

Same kiel oni ne povas diri «Kion libron vi legas?» (vidu § 91), oni ne povas diri ankaŭ «La libro, kiu kuŝas sur la tablo», ĉar la io-vortojn oni ne povas ja apudmeti al substantivoj. Devas esti: *La libro, kiU kuŝas sur la tablo. La akcidento, pri kiU mi legis en la gazeto, okazis en Sovet-Unio. La papero, kiUn ni uzas, estas tre maldika. La fraŭlinoj, kiUj sidas tie, estas iom konataj al mi.*

Sed kial en la frazo *La papero, kiun mi uzas, estas maldika* la vorto *kiuN* estas akuzativa, dum la vorto *papero*, al kiu ĝi rilatas, estas nominativa? Ĉu ne devus esti: «*La papero, kiu mi uzas*»? La afero estas tia, ke tie ĉi temas fakte pri du frazoj:

1. *la papero estas maldika kaj*
2. *kiun mi uzas.*

En la unua, ĉefa frazo, *la papero* estas subjekto, en la dua, komplementa frazo, *mi* estas subjekto kaj *kiun* estas rekta objekto de la transitiva verbo *uzas*. Tial ĝi havas la finaĵon: *-n*. Alia ekzemplo: *Mi ne konas la viroN, kiu staras sur la strato*. Tie ĉi *viroN* estas rekta objekto de la transitiva verbo: *konas* kaj *kiu* estas subjekto de la komplementa frazo: *kiu staras sur la strato*. Sed nombre *kiu* devas kompreneble en ambaŭ okazoj akordi kun sia ĉefvorto: *La viroJ, kiuJn mi vidis, estis blindaJ. Mi ne konas la ViroJn, kiuJ staras sur la strato*.

**EKZEMPLOJ:** *La aŭtomobilo, kiu staras antaŭ la hotelo, apartenas al mia kuzo. La lingvo, kiuN ni lernas, nomiĝas Esperanto. Ĉu vi volas vidi la filmon, kiuN oni nun prezentas en «La ruĝa muelejo»? Neniu ŝatas homojn, kiuJ tro multe fanfaronas. Se mi havus multe da mono, mi aĉetus ĉiujn librojn, kiuJN mi vidis en la montrofenestro de la librovendejo.*

## 94. Ĉi.

La vorteto *ĉi* indikas proksimecon kaj estas uzata kun la montraj vortoj, laŭplaĉe post aŭ antaŭ ili: *tie – ĉi tie, tie ĉi; tien – ĉi tien, tien ĉi; tiu – ĉi tiu, tiu ĉi; tio – ĉi tio, tio ĉi*. Kun *tial, tiel, ties* kaj *tion* ĝi estas uzata tre malofte. Kunigi ĝin per streketo kun ĝia ĉefvorto («*ĉi-tie, tien-ĉi*»), kiel kelkaj faras, estas nenecese kaj nerekomendinde. Sed ĉe la derivado tio estas necesa kaj tiam *ĉi* devas troviĝi ĉiam antaŭ sia ĉefvorto: *La ĉi-tiea* (ne «*tie-ĉia*»!) *Esperantasocieto estas jam kvinjara*.

En adverbaj kaj adjektivaj kunmetaĵoj oni eliminis *tiu* kaj *tio* kaj uzas *ĉi* tute solan: *Ĉi-jare* («*ĉi-tiu-jare*» estus ja tro longa kaj peza!) *la rikolto estis eksterordinare bona*. Anstataŭ *ĉi-jare* oni povas diri: *en ĉi tiu jaro* aŭ: *ĉi tiun jaron* kaj anstataŭ *ĉi-jara rikolto = la rikolto de ĉi tiu jaro*. Plue: *ĉi-kune* (= kun tio ĉi), *ĉi-sube* (= ĉi tie sube), k.t.p.

Oni povas renkonti ankaŭ tiajn formojn kiel «*ĉi-libro, ĉi-homo*» k.t.p., sed ili ne estas imitindaj, almenaŭ ne en prozo.

## 95. Ajn.

*Ajn* estas uzata kutime kun la demandaj vortoj kaj havas la saman

signifon kiel *egale, indifere*nte: *Oni ne povas fidi kiun ajn* (egale kiun, indiferente kiun). *Venu kiam ajn* (egale kiam, indiferente kiam). *Ne skribu kiel ajn, sed zorge kaj pripensite*.

Kelkfoje *ajn* estas uzata ankaŭ kun aliaj tabelvortoj (*ie ajn = kie ajn, iam ajn = kiam ajn* k.t.p.) kaj eĉ tute memstare: *Ajna knabo* (= kiu ajn, kia ajn knabo) *povas tion imiti*.

*Ajn* devas troviĝi ĉiam post sia ĉefvorto, neniam antaŭ ĝi.

## 96. Komparado.

1. Egaleco estas esprimata per: *tiel – ktel, same – kiel, egale – kiel, tiom – kiom* aŭ tute simple per *kiel*: *Karpatoj ne estas tiel altaj kiel (tiom altaj kiom) Alpoj. Mi estas same aĝa kiel vi* (= samaĝa kun vi). *Mi ŝatas lin tiom kiom ŝin. Ŝi estis ruĝa kiel kankro. Weissmüller naĝas rapide kiel fiŝo*. La lastaj du frazoj estas fakte mallongigitaj: *Ŝi estis tiel ruĝa kiel kankro. Tiel rapide kiel fiŝo*.

2. Pli alta grado (komparativo) estas esprimata per *pli – ol* (malpli alta per *malpli – ol*): *Alpoj estas pli altaj ol Karpatoj. Printempe 1934 en Laponujo estis foje pli varme ol samtempe en Egipto. El du malbonaĝoj oni elektas ĉiam la malpli grandan*.

3. Plej alta grado (superlativo) estas esprimata per *plej* (plej malalta grado per *malplej*): *Elefanto estas plej granda el la bestoj. New York (aŭ Nov-Jorko) estas la plej granda urbo en la mondo. Plej grave estas, ke homoj pensu logike. Ilia malplej aĝa (= plej juna) filino nomiĝas Helve*.

Kun *plej* oni ofte uzas difinan artikolon, eĉ tiam, kiam sen *plej* oni ĝin ne uzas: *New York estas granda urbo. New York estas la plej granda urbo*.

**Rimarko:** *Pli* kaj *plej* estas memstaraj vortoj kaj estas skribataj aparte de siaj ĉefvortoj: ne «*plialta*» aŭ «*pli-alta*» kaj «*plejalta*» aŭ «*plej-alta*», sed ĉiam *pli alta* kaj *plej alta*. Sed eĉ la derivado oni devas kunskribi ilin kun iliaj ĉefvortoj: *plialtigi, plibonigi, plejkarulo*.

## 97. Kiel kaj kvazaŭ.

*Li kantas kiel Caruso (Karuzo)* signifas, ke li kantas en tia maniero (= *tiel*) kiel Caruso aŭ ke li kantas sub la nomo Caruso. *Li kantas kvazaŭ Caruso* signifas, ke li kantas tiel kvazaŭ li estus

Caruso, dum fakte li tio ne estas. *Kiel frato vi devas helpi min* (= estante mia frato; ĉar vi estas mia frato)! *Ni estas ja kvazaŭ fratoj* (= efektive ni ne estas fratoj, sed ni havas tian interrilaton kian fratoj kutime havas). *Li faris kvazaŭsciencan paroladon* (= fakte la parolado scienca ne estis, sed ĝi nur aspektis tia). En la praktiko la diferenco ofte tamen ne ludas ian rolon kaj pro sia mallongeco kiel ĉiam estas preferinda.

Post *kvazaŭ* la verbo havas kutime la finaĵon *-us*: *Li kuris, kvazaŭ fantomoj persekutus lin. La knabo skiis, kvazaŭ li estus naskiĝinta* (aŭ *naskiĝis*) *sur skioj. Ili preparis sin, kvazaŭ ili intencus veturi al la norda poluso. Li aspektis, kvazaŭ li neniam antaŭe estus vidinta* (aŭ *vidis*) *ion similan.*

## 98. *Pli kaj plu.*

La diferenco inter *pli* kaj *plu* estas tio, ke *pli* montras pli altan gradon kaj *plu* indikas daŭron: *Mi ne deziras pli (multe) da kafo* signifas, ke mi estas kontenta pri tio, kion mi jam ricevis. *Mi ne deziras plu kafon* = antaŭe mi deziris, sed nun mi ne plu deziras. *La aeroplano leviĝis pli alten* (ol ĝi antaŭe estis). *La aeroplano leviĝis plu supren* (= daŭrigis la supreniĝadon).

*Plu* estas uzata ankaŭ kun la finaĵo *-e*: *Ni iru plue!* Neces-okaze, kiam oni volas speciale akcenti direkton, oni uzas ĝin ankaŭ akuzative: *Li iris kelkajn paŝojn plueN.* Sed ankaŭ en tia okazo sufiĉas plej ofte la simpla *plue*, same kiel ankaŭ ĉe *returne* la akuzativo estas kutime superflua: *Ĉe la stratangulo li rigardis returne.*

Kelkfoje oni kunmetas *plu* kun verbo: *Post mallonga halto ni pluiris* (aŭ *iris plu, iris plue*).

## 99. *Ankoraŭ, jam, plu.*

*Ankoraŭ* havas du sencojn.

1. aldone, ree, pli: *Mi petas ankoraŭ unu tason da kafo. Mi intencas resti tie ĉi ankoraŭ kelkajn tagojn. Diru tion ankoraŭ unu fojon* (aŭ *ankoraŭfoje*)! kaj

2. ĝis nun: *La prezentado ankoraŭ ne komenciĝis. Li ne estas ankoraŭ tie ĉi. La ĉambro ne estas ankoraŭ varma.*

*Jam*: *La prezentado jam komenciĝis. Li jam estas tie ĉi. La*

*ĉambro estas jam varma.*

Krom daŭrigo, kiun ni pritraktis en la antaŭa paragrafo, plu montras kun nea vorto ankaŭ ĉesigon de ago aŭ stato: *Li ne estas plu tie ĉi. La ĉambro ne estas plu varma. Mi ne kredas plu vin.*

Kelkaj uzas en ĉiuj tri okazoj *jam*: *La infano ne jam* (= ankoraŭ ne) *ploras. La infano jam ploras. La infano jam ne ploras.* Sed pli klare estas: *La infano ankoraŭ ne ploras. La infano jam ploras. La infano plu ne ploras.* Kelkaj lokigas la vorton *ne* ĉiam antaŭ *plu*: *Mi ne plu kredas tion.*

## 100. Ĉu kaj aŭ.

Ĉiu demando devas komenciĝi per iu demanda vorto el la serio *kiu, kio...*, aŭ per *ĉu*: *Kiu faris tion? Ĉu vi komprenas?* Oni ne povas diri «*Vi komprenas?*» aŭ «*Komprenas vi?*», ĉar tio ne impresas demande. Same estas pri nerektaj demandoj (vidu § 82 pri la nereкта modo): *Mi ne scias, ĉu vi komprenas. Li demandis, ĉu mi havas tempon.*

*Aŭ* havas du sencojn:

1. alivorte: *Praha aŭ Prago estas la ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio kaj*
2. unu el ili: *Ĉu vi deziras teon aŭ kafon? Vespere mi legos aŭ skribos hejme.*

Por pli akcenti la alternativon, oni uzas *aŭ ... aŭ*: *Vespere mi aŭ legos aŭ skribos. Unu el ni devos cedi – aŭ mi aŭ vi.*

Kelkaj erare uzas en tiu ĉi okazo «*ĉu... ĉu*» kaj «*ĉu... aŭ*»: «*Unu el ni devos cedi, ĉu mi ĉu vi (ĉu mi aŭ vi)*». Ĉu estas ja demanda vorto kaj estas uzebla nur ĉe demandoj, rektaj kaj nerektaj: *Ĉu Praha estas bela? Kiu urbo estas pli bela, ĉu Praha aŭ Budapeŝto? Ĉu vi deziras teon kun rumo aŭ citrono?* Sed en la frazo «*Unu el ni devos cedi, ĉu mi aŭ (ĉu) vi*» ne troviĝas ja demando, kaj tial *ĉu* tie ne estas uzebla.

# DEK-KVARA LEKIONO

## 101. Numeraloj.

Por akiri lertecon en la uzado de la numeraloj, oni devas multe ekzerci. Kalkulu ĉiam Esperante anstataŭ en la gepatra lingvo! Dum miaj vojaĝoj en diversaj landoj mi rimarkis, ke ofte eĉ bonaj esperantistoj povas nur malfacile kalkuli Esperante kaj traduki Esperantajn nombrojn. Tio montras, ke ili ne sufiĉe ekzercis.

La fundamentaj numeraloj (*nul, unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek* k.t.p.) povas neniam havi finaĵon de akuzativo kaj multnombro. Sekve ne: «*oni vivas nur unun fojon, duj homoj promenas*» aŭ simile, sed tute simple: *Oni vivas nur unu fojon, Du homoj promenas*. Sed la substantivaj kaj adjektivaj numeraloj (*unuO, duO, triO, kvarO, unuA, duA, triA, kvarA* k.t.p.) dekliniĝas kompreneble kiel ordinaraĵoj kaj adjektivoj: *En la kafejo ni aŭskultis tirolan muziktrioN, La mastrino aĉetis du dekduoJN da ovoj, Jam la duaN fojon mi kaptis vin ĉe mensogo*. Nur la vorto *unu* povas havi multnombran finaĵon, sed nur en specialaj okazoj, kiam ĝi estas uzata pronome: *La homoj ne estas egalaj – unuJ estas blondaJ, aliaj estas nigraharaj*.

Unuojn oni ne povas kunskribi kun dekoj («*dekunu, dekdu, dektri*»), ĉar tiam oni devus laŭ la akcentregulo (ĉiam la antaŭlasta silabo havas akcenton) elparoli ilin en nenatura maniero: «*dekdu, dektri*». Ĉar la unuoj kaj dekoj estas aparte elparolataj, oni devas ilin ankaŭ skribi aparte: *dek unu, dek du, dek tri, dudek kvar, tridek ses, cent kvardek sep, okcent naŭdek kvin, tri mil kvarcent du, sepcent kvardek du mil naŭcent kvindek tri*. Kelkaj kunligas ilin per streketo: *dek-unu, dudek-tri, kvincent-kvardek-ok*. Dekoj kaj centoj estas skribataj kune (*dudek, tridek, kvincent, naŭcent*), sed la vorto *mil* devas esti skribata aparte: *dudek tri mil sescent kvin*.

La gramatikaj finaĵoj estas aldonataj en la fino de la kunmetita

nombro: *dudektria* aŭ *dudek-tria* (ne «*dudeka tria*»). En tiaj okazoj oni devas kunskribi kompreneble la tutan nombron, sed pro klareco ofte estas utile apartigi la diversajn partojn per streketoj, precipe kiam la kunmetaĵo estas tre longa: *mil-sescent-kvindek-oka*.

La nombron 1937 oni ne povas elparoli «*dek naŭcent tridek sep*» kiel emas fari la germanoj, sed oni devas diri ĉiam: *mil naŭcent tridek sep*. Tio estas multe pli klara kaj simpla.

### 102. -obl-.

La sufikso *-obl-* indikas multiplikon: *Duoble du (2x2) estas kvar. Trioble tri estas naŭ*. Ne intermiksi ĝin kun la vorto *foje*: *Mi manĝis hieraŭ trioble* signifas, ke mi manĝis trioble pli ol kutime, dum *mi manĝis trifoje* signifas, ke mi manĝis en tri tempoj – matene, tage kaj vespere. *Li estas duobla azeno* = li estas tiel malsaĝa kiel du azenoj. *Li estas dufoja azeno* = li estis azeno du fojojn. *Foj-* ne indikas do multiplikon, sed nur tempon, nombron de la fojoj, kaj ĝi ne estas uzebla anstataŭ *-obl-*.

Krom kun numeraloj *-obl-* estas uzata ankaŭ kun la radikoj *kelk*, *mult* kaj *plur*: *Kelkoble pli granda. Esperanto estas multoble pli facila ol iu nacia lingvo*.

### 103. -ono, -ope.

*-ono* estas partiga sufikso: *duono* = 1/2, 0.5, *triono* = 1/3, *kvarono* = 1/4, *dekono* = 1/10, 0.1, k.t.p. Ĝi estas uzebla nur kun numeraloj kaj oni ne povas diri ekz. «*kretono*» anstataŭ *parto de kreto*.

*-ope* estas kolekta, grupiga sufikso: *Ili promenas duope. Ni skiis triope*. Same kiel *-obl-* ĝi estas uzata ankaŭ kun la radikoj *kelk*, *mult* kaj *plur*: *Multope vojaĝi estas pli interese ol unuope. Komence mi lernis tute sola, sed nun ni lernas jam kelkope*.

### 104. Po.

La distribua divida prepozicio *po* estas uzebla nur kun numeraloj: *Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomojn. Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legis en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la libron en kvar tagoj*. Tia frazo kiel ekzemple: «*Ni veturis kvindek kilometrojn po tago*» estas do erara. Devas esti: *Ni veturis po kvindek kilometroj*

(ĉiu)tage.

Kiel montras la supraj ekzemploj, kun *po* estas uzata ĉiam nominativo, eĉ kiam temas pri rekta objekto kaj kiam la substantivo sen *po* estus akuzativa: *Al ĉiu el la infanoj oni donis tri pomojn. Al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj.* Same estas ankaŭ pri ia prepozicio ĉirkaŭ, uzata en la senco proksimume: *Mi ricevis de li ĉirkaŭ kvindek kronoj. Ni havas jam ĉirkaŭ 40 gekursanoj. Ni havas jam 40 gekursanojn.* En tiuj okazoj oni adaptas la regulon, ke la prepozicioj regas ĉiam nominativon.

Sed ĉar ĉe tio estiĝas tia nenaturaĵo, ke rekta objekto de verbo estas tute escepte nominativa, multaj uzas post *po* kaj ĉirkaŭ la saman kazon, kiun oni uzus sen ili (vidu ankaŭ §§ 47 kaj 48): *Ĉiutage estis legataj po dek kvin paĝoj* (subjekto). *Mi legis ĉiutage po dek kvin paĝojN* (objekto). *Mi donis al la infanoj po tri pomojn.* *En nia klubo estas jam ĉirkaŭ kvindek membroj* (subjekto). *Nia klubo havas jam ĉirkaŭ kvindek membrojn* (objekto).

Kelkfoje post *po* povas esti uzata ankaŭ akuzativo de direkto: *La servistino kondukis la gastojn en po unu ĉambroN.*

Prefikse *po* estas uzebla ankaŭ kun aliaj radikoj: *Ni vendas pogrande kaj pomalgrande (podetale). Li disdonacis popece sian tutan havaĵon. Ponumera vendado de «Literatura Mondo».*

**Rimarko:** *Po* kiel slavismo povas esti ankaŭ tute evitata, kiam la klareco de la esprimo ne suferas pro tio: *Al ĉiu el la infanoj mi donis tri pomojn. En ĉiu tago legos dek kvin paĝojn. Ni veturis kvindek kilometrojn (ĉiu)tage.*

## 105. Horloĝo.

Atentu la diferencon inter la frazoj *Mi skribis tri horojn. Nun estas la triA horo. Mi ekskribis je la triA (horo).*

Por ekscii la tempon, oni demandas: *KiomA horo estas?* Responde oni indikas la horojn per adjektivaj (la vorto *horo* estas kutime forlasata) kaj la minutojn per fundamentaj numeraloj:

3,05 (15,05) – *La tria (dekkvina, dek-kvina) kaj kvin minutoj;  
kvin minutoj post la tria.*

4,15 – *La kvara kaj kvarono;  
kvarono post la kvara.*

5,30 – *La kvina kaj duono;*



*duono post la kvina;*

*duono antaŭ la sesa.*

6,45 – *La sesa kaj tri kvaronoj;*

*kvarono antaŭ la sepa.*

7,50 – *La sepa kaj kvindek minutoj;*

*dek minutoj antaŭ la oka.*

Ekzistas do 3 manieroj por indiki la minutojn, kvaron- kaj duonhorojn:

1. per *kaj* (*la naŭa kaj dudek minutoj*),

2. per *post* (*dudek minutoj post la naŭa*) kaj

3. per *antaŭ* (*dudek kvin minutoj antaŭ la deka*).

La formoj «*kvarono de la deka*» kaj «*kvarono je la deka*», kiujn kelkaj uzas, ne estas klaraj kaj bonaj. Kion do signifas «*kvarono de (je) la deka*»? Ĉu kvarono post la naŭa aŭ kvarono antaŭ la deka?

Por indiki la tempon, kiam io okazas, oni uzas ia prepozicion *je*: *Je kioma horo vi enlitiĝis hieraŭ? Mi enlitiĝis precize je la dekunua (dudektria)*. Sed komencante per minutoj, oni uzas la tempan akuzativon anstataŭ *je*: *Mi enlitiĝis dek kvin minutojn post la dekunua. Ni tagmanĝis duonoN antaŭ la tria*.

Por esprimi daŭron, oni uzas *de ... ĝis*: *Mi dormis de la dekunua ĝis la sepa*.

## **106. Nek, eĉ ne unu.**

*Nek* signifas «*kaj ne*»: *Mi ne skribis al li nek intencis skribi*. Pli kategorie impresas *nek ... nek*: *Mi havas nek monon nek tempon por tio. Li nek fumas nek uzas alkoholon. Nek li nek lia edzino sciis tion. Nek hieraŭ nek hodiaŭ mi ricevis leteron. La libro estas nek sur la tablo nek en la ŝranko*.

Kelkaj uzas *nek* ankaŭ en la senco *eĉ ne unu*: «*Mi havas nek centimon en la poŝo*». Sed tia uzado estas erara.

La ĝusta formo estas: *Mi ne havas eĉ unu centimon en la poŝo*. Same: *Li ne diris al mi eĉ unu vorton* (ne «*nek unu vorton*»).

## **107. -ejo.**

Tiu ĉi substantiviga sufikso, uzebla kun ĉiaspecaj radikoj, indikas lokon, karakterizatan per la radiko: *ĉevalo* – *ĉevolejo* (= ĉevala stalo), *fojno* – *fojnejo*; *herbo* – *herbejo*; *ofico* – *oficejo*; *kafjo* – *kafejo*;

*lerni – lernejo; kuiri – kuirejo; densa – densejo.*

Atentu la diferencon inter *ejo* kaj *ĉambro*: *manĝejo* estas publika loko (restoracio), ordinare kun pluraj *ĉambroj*, dum *manĝoĉambro* estas parto de loĝejo, same kiel dormĉambro, kuirejo k.t.p. Per *-ejo* estas derivataj vortoj kun tute speciala kaj konstanta signifo: ne ĉiu loko, kie oni lernas, estas *lernejo*, kaj ne ĉiu loko, kie oni trinkas kafon, estas *kafejo*!

### 108. -ujo.

Sufikso *-ujo*, kiu estas uzata ĉefe kun substantivaj, sed ankaŭ verbaj radikoj, havas 3 sencojn:

1. vazo, ujo, skatolo, kesto, difinita por io: *mono – monujo; cigaro – cigarujo; sukero – sukerujo; kafo – kafujo; lavi – lavujo; kraĉi – kraĉujo*, k.t.p.
2. arbo, arbusto k.t.p., kiu portas fruktojn: *pomo – pomujo; sorpo – sorpujo; nukso – nuksujo; frago – fragujo; mirtelo – mirtelujo*, k.t.p. Sed ĉar *-ujo* samtempe signifas ankaŭ vazon, oni pli kaj pli ofte uzas por kreskaĵoj la vorton *arbo* (*arbeto, arbusto*): *pomarbo, pirarbo (= piruso), rozarbo, mirtelarbusto*. Tiamaniere oni povas diferencigi ankaŭ ekzemple pomvazon aŭ -korbon (= pomujo) de pomarbo, nuksovazon aŭ nuksoŝkatolon (= nuksujo) de nuksarbo, k.t.p.
3. lando, loĝata de certa popolo: *anglo – Anglujo; franco – Francujo; germano – Germanujo*, k.t.p. Krome: *patro – patrujo* (ankaŭ *patrolando* kaj *patrio*) kaj *Esperantujo* (ankaŭ *Esperantio*). Sed «*hejmujo*» ne estas uzata, sole *hejmlando*.

### 109. -ingo.

Tiu ĉi substantiva sufikso, uzata nur kun substantivaj radikoj, indikas aĵon, kiu tenas ion: *plumo – plumingo; kandelo – kandelingo; cigaredo – cigaredingo; piedo – piedingo*, k.t.p.

### 110. -ilo.

La substantiviga *-ilo* estas uzata kun verbaj radikoj kaj indikas instrumenton, per kiu oni faras ion: *tranĉi – tranĉilo; tondi – tondilo; kombi – kombilo; flugi – flugilo; armi – armilo; kovri – kovrilo* k.t.p. Ankaŭ kun la sufikso *-igi*: *vomi – vomigi – vomigilo*

k.t.p. Sed la formoj «*brosilo, biciklilo, martelilo*» k.s. estas kompreneble sensencaj, ĉar jam la originaj formoj *broso, biciklo, martelo* k.t.p. indikas ilon. Atentu ankaŭ la diferencon inter *-ilo* kaj *maŝino*: *kudrilo, kudromaŝino; skribilo, skribmaŝino*.

Same kiel *-ejo* kaj multaj aliaj sufiksoj, ankaŭ *-ilo* devenigas vortojn kun tute speciala kaj konstanta signifo: ne ĉiu ilo, per kiu oni tranĉas, estas *tranĉilo*.

# DEK-KVINA LEKIONO

## 111. De.

Origine, esence *de* signifas 'deiron', 'devenon', kaj ĝi estas uzata en jenaj okazoj:

1. Movo for de io (male al *al*): *Foriru de mi!* (sed *Venu al mi!*) *Li iris de la tablo al la pordo. Ŝi rigardis de la edzo al la edzino. Mi ricevis longan leteron de mia amiko el Varsovio.* Atentu bone la diferencon inter *de* kaj *el*: *Li venis el la aŭtomobilo* = li estis interne de la aŭtomobilo kaj venis el ĝia interno. *Li venis de la aŭtomobilo* = li estis ne en sed nur ĉe la aŭtomobilo kaj malproksimiĝis de ĝi. Tiaj frazoj kiel «*Mi ricevis leteron el mia amiko*» kaj «*Mi venas el mia amiko*» estas tute sensencaj. Devas esti *de mia amiko*.

2. Tempa deiro: *Mi dormis de la dekdua ĝis la sepa. Jam delonge (depost longa tempo, dum longa tempo) mi ne ricevis leteron de vi. De sia oka vivjaro (depost sia oka vivjaro, ekde sia oka vivjaro) la knabo vizitas lernejon. Mi laboras jam de (depost) la oka.* Anstataŭ *de* oni uzas ofte la pli precizan kaj klaran *depost*, dum *ekde* estas uzata malofte.

3. Posedo (genitivo): *La domo de la patro* (la patro estas la posedanto de la domo). *La koloro de ŝiaj haroj estas blonda. Kuzo estas filo de onklo aŭ onklino, kuzino estas filino de onklo aŭ onklino.*

4. Dato: *Hodiaŭ estas la 2-a de Februaro.* Oni ne povas diri «*la 2-a Februaro*», ĉar tio havus tute alian signifon. La unua esprimo estas mallongigo de *la dua tago de Februaro* dum la alia signifas *la dua monato Februaro*, ekzemple: *Jam la duan Februaron mi pasigas en Ĉeĥoslovakio.* Pliaj ekzemploj: *D-ro Zamenhof naskiĝis la 15-an de Decembro 1859 kaj mortis la 14-an de Aprilo 1917. Moravska Ostrava, la 21-an de Januaro.*

5. Post plena, riĉa, abunda: *Ŝi estis plena de ĝojo. Kanado estas riĉa de arbaroj. La arbo abundas de fruktoj.* Anstataŭ de oni povas uzi ankaŭ je aŭ kunmetitan vorton: *Ŝi estis plena je ĝojo aŭ ĝojplena.* Sed *da* ne estas uzebla en tiaj okazoj, ĉar plena, riĉa, abunda ne indikas mezuron.

6. Oni diras *Mi lernas EsperantoN*, sed oni ne povas diri «*Mi estas lernanto Esperanton*» ĉar lernanto kiel substantivo ne povas havi akuzativ-objekton, kiu estas privilegio de la verboj. Anstataŭe oni devas diri: *Lernanto de Esperanto. La verkinto de la libro. Gajnintoj de la konkurso.*

7. Kun pasiva participo *de* indikas la plenumanton de la ago: «*Homoj sur la tero*» estas verkita de *Stellan Engholm. La ŝuoj estas faritaj de ŝuisto. La kravato estas donacita de mia filino.* Por indiki 'ilon', per kiu io estas farita (farata, farota), oni uzas kompreneble la prepozicion *per*: *La letero estas skribita per inko. La forno estas hejtata per koakso.* Por indiki 'materialon', el kiu io estas farita, oni uzas la prepozicion *el*: *La ŝuoj estas faritaj el ledon. La domo estas konstruita el brikoj.*

8. Kvalito: anstataŭ *Li estas mezkreska aŭ li havas mezan kreskon* oni povas diri *Li estas de meza kresko. La ĉielo estas de griza koloro = La ĉielo estas grizkolora, aŭ havas grizan koloron.*

9. Kaŭzo: *En Ĉinujo multaj homoj mortas de malsato. Li estas laca de la senĉesa laborado.* Anstataŭ de oni povas same bone diri *pro: mortas pro malsato, laca pro laborado.*

10. Kun certaj adverboj de loko: *Interne de la koro li tute ne estis tiel trankvila kiel li aspektis. Ekstere de (= ekster) la urbeto estas mezepoka kastelo. Apude de (= apud) mi sidis iu strangulo. Nia klubejo estas proksime de (aŭ proksime al) la ĉefa placo. Antaŭe de (= antaŭ) la familio kuris hundeto. La ferfabriko estas transe de (= trans) la rivero. Pri tio mi eksciis nur pere de (= per) vi.*

## 112. Da.

La prepozicio *da* estas parenca al *de*, sed ĝiaj funkcioj estas multe pli limigitaj; ĝi estas uzata nur por indiki certan kvanton de io, por interligi mezuron kaj tion, kio estas mezurata: *Taso da kafo. Kilogramo da pano.* Oni ne povas diri «*taso kafo*» kaj «*kilogramo pano*» kiel en kelkaj naciaj lingvoj, ĉar en Esperanto ne estas eble tute senceremonie apudmeti du substantivojn – oni devas interligi

ilin per prepozicio: *Vespere mi trinkis nur glason da teo. Patrino aĉetis kilogramon da butero. Metro da drapo kostas tridek frankojn. Ĝi aĉetis dudekon da ovojn. Al la sveda popolo apartenas ses milionoj da homoj. Li ricevis amason da leteroj. Kiom da membroj havas via societo? En ĝiaj vortoj estis ankaŭ iom da vero. La germanoj kaj ĉeĥoj trinkas multe da (aŭ multon da) biero. En tiu ĉi tasko vi faris nur kelke da eraretoj (aŭ kelkajn eraretojn).*

Atentu la diferencon inter *da* kaj *de*: *Glaso de (aŭ por) vino (= vinglaso)* estas glaso, kiu estas uzata por vino, sed ĝi povas esti tute malplena; male: *glaso da vino* estas glaso, kiu estas plena de vino, egale, ĉu ĝi estas vinglaso aŭ iu alia glaso.

**Rimarko 1:** Kun la fundamentaj numeraloj *da* ne estas uzebla: *Tri tasoj (ne «tri da tasoj») da kafo. Dudek ovojn (ne «dudek da ovojn»)*. Sed kun la substantivaj numeraloj oni kompreneble devas uzi ĝin: *Dudeko da ovojn. Miliono da homoj (ne «miliono homoj»)*.

**Rimarko 2:** Same kiel *de*, ankaŭ *da* neniam povas esti sekvata de akuzativo; ne: «*Mi trinkis du tasojn da kafon*» sed: *Mi trinkis du tasojN da kafo*.

**Rimarko 3:** Kiam antaŭ tio, kio estas mezurata, troviĝas artikolo (*la*), oni devas anstataŭ *da* uzi *de* aŭ *el*: *Donu al mi glaseton de la (aŭ el la) vino (ne «da la vino»)*, kiun vi aĉetis hieraŭ.

**Rimarko 4:** Kun la vortoj *plena, riĉa, abunda da* ne estas uzebla, ĉar ili ne indikas mezuron. Ne «*plena da homoj*» sed *plena de homoj, homplena*.

### 113. *El*.

La diferenco inter *de* (vidu § ) kaj *el* estas tio, ke *de* indikas formoviĝon el la proksimeco de io, dum *el* indikas formoviĝon el la interno de io: *Li prenis la revolveron el la poŝo. Oni forprenis revolveron de la ŝtelisto (oni ne povas diri «el la ŝtelisto» ĉar la revolvero ja ne estis en li!). Mi ricevis leteron el Helsinki de mia amiko. Pro drinkemo li estas eksigita el la ofico. La severa patro forpelis sian filon el la domo.*

Krome oni povas distingi kelkajn specialajn okazojn, kiam *el* estas uzata:

1. Kun superlativo (en la senco *elinter*): *Kolibro estas la plej malgranda el ĉiuj birdoj. Esperanto estas la plej facila el la*

lingvoj.

2. Por indiki la materialon, el kiu io estas farita aŭ konsistas: *Bata fabrikas ŝuojn el ledo kaj ŝtofo. La forno estas farita el kaheloj. La kurso konsistas el dudek lecionoj.*
3. Por indiki la lokon, el kiu iu devenas: *Ĉu vi vidis la s-anon el Bruselo? Atentu, ke la frazo Ĉu vi vidis la s-anon en Bruselo? havas tute alian sencon! La aŭtoro de tiu ĉi libro estas el Estonio, sed nuntempe li troviĝas en Ĉeĥoslovakio.*

### 114. Por kaj pro.

La diferenco inter *por* kaj *pro* estas tio, ke *por* indikas celon, *pro* – kaŭzon: *La homoj aĉetas multe da objektoj por kristnasko. Pro kristnasko la bankoj estas fermitaj. Tiun pupon li aĉetis por sia filino. Pro sia malsana filino li havas multe da zorgoj. Kelkaj akraj vortoj estis sufiĉaj por malpaciĝo de la geedzoj. Pro la malpaciĝo la edzino ekploris. Por vi mi povas fari ĉion! Pro vi mi malfruis al la vagonaro.*

*Por* estas sufiĉe proksima al *al* (kiu esprimas direkton): *Mi mendis kafon por vi. Mi mendis kafon al vi.* La diferenco estas ja tre malgranda, kaj anstataŭ *por* oni povas preskaŭ same bone diri *al* kaj male. Sed ne ĉiam! Ekzemple la sekvantaj du frazoj tute ne estas egalaj: *Mi skribis por vi. Mi skribis al vi.* Same ne intermiksi *por* kaj *al* en la frazo *La homoj aĉetas al si multe da objektoj por kristnasko.*

Jen la diversaj nuancoj, kiujn *por* havas:

1. Prezo, por kiu oni aĉetas (abonas, mendas k.t.p.) ion, kvanto, por kiu oni pagas (donas k.t.p.) ion, kaj tempo, dum kiu io estas okazonta: *Mi aĉetis florojn por du kronoj al (aŭ por) mia edzino. La knabino petis ĉokoladon por kvindek centimoj. Mi pagis por la floroj (ne pro, ĉar la floroj estis ne kaŭzo, sed celo de mia aĉeto) du kronojn. La patro donis al sia filino kvindek centimojn por ĉokolado. La senlaborulo konsentis labori por manĝo kaj loĝo. Pro la bankroto de la entrepreno la laboristoj ne ricevis salajron por du semajnoj (aŭ salajron de du semajnoj). Oni dankis la prezidanton por (aŭ pro) lia energia laboro. Dankon por (aŭ pro) via interesa letero! Nia instruisto forveturis por kelkaj tagoj (= li forveturis kun la celo foresti kelkajn tagojn). Nia klubo abonis «Heroldon de Esperanto» por unu jaro (dum unu jaro havas tute alian sencon).*

2. Malo de kontraŭ: *Dudek kvin membroj voĉdonis por kaj nur dek voĉdonis kontraŭ la propono. Ĉiuj ĉeestantoj estis por fondo de la klubo.*
3. Certajn verbojn (*voli, deziri, povi, scipovi, devi, rajti, ordoni, promesi, permesi, komenci, fini, ĉesi, daŭri, intenci, projekti, lasi, igi, ŝajni, emi, domaĝi* k.t.p.) infinitivo sekvas senpere: *Mi volas manĝi. La infanoj komencis ludi. Ĉu mi rajtas eniri? Ĉesu jam petoli! Mi ne emas labori hodiaŭ.*

Sed multaj aliaj verboj devas esti ligataj kun infinitivo per la prepozicio *por*: *Ĉu vi venis tien ĉi por dormi? La homo naskiĝis por labori, suferi kaj morti. Ili havas nenion por manĝi. Li pafis nur por defendi sin.*

**Rimarko 1:** Kun la verboj *iri* kaj *veni* infinitivo estas uzata kaj kun *por* kaj senpere: *Mi venis por iom babili kun vi. Venu manĝi! Antaŭ nelonge ili iris (por) promeni.*

**Rimarko 2:** Kun *pro* infinitivo ne estas uzebla. Oni devas substantivigi la verbon: *Pro kurado* (ne «*pro kuri*») *li laciĝis* (aŭ: *Pro tio, ke li kuris, li laciĝis*). *Mi malfruis pro la tagmanĝo.*

**Rimarko 3:** Kun *por ke* estas ĉiam uzata imperativo: *Li ŝlosis la biciklon, por ke oni ne ŝtelu. Skribu al ŝi, por ke ŝi sciu, kie vi estas.*

**Rimarko 4:** Anstataŭ *por kio* kaj *pro kio*, kiuj inter si tamen ne estas samsencaj, oni povas diri simple *kial*: *Por kio (= kial) vi venis tien ĉi? Pro kio (= kial) vi ploras, knabeto? Anstataŭ pro tio, ke oni povas diri ĉar: Mi ne venis pro tio, ke (= ĉar) mi ne havas tempon.*



# DEK-SESA LEClONO

## 115. Al kaj en.

Anstataŭ *en la lernejoN*, *en la fabrikoN*, *en la urboN* oni povas ofte diri *al la lernejo*, *al la fabriko*, *al la urbo*, kvankam teorie tiuj formoj ne estas samsencaj.

*Al la lernejo* esprimas nur movon en la direkto de la lernejo kaj ne montras, ke oni atingas kaj eniras ĝin, dum *en la lernejon* indikas, ke oni haltas nur interne de la lernejo. Sed en la praktiko tiu diferenco ludas ofte nenian rolon, ĉar la lingvo ne estas ja matematiko kaj kutime oni ne bezonas esprimi sin kun matematika precizeco.

Precipe kun la nomoj de urboj kaj landoj oni uzas volonte *al*: *Mi veturos al Ĉeĥoslovakio*, *al Germanujo*, *al Finnlando*, *al Berlin(o)*, *al Parizo*, *al Vieno (Wien)*, *al Oslo*.

## 116. Ĝis.

La diferenco inter *al* kaj *ĝis* estas tio, ke *al* indikas nur direkton, dum *ĝis* fiksas ankaŭ la limon: *Li iris al la pordo* (li iris en la direkto de la pordo). *Li iris ĝis la pordo* (la pordo estis la limo, ĝis kiu li iris). *De tiu turo oni povas vidi ĝis la najbara urbo*. *La kurso daŭros ĝis kristnasko*. *Ĝis tiu tempo ni lernos la tutan Esperantan gramatikon*. *La lecionoj estas de la sepa ĝis la naŭa*. *Ĝis revido!*

*Ĝis* estas uzata ankaŭ konjunkcie, t.e. sen substantivo: *Hieraŭ mi legis ĝis* (aŭ *ĝis kiam*) *mi endormiĝis*. *Nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos, ĝis* (aŭ *ĝis kiam*) *la bela sonĝo de l' homaro por eterna ben' efektiviĝos*.

## 117. Post kaj antaŭ.

*Post* kaj *antaŭ* estas uzataj en du sencoj: loko kaj tempo. Loko: *Antaŭ mi sidis fraŭlino kaj post (= malantaŭ) mi sidis dika maljunulo*. *Ili kaŝis sin post (malantaŭ) la ŝtono*. Tempo:

*Antaŭtagmeze la infanoj lernas kaj posttagmeze ili ludas. Antaŭ nelonge mi legis «Gösta Berling» de Selma Lagerlöf. La prezentado komenciĝos post nelonge. Antaŭhieraaŭ. Postmorgaŭ. Li foriris antaŭ du horoj. Post la tagmanĝo mi legis.*

Sed *malantaŭ* estas uzata nur por loko, neniam por tempo. Estus utile diferencigi *post* kaj *malantaŭ*, uzante *post* nur por tempo: *Li venis post mi* (= pli malfrue ol mi). *Li venis malantaŭ mi* (= ĉe mia dorso).

Ankaŭ *post* estas uzata konjunkte, sed nur kune kun *kiam*: *Post kiam la letero estos skribita, mi iros promeni. Post kiam ŝi edziniĝis* (= edziniĝinte), *ŝi finis la laboradon en la kontoro. Anstataŭ post kiam oni povas uzi sole kiam: Kiam la letero estos skribita (aŭ Skribinte la leteron), mi iros promeni.*

Analogie al *post kiam* kelkaj uzas *antaŭ kiam* anstataŭ la kutima *antaŭ ol*: *Mi ne ripozos antaŭ kiam mi plene ellernis Esperanton.*

### **118. Ĉe kaj apud.**

*Apud* signifas «flanke de, ĉe la flanko»: *Antaŭ mi en la kino sidis bela fraŭlino, apud mi sidis mia edzino kaj malantaŭ mi sidis dika sinjoro. Antaŭ nia domo estas ĝardeno kaj apud nia domo estas lernejo.*

Ĉe indikas proksimecon, kuneston: *Ĉe Brno estas la mondfamaj grotoj Macoĥa. Restu ĉe mi. Li oficas ĉe Müller & K-io* (komparu *apud Müller & K-io* = en apuda domo). *Iliaj gepatroj loĝas jam kelkajn jarojn ĉe ili* (= en la sama loĝejo kun ili). *Iliaj gepatroj loĝas jam kelkajn jarojn apud ili* (= en alia, apuda loĝejo). *La tuta familio sidis ĉe la tablo.*

Tamen en certaj okazoj ilia senco tiom proksimiĝas, ke oni povas uzi kiun ajn el ili: *La pordisto staras ĉe la pordo* (aŭ *apud la pordo*). *Estonio estas ĉe* (aŭ *apud*) *la Balta maro. En apudmaraj* (aŭ *ĉemaraj*) *regionoj multe pluas.*

### **119. Kun, per, sen.**

*Kun* indikas akompanon: *Petro parolas kun sia amiko* (= Petro parolas kaj lia amiko parolas). *Kun kiu vi promenis hieraaŭ? Ĉu vi korespondas kun eksterlandanoj? La koko kantas kun fermitaj okuloj* (= havante la okulojn fermitaj). *Li staris kun klinita kapo.*

*Per indikas rimedon, ilon: La surdmutuloj parolas per (= per helpo de) la manoj. Oni skribas per plumo kaj kraĵono. Mi manĝis per kulero, forko kaj tranĉilo. Li parolis per telefono kun sia amikino. Sendu la pakajon per poŝto!*

*Sen estas malo de kun kaj per: Sen vi mi iros nenien! Sen plumo aŭ kraĵono oni ne povas skribi. La infanoj preferas manĝi sen forko kaj tranĉilo.*

## **120. Kunmetaĵoj de prepozicio kaj verbo.**

Kun prepozicio kunmetita verbo havas kompreneble alian sencon ol la sama verbo sole (alie oni ja ne bezonus la kunmetaĵon): *La ciganino antaŭdiris al li grandan estontecon. Neniu povis antaŭvidi la malsukceson. Dum la kunveno oni priparolis diversajn aferojn. «En okcidento nenio nova» de Remarque priskribas la mondmiliton. La poeto prikantas sian amatinon. Ĉiu devas prizorgi sin mem. La redaktoro prilaboras la ricevitaĵn manuskriptojn. Antaŭ kristnasko la komercistoj perlaboras multe da mono. Neniu kontraŭdiris ion al la parolanto. En la vagono iu sinjoro alparolis min. La malamika armeo transiris nokte la riveron. Vespere la suno subiras. Pro trablovo oni fermis la fenestrojn. Malmulte da homoj ĉeestis la paroladon. Longe ŝi postrigardis la foriranton. Adiaŭe ili ĉirkaŭprenis unu la alian. Antaŭ ol eniri la viro ĉirkaŭiris la domon. Neniu aldonis ion al iliaj klarigoj.*

Por vidi la diferencon inter kunmetaĵo kaj simpla verbo kun prepozicio, komparu ekzemple la frazojn *Fremdajn homojn oni ne alparolas*, kaj *Al fremdaj homoj oni ne parolas*. Ofte la kunmetita verbo havas tiel specialan sencon, ke oni tute ne povas disigi la verbon de la prepozicio: *antaŭdiri*, *antaŭvidi* («*neniu povis vidi antaŭ la malsukceso*») estas ja tute sensenca kaj havas nenion komunan kun *neniu povis antaŭvidi la malsukceson*), *perlabori*, *aldoni*, k.t.p.

Kiel ni vidis en §§ 47 kaj 48, kun la prepozicioj estas uzata nominativo, kaj akuzativon oni uzas nur tiam, kiam oni volas indiki direkton kaj la prepozicio per si mem tion ne faras. (*La malamika armeo iris trans la riveroN*). Sed post verboj, kunmetitaj kun prepozicio, oni devas ĉiam uzi akuzativon, ankaŭ kiam ne temas pri direkto: *Mi ĉeestis la kunvenoN*. Tiu ĉi akuzativo anstataŭas la mankantan prepozicion, kiel ni vidis jam en § 76.

La kunmetaĵoj kun la verboj de movo diferencas de la ceteraj tiom, ke post ili oni kutime ripetas la prepozicion: *Bonvolu eniri en la ĉambbron! Nun ni alvenis al la plej grava demando. Post la diservo ĉiuj eliris el la preĝejo.*

## 121. Adverbigo de la prepozicioj.

La prepozicioj kiel helpvortoj ne povas esti uzataj memstare, sed nur kun substantivoj kaj pronomoj, kaj kelkaj (*anstataŭ, por, krom, sen*) ankaŭ kun infinitivo. Volante uzi iun prepozicion memstare, oni devas adverbigi ĝin, t.e. aldoni al ĝi la finaĵon *-e*:

*Mia familio iras antaŭ mi = Mia familio iras antaŭE* (oni ne povas diri «*Mia familio iras antaŭ*»!). *Ŝi ekrigardis malantaŭ sin = Ŝi ekrigardis malantaŭEN*. *Unue ni trinkos kafon kaj postE* (= post tio) *ni ludos ŝakon. Mi venos baldaŭ; dumE* (= dum la atendado) *vi povas rigardi la albumon. Mi ne havas tiom da mono kunE* (= kun mi). *Pro manko de loko multe da homoj devis resti eksterE* (= ekster ia domo). *La banejo estas tute apudeE* (= apud ni). *AnstataŭE* (= anstataŭ tio) *mi iris hejmen. KromeE* (= krom tio) *la libro estas ankaŭ instrua. Tute kontraŭE* (= kontraŭ tio, male), *li estas la plej bona homo, kiun mi konas. ĈirkaŭE* (= ĉirkaŭ ŝi) *sur la planko kuŝas ŝiaj ludiloj. La urbocentro estas transE de la rivero. Luktante la knaboj falis tiel, ke Karlo estis supre kaj Petro subE* (= sub li). *Mi sciigis pri la novaĵo perE de mia amiko. SurE* (= supre), *enE* (= interne) *kaj eLE* (= ekstere) *estas uzataj tre malofte.*

## 122. -eco

indikas kvaliton kaj estas uzata kun adjektivoj: *riĉa – riĉeco, libera – libereco, afabla – afableco, certa – certeco, konata – konateco*. *-eco* estas uzata ankaŭ en la senco «tempo»: *infaneco* (sed pli kaj pli ofte oni uzas la formon *infanaĝo*), *pasinteco* (= pasinta tempo), *estanteco* (= estanta tempo), *estonteco* (= estonta, venonta tempo).

Kun verbaj radikoj *-eco* ne estas uzata, sed ofte kun substantivaj, kompreneble pere de ilia adjektivigo: *homo – homa – homeco, amiko – amika – amikeco, hejmo – hejma – hejmeco*, k.t.p.

Kvankam *-eco* estas ĝenerale substantiviga sufikso, per ĝi estas devenigata ankaŭ aparta speco de adjektivoj kun la senco *-simila*: *knaba konduto = konduto de knabo, knabeca konduto = knabsimila konduto; argila tero = tero el argilo, argileca tero = argilsimila*

tero.

## **TASKO 15.**

(Alskribu la ĝustan prepozicion anstataŭ la punktoj!)

### **Profunda dormo.**

... grava afero Jakobo Dormsako estis veturonta ... nokta vagonaro ... Tartu. ... la vojaĝo lia edzineto enpakis ... li ĉion necesan: novan kostumon, noktoĉemizon, paron ... ŝuoj, kelke ... puraj kolumoj, naztukojn, buterpanojn ... trankviligo ... la apetito kaj eĉ interesan romanon ... legado.

... larmoj ... la okuloj la bona edzino adiaŭis sian edzon ... la vagonaro, deziris ... li bonan vojaĝon kaj feliĉan revenon. La lasta kiso, kaj la vagonaro ekmoviĝis. Starante ... la ŝtupo ... la vagono Jakobo svingis poŝtukon ... sia kara edzineto, kiu baldaŭ malaperis ... la vido.

... mallonga serĉado Jakobo trovis sian dormvagonan kupeon. Baldaŭ li sentis sin laca kaj dormema. Sed ... la enlitiĝo li iris ... la konduktoro kaj donante ... li unu kronon petis lin, ke li veku lin matene ... Tartu, kaj, se li ne volos vekigi, simple elportu lin ... la vagono. Ĉar Jakobo dormis kutime tre profunde kaj ofte estis tute neeble veki lin matene.

... la nokto Jakobo dormis dolĉe ... sia vagonlito. Sed kiam li matene malfermis la okulojn kaj elrigardis ... la fenestro, li ekvidis ... teruro, ke li jam delonge traveturis Tartun kaj troviĝas jam ... la limstacio Valga.

Li furioziĝis, rapide vestis sin, elkuris ... la vagono, iris ... la konduktoro kaj kolere insultis lin ... tio, ke li ne vekis lin ... Tartu, kvankam li ricevis ... tio unu tutan kronon. Sed la konduktoro ne povis ... ridego respondi eĉ unu voton. Lia kolego, kiu tion vidis, venis ... li ... post la foriro ... Jakobo kaj demandis lin: «Kial vi ridis, kiam tiu sinjoro insultis vin? Kial vi ne fermis lian buŝon?» – «Ho, ankoraŭ pli kolere insultis min tiu sinjoro, kiun ... Tartu ... noktoĉemizo mi elportis ... la vagono!» respondis la konduktoro, retenante ridon.

## 123. Landnomoj.

Ekzistas du specoj da landnomoj: 1. derivitaj el la nomo de la popolo per la sufikso *-ujo*, finaĵo *-io* aŭ la vorto *lando* (al tiu ĉi kategorio apartenas la nomoj de preskaŭ ĉiuj landoj en Eŭropo kaj Azio); 2. memstaraj radikoj, el kiuj la nomo de la popolo estas devenigata per la sufikso *-ano* (al tiu ĉi kategorio apartenas preskaŭ ĉiuj landoj en Ameriko kaj Afriko).

1. Per la oficiala sufikso *-ujo* oni povas el ĉiuj nomoj de la popoloj devenigi la respektivan landnomon: *abiseno* – *Abisenujo*, *albano* – *Albanujo*, *bavaro* – *Bavarujo*, *bulgario* – *Bulgarujo*, *ĉeĥoslovakio* – *Ĉeĥoslovakujo*, *ĉino* (aŭ *ĥino*) – *Ĉinujo* (aŭ *Ĥinujo*), *dano* – *Danujo*, *hindo* – *Hindujo*, *hispano* – *Hispanujo*, *hungaro* – *Hungarujo*, *italo* – *Italujo*, *japano* – *Japanujo*, *jugoslavo* – *Jugoslavujo*, *kataluno* – *Katalumujo*, *kroato* – *Kroatujo*, *greko* – *Grekujo*, *norvego* – *Norvegujo*, *polo* – *Polujo*, *portugalo* – *Portugalujo*, *rumano* – *Rumanujo*, *ruso* – *Rusujo*, *sakso* – *Saksujo*, *svedo* – *Svedujo*, *sviso* – *Svisujo*, *turko* – *Turkujo*, k.t.p.

2. Ĉar *-ujo* havas ankaŭ du aliajn sencojn (ekz. *supujo* kaj *pomujo* = *pomarbo*), kaj ĉar ĝi krom tio estas artefarita kaj ne troviĝas en la aliaj lingvoj, multaj preferas la neoficialan, sed internacian finaĵon *-io*: *Albanio*, *Aŭstrio*, *Belgio*, *Bulgario*, *Ĉeĥoslovakio*, *Estonio*, *Germanio*, *Hindio*, *Hispanio*, *Hungario*, *Italio*, *Jugoslavio*, *Latvio*, *Litovio*, *Norvegio*, *Portugalio*, *Rumanio*, k.t.p.

3. Tiuj, kiuj ŝatas nek *-ujo* nek *-io*, uzas kunmetaĵojn kun *lando*: *Ĉinlando*, *Danlando*, *Franclando*, *Hungarlando*, *Japanlando*, *Pollando*, *Ruslando*, *Svedlando*, *Svislando*, k.t.p. Sed tro longaj kunmetaĵoj (*Ĉeĥoslovaklando*, *Jugoslavlando*, *Portugallando*, *Aŭstrolando*, k.t.p.) ne estas belaj. La formoj «*Finnujo*» aŭ «*Finnio*» (el *finno*, kelkfoje eĉ *fino*) ne estas uzataj, sed ĉiam *Finnlando*.

La nomoj *Nederlando*, *Holando*, *Irlando* kaj *Islando* ne estas

kunmetaĵoj, sed memstaraj vortoj, kie *-land-* apartenas al la radiko. La nomo de la popolo estas derivata el ili per la sufikso *-ano*: *nederlandano*, *holandano*, *irlandano*, *islandano*. Al la sama kategorio apartenas: *Usono*, *Sovet-Unio* (ankaŭ *Sovetio* kaj *USSR*), *Kanado*, *Palestino*, *Argentino*, *Peruo*, *Koreo* k.t.p. Ankaŭ el ili la nomo de la popolo estas derivata per *-ano*: *usonano*, *kanadano*, *peruano*, *koreano* k.t.p.

La nomoj de kelkaj ekster-eŭropaj landoj havas du formojn: *egipto* – *Egiptujo* kaj *Egipto* – *egiptano*; *Brazilo* – *brazilano* kaj *Brazilio* – *braziliano*; *Ĉilo* – *ĉilano* kaj *Ĉilio* – *ĉiliano*.

La landnomoj: *Alĝerio* kaj *Meksikio* havas la finaĵon *-io* por ke oni povu diferencigi ilin de la samnomaj urboj (*Alĝero* kaj *Meksiko*). La loĝantoj de tiuj landoj estas nomataj *alĝerianoj* kaj *meksikianoj*.

## 124. Propraj nomoj.

Ĉar la substantivoj en Esperanto havas la finaĵon *-o*, ekzistas tendenco provizi per ĝi ankaŭ la proprajn nomojn kaj tute adapti ilin al la reguloj de nia lingvo. Multaj internacie konataj nomoj estas jam ĝenerale uzataj en tiu maniero: *Johano*, *Karlo*, *Petro*, *Aleksandro*, *Henriko*, *Teodoro*, *Andreo*, *Julio*, *Mario*, *Elizabeto*, *Napoleono*, *Cezaro*, *Parizo*, *Londono*, *Romo*, *Kopenhago*, *Varsovio* aŭ *Varŝavo* (pole *Warszawa*), *Vieno* (Wien) k.t.p.

Tuta serio da geografiaj nomoj, precipe tiuj de maroj, riveroj kaj montoj, kiuj estas internacie konataj, estas uzata senescepte en ilia Esperanta formo: *Danubo*, *Mediterraneo* (*Meza Maro*), *Balta Maro*, *Finna Golfo*, *Botnia Golfo*, *Norda Maro*, *Glacia Maro*, *Nigra Maro*, *Kaspia Maro*, *Marmara Maro*, *Atlanta Oceano* aŭ *Atlantiko*, *Pacifika Oceano* aŭ *Pacifiko*, *Ruĝa Maro*, *Dardaneloj*, *Alpoj*, *Karpatoj*, *Altaj Tatroj*, *Apeninoj*, *Pireneoj*, *Krimeo* k.t.p.

Internacie konataj urbnomoj estas uzataj aŭ en la Esperanta aŭ en la oficiala formo (sed kutime oni ne uzas iun alian nacilingvan formon): *Kopenhago* aŭ *Kobenhavn*, *Stockholm* aŭ *Stokholmo*, *Berlin* aŭ *Berlino*, *London* aŭ *Londono*, *Moskva* aŭ *Moskvo* (sed ne «*Moscou*!»), *Roma* aŭ *Romo* (sed ne «*Rom*»), *New York* aŭ *Nov-Jorko*, *Chicago* aŭ *Ĉikago*, *Varsovio*, *Varŝavo* aŭ *Warszawa* (sed ne «*Warschau*»), *Praha* aŭ *Prago* (sed ne «*Prag*»), *Göteborg* aŭ *Gotenburgo* (sed ne «*Göteborgo*»), *Milano* (ne «*Mailand*»), *Napoli* (ne «*Neapel*»), *Budapest* aŭ *Budapeŝto* k.t.p.

La nomojn de malpli konataj urboj oni kutime ne esperantigas (sed ofte estas tre utile, se en parentezoj oni aldonas ilian proksimuman elparolon): *Bordeaŭ (Bordo)*, *Bydgoszcz (Bidgoŝc)*, *Tallinn* (ne «*Reval*» aŭ «*Talino*») k.t.p.

La familiajn nomojn oni ne esperantigas kaj el la antaŭnomoj oni kutimas esperantigi nur tiujn, kiuj estas internacie uzataj: *Lazaro Ludoviko Zamenhof*, *John Durrant*, *James Baldwin*, *Romain Rolland*, *Vlasta Stolejdova* k.t.p. En adresoj k.s. oni uzas la Esperantajn formojn malofte, sed en literaturo pli ofte.

**Rimarko:** En kelkaj naciaj lingvoj oni diras unue la familian kaj poste la antaŭnomon (*Bleier Vilmos*, *Dokoupil Bohuslav* k.t.p.). Sed ĉar multaj nacilingvaj antaŭnomoj ne estas internacie konataj kaj pro tio eksterlandanoj ne scipovas diferencigi la familian kaj antaŭnomon, estas rekomendinde loki la antaŭnomon antaŭ la familia nomo, kiel oni faras en la plej multaj lingvoj: *Edmond Privat*, *Teo Jung*, *Ernfrid Malmgren*, *Vilmos Bleier*, *Bohuslav Dokoupil* k.t.p. Kiam pro specialaj kaŭzoj (ekzemple en alfabeto nomaro) estas necese unue lokigi la familian nomon, oni apartigu ĝin de la sekvanta antaŭnomo per komo: *Privat, Edmond. Zamenhof, Lazaro Ludoviko.*

## 125. Akuzativo.

Akuzative la esperantigitaj propraj nomoj estas uzataj same kiel ĉiuj aliaj substantivoj: *Mi tre ŝatas SvedlandoN. Neniam ankoraŭ mi vidis ParizoN. Multaj turistoj vizitas (la) AlpojN. Ernesto amas AmalioN.*

Ĉe la neesperantigitaj nomoj oni aplikas du manierojn: 1. Oni uzas ilin en ilia origina formo sen akuzativa finaĵo: *Lars amas Oudrun* (aŭ *Oudrunon*). *Ĉiuj maristoj konas Bordeaŭ* (aŭ *la urboN Bordeaŭ*). 2. Oni aldonas la finaĵon *-n* (post vokalo) aŭ *-on* (post konsonanto), kiun oni tute simple alskribas al la nomo (*Mi ŝatas Prahon. Ĉiuj pacamikoj memoras Briandon*), aŭ apartigas per streketo (*Folke amas Helga-n*) aŭ per apostrofo (*Post Londono ni vizitis Manchester'on* aŭ *Menĉesteron*).

Kiam antaŭ la propra nomo troviĝas iu titolo (*sinjoro, fraŭlino, samideano, doktoro, profesoro, instruisto, ŝoforo* k.t.p.) aŭ iu alia simila vorto (*urbo, monto, lingvo, vorto* k.t.p.), la propra nomo estas ĉiam nominativa: *Ĉiuj esperantistoj ŝatas kaj amas DoktoroN*



*Zamenhof. Ĉu vi konas pastroN Andreo Cseh? Dum la mondmilito la germanoj okupis la polan ĉefurboN Varsovio. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvoN Esperanto (ne «la lingvon Esperanton»!). Ŝi forgesis la vortoN «eraro».*

## **126. Difina artikolo.**

Aldone al § 13 ankoraŭ kelkaj reguloj pri la uzado de la difina artikolo:

1. *La estas uzata ĉiam por indiki horon: Nun estas la tria kaj kvarono (3.15). Mi enlitiĝis je la dekdua. La vagonaro foriros dek minutojn antaŭ la sepa (6.50).*

2. *Same la estas uzata ĉiam por indiki la tagon de la monato: Mi naskiĝis la naŭan de Februaro. Hodiaŭ estas la kvara de Marto.*

3. *Anstataŭ ripeti substantivon, oni povas uzi la kun adjektivo aŭ poseda pronomo: Jen estas du libroj; la dika estas angla kaj la maldika estas Esperanta. Lia patro estas instruisto, sed la mia estas ŝuisto.*

## **127. Adjektivigado kaj adverbigo de verboj.**

Kutime oni adjektivigas kaj adverbigas la verbojn pere de la participoj: *kanti – kantanta – kantante; dormi – dormanta – dormante*. Sed en certaj okazoj oni faras tion ankaŭ per simpla aldono de la finaĵoj *-a* aŭ *-e* al la verba radiko kaj devenigas tiamaniere adjektivojn kaj adverbojn kun speciala sencnuanco: *D-ro Privat estas brila oratoro. Vi faris tion brile. La demanda kaj ekkria signoj apartenas al la interpunkcio. Eksterlandaj vojaĝoj estas ne nur distraj kaj amuzaj, sed ankaŭ tre instruaj. Multaj Esperantaj kluboj havas vivan aŭ parolan gazeton. Ni interrilitis nur skribe. Li parolas Esperanton flue.*

Precipe ofte oni adjektivigas kaj adverbigas tiamaniere la verbojn kun la sufiksoj *-igi* kaj *-iĝi*: *Estona Kleriga Ligo. Vendado de refreŝigaj trinkaĵoj. Lia konduto estis koleriga kaj hontiga. Interkonatiĝa vespero.*

Atentu, ke tiuj ĉi adjektivoj kaj adverboj ne estas egalaj al la respektivaj participoj, sed havas tute speciale nuancitan sencon: la participoj esprimas hazardan staton kaj substrekas la agon kaj tempon, dum la simplaj adjektivoj kaj adverboj indikas konstantan staton, malpli akcentas la agon kaj tute ne enhavas ideon pri tempo.

*Brilanta ŝtono* estas ŝtono, kiu brilas, eble nur hazarde, ĉar sunradioj falas sur ĝin. Sed *brila oratoro* (ne brilanta! jes, brilanta li fariĝas, kiam li ŝvitas kaj lia vizaĝo brilas pro tio) – estas persono, kiu havas grandan talenton kaj multe da spertoj por paroladi.

## 128. Neado.

1). Por neado estas uzataj la vortoj: *ne, nek, nek... nek, eĉ ne, neniu, nenio, nenia, nenie, nential, neniam, neniel, nenies, neniom*.

2). La nea vorto troviĝas ĉiam antaŭ tiu vorto, al kiu ĝi rilatas: *Mi ne legis gazeton. Ne mi legis gazeton. Mi legis ne gazeton*.

3). Kiam iu alia nea vorto estas uzata, la vorto *ne* estas superflua: *Neniu povas ellerni la ĉinan lingvon. Neniel oni povas kompreni tian agmanieron. Li ŝatas nek kinon nek teatron*.

4). Ĉe duobla neado la senco fariĝas jesa: *Mi ne povas ne paroli = Mi devas paroli*.

5). Atentu la diferencon inter *ne* kaj la sufikso *mal-*, kiu indikas rektan malon, dum *ne* nur neas tion, pri kio temas: *nevarma – malvarma; nebela – malbela; ne fari – malfari (= detrui)*. Kun verboj kelkaj uzas *mal-*, kiam *ne* estas pli ĝusta. Ne *Mi malsciis tion*, sed: *Mi ne sciis tion*, ne: *Li malkomprenis la leteron* sed: *Li ne komprenis* (aŭ *miskomprenis*) *la leteron*. Same anstataŭ la kelkfoje renkonteblaj formoj: *malebla, malkomprenebla, malvidebla, mallegebla* k.t.p. pli ĝustaj estas: *neebla, nekomprenebla, nevidebla, nelegebla* k.t.p.

## 129. Apostrofado.

Kelkfoje, precipe en poezio, oni forlasas la literon *a* de la artikolo kaj anstataŭigas ĝin per apostrofo (*l'*). Tio estas farata kutime nur post *de*, kaj precipe tiam, kiam la vorto, kiu sekvas la artikolon, komenciĝas per *a* aŭ iu alia vokalo: *La posedanto de l' aŭtomobilo. Sur la ondoj de l' oceano. Laŭlonge de l' rivero*.

Sed kiam la vorto post *la* komenciĝas per *l* kaj entute kiam troviĝas danĝero de miskompreno, ne estas rekomendinde apostrofi la artikolon. Sekve ne «*de l' lingvo, de l' laŭdo, de l' aŭdo, de l' iro*» (la lasta sonas kiel *deliro!*), sed *de la lingvo, de la laŭdo, de la aŭdo, de la iro* k.t.p.

Kelkaj apostrofas la artikolon ankaŭ post *tra, pri, pro, ĉe* kaj *je* (*tra l' arbaro, ĉe l' akvo*), sed en la kutima stilo tio ne estas imitinda.

En poezio (sed ne en prozo!) oni apostrofas pro belsono kaj ritmo ankaŭ substantivojn: *Ho, mia kor'! Al la mond' eterne militanta...* k.t.p. Sed apostrofi oni rajtas nur substantivojn kun la finaĵo *-o*, neniam adjektivojn, adverbojn, verbojn kaj aliajn vortojn, ankaŭ ne la finaĵojn *-on*, *-oj* kaj *-ojn*.

Entute estu ŝparema pri la apostrofado, ĉar la plenaj formoj estas pli klaraj kaj facile kompreneblaj.

### 130. Komo.

La uzado de punkto (*.*), demanda signo (*?*), ekkria signo (*!*), dupunkto (*:*) kaj punktokomo (*;*) estas en Esperanto la sama kiel en la aliaj lingvoj. Sed la uzado de komo (*,*) estas tre malegala en la diversaj lingvoj, kio kompreneble respeguliĝas ankaŭ en Esperanto. Tamen en sekvantaj tri okazoj ĝi estas ĝenerale uzata:

1). Por apartigi samklasajn vortojn, kiuj troviĝas unu apud la alia kaj ne estas ligitaj per *kaj*: *Tablo, seĝo, lito kaj ŝranko estas mebloj. Budapest estas granda, bela, moderna kaj pura urbo. Hejme mi skribas, legas, manĝas, trinkas kaj ripozas. Lernu Esperanton tage, nokte, matene kaj vespere; hejme, ĉe la laboro, en kafejo, tramo kaj vagonaro!*

2). Por apartigi la alparolaton kaj imperativon: *Karlo, venu tien ĉi!* Sen komo la frazo ekhavas tute alian sencon (tria persono): *Karlo venu tien ĉi!* Plue: *Karulino, kio okazis al vi? Vi tute ne komprenas min, kara amiko!*

3). Por apartigi eldiraĵon, sekvatan de *diris*, *opiniis*, *demandis*, *respondis* k. s., kiam demanda aŭ ekkria signo ne estas uzata: *Vi jam ne trompos min, ŝi pensis en si mem. Ni parolas Esperante, li diris.*

Kelkfoje oni povas vidi longajn frazojn, kie troviĝas neniu komo, ekzemple «*Mi ne scias ĉu vi konsentas pri tio kion mi ĵus diris sed mi estas konvinkita ke tio estas la sola solvo de la problemo*». Fakte ĉi tie temas ne pri unu, sed pri pluraj frazoj, kaj la esprimo fariĝus multe pli klara kaj eleganta, se ĉiu frazo estus apartigita per komo: *Mi ne scias, ĉu vi konsentas tion, kion mi ĵus diris, sed mi estas konvinkita, ke tio estas la sola solvo de la problemo!* Oni ja ne eldiras per unu spiro la tutan esprimon, sed faras paŭzon post ĉiu unuopa frazo, kaj en la skribo ni marku tiujn paŭzojn per komo. Per tio la stilo fariĝas pli malpeza kaj facile komprenebla. Praktike tio interalie signifas, ke ni uzu komon antaŭ *ke*, *sed* kaj *ĉu*, kiam ili

kunligas du frazojn : *Mi timas, ke morgaŭ estos malbona vetero. Mi ne dormas, sed mi nur iomete ripozas. Ŝi ne diris certe, ĉu ŝi venos.* Komo estu uzata ankaŭ tiam, kiam temas pri mallongigitaj frazoj: *Ĉu vi redonis la librojn, prunteprenitajn en la biblioteko? Ripozinte iom da tempo, li daŭrigis sian vojon.*

Dum kelkaj uzas komon tro ŝpareme, aliaj, ankaŭ pro influo de la gepatra lingvo, uzas ĝin tro ofte kaj apartigas per ĝi eĉ unuopajn frazpartojn («*Hieraŭ, mi skribis dum la tuta tago. En Ĉeĥoslovakio, oni trinkas multe da biero*», k.t.p.). Sed prefere ne apartigu partojn de la sama frazo: *Hieraŭ mi skribis dum la tuta tago. En Ĉeĥoslovakio oni trinkas multe da biero.* La germanoj uzas komon eĉ antaŭ infinitivo («*Estas facile, lerni Esperanton*»), sed ni ne imitu tion: *Estas facile lerni Esperanton.* Same ne estas necese uzi komon antaŭ por kun infinitivo (*Mi venis ĉi tien por paroli kun vi*) kaj antaŭ ol (*Printempo estas pli bela ol aŭtuno*).

## **TASKO 16.**

(Alskribu la mankantajn komojn!)

### **Kiu kreis la mondon?**

Jozefo estis la plej petolema knabo en la tuta lernejo. Li ne povis trankvile sidi en sia benko sed ĉiam li elpensadis novajn artifikojn kiujn li tuj efektivigis. Kiam dum leciono paperbulo flugis rekte sur la nazon de la instruisto kiam iu fenestro estis frakasita aŭ iu alia malbonaĵo okazis ĉiuj tuj sciis ke en tio estas kulpa Jozefo. Ankaŭ Jozefo mem al kutimiĝis al tio ke li estas kulpa pri ĉio kaj tial kelkfoje li devis suferi ankaŭ pro malbonfaroj de la aliaj knaboj.

Foje dum leciono de biblia historio la instruisto rakontis pri tio kiel la mondo estas kreita. Sed kiam poste por kontroli ĉu la knaboj komprenas la aferon li subite demandis kiu kreis la mondon neniu el la lernantoj sciis tion. Tio kompreneble ĉagrenis la instruiston kaj li ripetis la demandon pli laŭte. Silento. Fine Jozefo starigis sin kaj deklaris kun la mieno de granda pekulo: «*Mi faris tion sinjoro instruisto sed mi promesas ke neniam plu mi faros ion similan*».

# DEK-OKA LEKONO

## 131. Verbigado.

Jam en § 25 ni vidis, ke per simpla interŝanĝo de la gramatika finaĵo oni povas transporti la vortojn el unu vortklaso en alian: *homo* – *homa* – *home*; *bona* – *bone* – *bono*; *brili* – *brila* – *brile*; *mi* – *mia*; *ĉirkaŭ* – *ĉirkaŭo* – *ĉirkaŭa* – *ĉirkaŭe* – *ĉirkaŭi*; *unu* – *unuo* – *unua* – *unue*; *hieraŭ* – *hieraŭa*; *jes* – *jesa* – *jese* – *jesi*. Tiu ĉi praktika regulo donas al Esperanto pli grandan flekseblecon kaj nuancrichecon ol iu alia lingvo havas.

Laŭ la supra maniero oni povas devenigi grandan nombron da verboj el multaj substantivoj, adjektivoj, prepozicioj, adverboj kaj eĉ interjekcioj. Sed ĉe tio la verba finaĵo havas preskaŭ neniam la saman sencon kiel *esti*, kion kelkaj bedaŭrinde miskomprenas. La verba finaĵo enhavas ĉiam la ideon «agi», ĉar la verboj estas ja fakte «agovortoj». Sekve oni ne povas anstataŭ *estas homo* kaj *estas varma* diri «*homas*» kaj «*varmas*»! La derivitaj verboj havas ĉiam tute specialan sencon, kiu ne estas esprimebla per *estas -o* aŭ *estas -a*, kiuj ja indikas staton.

Ekzemple la esprimo *Li nur aktoras*, kiun oni kelkfoje ŝerce uzas, ne estas egala al *Li estas aktoro*. *Li aktoras* tute ne signifas, ke li estas aktoro, sed ke tio, kion li faras, ne estas sincera, ke li nur ludas, ŝajnigas, t.e. agas kiel aktoro, dum li fakte povas esti oficisto, ŝuisto aŭ kio ajn. La sama diferenco estas inter ĉiuj verboj kaj la formoj *estas -o* aŭ *estas -a*.

Pro tio ankaŭ la sintezaj participaj formoj («*manĝintas*» anstataŭ *estas manĝinta*, «*skribitas*» anstataŭ *estas skribita*, k.t.p.), kiujn kelkaj reformemuloj de tempo al tempo uzas, estas kontraŭnaturaj kaj sensencaj, krome ankaŭ malfacile kompreneblaj kaj fremdaj al la naciaj lingvoj.

Ne el ĉiu substantivo, adjektivo k.t.p. oni povas devenigi verbon,

ĉar la senco tion ne permesas. En kelkaj okazoj, kiam iu vorto ne estas senpere verbigebla, oni uzas por tio la sufikson *-umi* (vidu § 134).

## 1. Substantivaj radikoj.

A. **Agi per -o (transitivaj):** *La kruela viro **bastonis** (= batis per bastono) sian ĉevalon. La kokinoj **bekas** (= prenas per la beko) grajnojn en la korto. Li **ĉirkaŭbrakis** (= ĉirkaŭprenis per la brakoj) sian edzinon. Oni devas bridi siajn dezirojn. Li zorge **brosis** (= purigis per broso) siajn vestojn. Liaj ŝuoj estis brile **ciritaj**. Printempe la fiŝkaptistoj **gudras** (ŝmiras per gudro) siajn boatojn. La stratmuzikisto **gurdis** (= ludis per gurdo) malnovan melodion. La plafono estis freŝe **kalkita** (= kovrita per kalko). Sukceso **kronos** viajn penadojn. Ŝi estis **maskita** kiel ciganino. Oni **najlis** (= fiksas per najloj) la nigran tabulon al la muro. Mekanikisto **oleas** la aŭtomobilon. La fraŭlino estis riĉe **parfumita** kaj pudrita. **Salita** viando. La parlamento **spegulas** la volon de la popolo. Li **spicis** sian rakonton per spritaĵoj. La rajdanto **spronis** sian ĉevalon kaj malaperis el la vido. Printempe la kamparanoj **sterkas** siajn kampojn. Kiu **tapetis** tiun ĉi ĉambron? Li **telefonis** la novaĵon al siaj gepatroj. Personaj intrigoj ĉiam **venenas** la atmosferon. La patro **vergis** (= batis per vergoj) sian filon pro lia malobeo. La fiakristo senkompatate **vipadis** (= batadis per vipo) sian ĉevalon. La mahometanaj virinoj havas **vualitan** (= per vualo kovritan) vizaĝon.*

**Netransitiva:** *En Danujo preskaŭ ĉiuj **biciklas** (= veturas per biciklo). En la norvega montaro estas agrable **skii** (= kuri per skioj).*

B. **Agi kiel -o (transitivaj):** *Longaj haroj **kadris** (= ĉirkaŭis kiel kadro) lian vizaĝon. Norde kaj okcidente **limas** Estonion la Balta Maro. Oni devas **mastri** (= estri) siajn sentojn. Alta arbo **ombras** mian fenestron. Ciganino **profetis** (= antaŭdiris, aŭguris) al li grandan estontecon. La ĵaluza virino **spionis** sian edzon.*

**Netransitivaj:** *La ciferoj de la horloĝo **fosforas** (= brilas fosfore) en mallumo. Hodiaŭ **frosta**. Liaj okuloj **lumis** pro kolero. Ankoraŭ nun **eĥas** (= resonas) en miaj oreloj ŝia sonora rido. Kolero subite **ekflamis** en li. Ŝipruino **flosis** (= naĝis kiel*

floso) sur la maro. Kelkfoje **hajlas** (= falas hajlo) eĉ somere. Vintre **neĝas**, sed somere **pluvas**. La maro **ondas**. La vojo **polvas**. La fero **rustas**. La nazo de la knabo **sangis**. La akvofalo **ŝaŭmas**.

- C. **Fari -on (transitivaj):** Oni **aŭkciis** (= vendis aŭkcie) la bienon. **Broŝurita** libro. Svedujo **eksportas** multe da ligno. Nia societo **ekspoziciis** Esperantan literaturon. La robo estas moderne **fasonita**. Per la afiksoj ni **formas** multe da novaj vortoj. La novaĵo forte **impresis** ŝin. Ŝi **komplezis** lin per rideto. Ĉirkaŭ la Balta Maro oni **kontrabandas** alkoholon. La tablo estas **makulita** per inko. La strato estas **pavimita** per gruzo. Ni **propagandas** Esperanton. La komercistoj **reklamas** siajn varojn. Tiu vojo ne estas **signita** sur landkarto. La 15-an de Decembro ni **solenas** (= festas, celebras) la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof. Fulmotondro **teruris** (= timegigis) la infanojn. Ŝi **testamentis** sian tutan havaĵon al Esperanto.

**Netransitivaj:** La arboj jam **ekburĝonas**. Dimanĉe ni **ekskursis** al la montaro. Parolante la surdmutuloj **gestas** (= faras gestojn) kaj **grimacas** (= faras grimacojn). Hirundoj **nestas** sub la rando de la tegmento. Ili **polemikis** pri politiko. Li **procesis** kun (kontraŭ) sia antaŭa amiko. La kelnero respekte **riverencis**. La ministoj **strikis** kvar tagojn. Oni **tostis** (ankaŭ **toastis**) por la jubileulo. La avo **valsis** (= dancis valson) kvazaŭ dudekjarulo.

- D. **Havi -on (transitivaj):** La virinoj **abomenas** la ratojn. Li ne volis sidiĝi sur la malseka herbo, ĉar li **domaĝis** siajn vestojn. Ŝi profunde **funebriis** la morton de sia edzo. Mi ne bone **konceptas** vian proponon.

**Netransitivaj:** La mortanto jam **agonias**. La ŝipo **averiis** (= havis averion) ĉe la bordo de Nov-Zelando. Kiam oni estas malsata, ĉiu manĝaĵo **gustas** bone (= havas bonan guston). Li **oficis** en la ministerio por eksteraj aferoj. Soldato **postenas** ĉe la municiejo. Ĉu mi **rajtas** (= havas la rajton) eniri? Tiel **statas** (= tian staton havas) la afero.

- E. **Doni -on (transitivaj):** Li **animis** la kunvenon per gajaj spritaĵoj. **Diplomita** inĝeniero. Malavara samideano **financis** la grandskalan propagandon. La arboj verde **koloras** la pejzaĝon (= donas al la pejzaĝo verdan koloron). Li **motivis** sian foreston per malsano. **Patentita** fabrikmanko. **Premiita**

verko. **Privilegiita** klaso. **Salajrata** oficisto.

F. **Transitivaj:** Al kiu la letero estas **adresita**? La kino **afîsis** sian novan filmon en la tuta urbo. En Esperanto oni **akcentas** la antaŭastan silabon, Mi ne **almozos** (almozpetos) vian amon! La salono povas **ampleksi** (enhavi, enteni) kvarcent homojn. Tiu opinio estas **bazita** sur miskompreno. Li forgesis **dati** la leteron. Li estis tre **embarasita** pro la surpriza demando. Kato **embuskas** birdon. Ford **fabrikas** aŭtojn (aŭtomobilojn). Ĉiuj domoj estis **flagitaj**. Stockholm estas **nomata** (= nomiĝas) «Venecio de la Nordo». La biletoj estas **numeritaj** (= provizitaj per numeroj). Li **pretekstis** la eksigon per manko de tempo. Ni ĉiuj estimas kaj **respektas** vin (= havas respekton al vi). La malgranda Vilhelmo lernis **silabi**. Antaŭ kristnasko la komercistoj **enspezas** multe. Tute vane mi **elspezis** tiun monon. En kelkaj landoj oni **titolas** la gimnaziajn instruistojn profesoroj kaj la gimnaziajn lernantojn studentoj.

**Netransitivaj:** La ŝipo **ankris** en la rodo. La preĝantoj **genuis** (genufleksis). Mi ne scias, pri kio **temas**. La kastelo **tronas** alte super la urbo.

Por resubstantivigi tiujn verbojn oni uzas la sufikson **-ado**: **krono** – **kroni** – **kronado**; **martelo** – **marteli** – **martelado**; **skio** – **skii** – **skiado**; **profeto** – **profeti** – **profetado**; **kadro** – **kadri** – **kadrado**; **sango** – **sangi** – **sangado**; **broŝuro** – **broŝuri** – **broŝurado**; **burĝono** – **burĝonado**; **posteno** – **posteni** – **postenado**; **premio** – **premi** – **premiado**; **afiŝo** – **afiŝi** – **afiŝado**: **ankro** – **ankri** – **ankrado**, k.t.p.

Sed inter **pluvo** kaj **pluvado**, **reklamo** kaj **reklamado**, **polemiko** kaj **polemikado**, **respekto** kaj **respektado** k.a. la diferenco ne estas granda, kaj en tiaj okazoj oni bezonas uzi la sufiksajn formojn nur tiam, kiam temas pri daŭra ago.

## 2. Adjektivaj radikoj.

Li ne **atentis** ŝiajn petojn. Ŝi ne **kuraĝis** levi sian rigardon. Ŝi **malfruis** (= venis malfrue, malfruiĝis) al la vagonaro. Li **furiozis** kiel sovaĝa besto. La virinoj ofte **kapricas** kaj **koketas**. Kriplulo **lamas** (= iras lame) sur la strato. La trajno **rapidas** (= veturis rapide) tra marĉoj kaj arbaroj. La arbaro **nigras** en la krepusko. La maro **bluis** malproksime. Lia skribaĵo **abundas** je eraroj. Neniu **egalas** (= estas egala) al li (lin) en lerteco. La sorto **favoras**



(= estas favora) al vi (vin). Ŝi **fieras** pri sia filo. Kelkaj frankoj ne **gravas** (= estas gravaj), kiam temas pri grandaj sumoj. Kelkaj homoj **inklinas** (= havas la inklinon) longe paroli. Lia edzino **ĵaluzas** ĉiun virinon (= estas ĵaluza al aŭ kontraŭ ĉiu virino), kun kiu li parolas. Pro paralizo la maljunulo ne **kapablis** (= estis kapabla) mem movi sin. La eldonejo mem **kulpas** (= estas kulpa) pri (en) tio, ke la libro estas malmulte aĉetata. Ĉu **necesas** (= estas necese) aldoni, ke baldaŭ ili geedziĝis? Vi **pravas** (= estas prava). La infanoj kutime **similas** (= estas similaj) al siaj gepatroj (aŭ siajn gepatrojn). Dek minutoj plene **sufiĉas** (= estas sufiĉaj) por iri al la stacio. Per tio vi nur **malutilos** (= faros malutilon) al la afero (aŭ la aferon). Ŝi ne **indas** (= estas inda) vian amon. La maljunulinoj **emas** (= estas emaj) multe babil.

Kompreneble ne ĉiuj adjektivoj estas tiamaniere verbigeblaj, kaj, kiel ni jam diris, la verbo ĉe tio ne estas egala al adjektivo kun estas. Komparu ekzemple la formojn *kuraĝis* (= havis kuraĝon) kaj *estis kuraĝa*, *lamas* (= iras lame) kaj *estas lama*, *rapidis* (= iris, veturis rapide) kaj *estas rapida*, *favoras* (= elmontras favoron) kaj *estas favora*, *malutilos* (= faros malutilon) kaj *estos utila*, k.t.p. Kelkfoje tamen la senco de la verbo kaj adjektivo kun *esti* tiom proksimiĝas, ke estas egale, kiun el ili oni uzas. Sed malgraŭ tio restas certa diferenco kaj la stila valoro ne estas la sama, ĉar adjektivo kun *esti* indikas ja staton, dum la verbo esprimas agon.

Kun la koloroj kelkaj uzas la sufikson *-iĝi*, ekzemple *la arbaro nigriĝas* anstataŭ *nigras*. Sed inter tiuj du formoj estas ja granda diferenco! Ĉar *nigriĝas* signifas «fariĝas nigra», dum *nigras* = impresas nigre. La sama diferenco estas inter *bluiĝas* kaj *bluas*, *verdiĝas* kaj *verdas*, k.t.p.

La verboj el adjektiva radiko estas generale netransitivaj, sed pro la ebleco anstataŭigi prepozicion per akuzativo (vidu § 75) parto el ili (precipe *egali*, *favori*, *simili*, *indi* k.s.) estas uzata ankaŭ transitive.

### 3. Prepozicioj.

El la prepozicioj kutime nur *anstataŭ*, *ĉirkaŭ*, *per* kaj *super* estas verbigataj: *Neniu alia lingvo povas anstataŭi Esperanton*. *Altaj montoj ĉirkaŭas la urbon*. *Hazardo peris ilian renkontiĝon kaj konatiĝon*. *Tio superas miajn kapablojn*. Kiel montras la ekzemploj, ili ĉiuj estas transitivaj.

#### 4. Adverboj kaj interjekcioj.

Ĉu vi povas **prunti** (kutime oni diras *pruntedoni*) al mi vian tranĉilon? Tiun ĉi libron mi **pruntis** (kutime oni diras *prunteprenis*) el biblioteko. La filo **spitis** la deziron de siaj gepatroj. Mi venis por **adiaŭi** vin (= diri al vi adiaŭ). La kato **miaŭas**. Komence ŝi **neis**, sed fine ŝi **jesis** tion.

## 132. Afiksoj.

La afiksa sistemo ne estas specialaĵo de Esperanto. – Ankaŭ la naciaj lingvoj uzas diversajn prefiksojn kaj sufiksojn. Tamen neniu alia lingvo havas tiel genie simplan, regulan kaj produktivan derivadon kiel Esperanto, kie ĉiu prefikso kaj sufikso havas sian firme difinitan sencon kaj estas tute regule uzata. Dank' al tio ĉiu iom lerta esperantisto povas facile kaj sen risiko erari el malgranda nombro da radikoj devenigi senliman kvanton da novaj vortoj kun tute nova senco, per kiuj oni povas esprimi ĉiujn nuancojn de la homa penso. Tial Esperanto estas unu el la plej nuancricĥaj lingvoj, kvankam la provizo de ĝiaj radikoj estas multoble pli malgranda ol en iu alia lingvo.

En la derivado partoprenas ĉefe substantivoj, adjektivoj kaj verboj, ankaŭ prepozicioj kaj numeraloj, dum la konjunkcioj, interjekcioj kaj pronomoj neniam estas uzataj por tio. Ĉe tio ne estas diferenco inter radikaj kaj devenigitaj substantivoj, adjektivoj kaj verboj. La sufiksoj aliĝas rekte al la radiko kaj la necesa gramatika finaĵo sekvas nur en la fino de la vorto.

Multaj afiksoj estas detale pritraktitaj jam en la antaŭaj lecionoj.

## 133. La substantiva sufikso *-aĵo*

kiu indikas objekton kun la ecoj de la radiko aŭ rezulton de ago, estas uzebla kun ĉiaj vortoj, se nur la senco tion permesas (same kiel *mal-*, *fĥ-*, *-aĉ-*, *-et-*, *-eg-*, *-ejo*, *-isto*, *-ismo*, *-igi*, *-iĝi* kaj *-um-*): *nova* – *novaĵo*; *alta* – *altaĵo*; *sukero* – *sukeraĵo*; *tolo* – *tolaĵo*; *porko* – *porkaĵo*; *manĝi* – *manĝaĵo*; *pentri* – *penetraĵo*; *kreski* – *kreskaĵo*; *supre* – *supraĵo*; *ĉirkaŭ* – *ĉirkaŭaĵo*, *ekster* – *eksteraĵo*; *post* – *postaĵo*, k.t.p.

Same kiel *-ujo*, *-ingo*, *-ilo*, *-aro*, *-ero*, *-ejo* k.a., ankaŭ *-aĵo* devenigas vortojn kun tute speciala kaj konstanta signifo: ne ĉio, kio kreskas, estas *kreskaĵo*, ne ĉio tola estas *tolaĵo*, k.t.p.

Atentu la diferencon inter *vesto* = la ago vesti, *verko* = la ago verki, *kanto* = la ago kanti kaj *vestaĵo* = tio, per kio oni vestas sin, *verkaĵo* = tio, kio estas verkita, *kantaĵo* = tio, kio estas kantata. Sekve kun la finaĵo *-o* verbaj radikoj indikas agon, kun la sufikso *-aĵo* ion konkretan, karakterizatan de la radikoj. Sed tiu diferenco inter *-o* kaj *-aĵo* fariĝas en la praktika lingvouzo ĉiam pli malofta kaj preskaŭ ĉiam oni diras: *vesto* anstataŭ *vestaĵo*, *verko* anstataŭ *verkaĵo*, *kanto* anstataŭ *kantaĵo*, k.t.p. En multaj okazoj tiu *-aĵo* tamen ne estas evitebla: *trinkaĵo*, *kreskaĵo*, *skribaĵo*, *legaĵo* k.t.p.

### 134. *-um-*,

same kiel la prepozicio *je*, ne havas firman sencon kaj estas uzata nur tiam, kiam neniu alia sufikso taŭgas (tiuj nemultaj okazoj estas jam fiksitaj de la lingvouzo kaj *-um-* preskaŭ ĉesis esti produktiva sufikso): *nazo* – *nazumo*; *buŝo* – *buŝumo*; *kolo* – *kolumo*; *mano* – *manumo*; *kalkano* – *kalkanumo*; *komuna* – *komunumo*; *lakto* – *laktumo*; *kruco* – *krucumi*; *gusto* – *gustumi*; *okulo* – *okulumi*; *palpebro* – *palpebrumi*; *butono* – *butonumi*; *sapo* – *sapumi*; *mastro* – *mastrumi*; *vento* – *ventumi*; *aero* – *aerumi*; *plena* – *plenumi*; *malvarma* – *malvarmumi*; *proksima* – *proksimume*; *aminda* – *amindumi*, k.t.p.

Kiel montras la supraj ekzemploj, *-um-* estas uzata ankaŭ por verbigado de substantivoj kaj adjektivoj, kiam la sola verba finaĵo por tio ne sufiĉas (vidu ankaŭ § 131): ne «*okuli*», sed *okulumi*, ne «*aeri*», sed *aerumi*, k.t.p.

### 135. *Ge-*,

kiu kunigas personojn de ambaŭ seksoj, estas uzebla nur kun substantivoj kaj devenigas ĉiam substantivojn, simile al: *bo-*, *eks-*, *-ano*, *-ĉjo*, *-njo*, *-estro*, *-ido*, *-ino*, *-aro*, *-ero* kaj *-ingo*: *gepatroj* = patro kaj patrino aŭ patroj kaj patrinoj, gefratoj, geedzoj, gefianĉoj, gemastroj, *gesinjoroj* = sinjoro kaj sinjorino aŭ sinjoroj kaj sinjorinoj, *gesamideanoj*, *geamantoj*, *gekonat(ul)oj*, k.t.p.

Ĉar *ge-* estas plurala prefikso, la vortoj kun ĝi devas havi

multnombran finaĵon, sed kompreneble nur en la substantiva formo. Ĉe plua derivado tiu *-j* foriĝas: *gepatra lingvo*; *geedza tragedio*; ili *geedziĝis*.

Por bestoj *ge-* kutime ne estas uzata.

### 136. **Bo-**

indikas parencecon per geedziĝo: *bopatro*, *bopatrino*, *bofilo*, *bofratino*, *bogepatroj* k.t.p.

### 137. **-ino**

indikas virinan sekson: *patro* – *patrino*; *frato* – *fratino*; *sinjoro* – *sinjorino*; *fraŭlo* – *fraŭlino*; *lernanto* – *lernantino*; *virgulo* – *virgulino*; *Paŭlo* – *Paŭlino*; *koko* – *kokino*; *porko* – *porkino* k.t.p.

La nomoj de la bestoj estas kutime sekse neŭtralaj: *ĉevalo* estas nek vira nek ina, sed simple certa tirbesto. Por indiki viran sekson, kiam tio estas necesa, oni uzas prefikse la vorton *vir-*: *ĉevalo* – *ĉevalino* – *virĉevalo*; *ŝafo* – *ŝafino* – *virŝafo*; *kato* – *katino* – *virkato*. Sed kiam ne estas nepre necese substreki la sekson, oni diras simple *ĉevalo*, *ŝafo*, *kato* k.t.p., egale, ĉu temas pri vira aŭ ina besto.

**Rimarko 1:** Kelkaj uzas la vorton *viro* sufikse (*ĉevalviro* anstataŭ *virĉevalo*), sed tio estas kontraŭregula kaj erariga. Fakte *ĉevalviro* signifas viron, kiu okupas sin pri ĉevaloj (t.e. ĉevalisto).

**Rimarko 2:** Koko kaj bovo estas viraj bestoj.

### 138. **-ido**

indikas posteulon : *ĉevalido*, *bovido*, *ŝafido*, *birdido*, *izraelido*, *homido*, *latinidaj lingvoj*. Krom tio ankaŭ *arbido* kaj *plantido*.

### 139. **-ĉjo kaj -njo.**

Per tiuj ĉi sufiksoj ni devenigas karesajn nomojn, aldonante ilin al la 1-6 litero de la nomo.

1. *-ĉjo* estas uzata por viraj nomoj: *Petro* – *Peĉjo*, *Johano* – *Joĉjo*, *Aleksandro* – *Aleĉjo*. Same: *patro* – *paĉjo*. Kelkfoje estas uzataj ankaŭ *onklo* – *oĉjo* kaj *frato* – *fraĉjo*.

2. *-njo* estas la responda sufikso por virinaj nomoj: *Mario* –

*Manjo, Sofio – Sonjo, Elizabeto – Elinjo*. Same: *patrino – panjo* kaj pli malofte *onklino – onjo* kaj *fratino – franjo*.

**Rimarko:** Samsence estas uzata ankaŭ la malgrandiga sufikso *-et-*: *patrineto, frateto, onklineto, Marieto*. Por bestoj estas uzata nur *-et-*: *hundeto, ĉevaleto, birdeto*.

### 140. -estro

indikas ĉefon: *urbo – urbestro; ŝipo – ŝipestro* (= kapitano); *polico – policestro; regno – regnestro; lernejo – lernejestro*.

### 141. -aro kaj -ero

estas malaj unu al la alia: *-aro* indikas kolekton de samspecaj aĵoj, dum *-ero* nomas unu el la samspecaj partoj, el kiuj la tuto konsistas.

1. *-aro*: *vorto – vortaro* (= vortlibro, leksikono); *arbo – arbaro; kampo – kamparo* (= «malurbo»); *vagono – vagonaro* (= trajno); *monto – montaro; ŝtupo – ŝtuparo; homo – homaro*. Ne temas do pri hazarda kolekto, sed pri vortoj kun memstara kaj konstanta senco – kolekto aŭ listo de vortoj tute ne estas ankoraŭ *vortaro* (= vortlibro), kaj amaso de homoj ne estas *homaro*, sed nur *homamaso*.

2. *-ero*: *sablo – sablero; neĝo – neĝero; polvo – polvero; ĉeno – ĉenero; fajro – fajrero; greno – grenero; mono – monero*. *-ero* ne estas identa al peco aŭ parto kaj estas granda diferenco inter ekzemple *ĉenero* kaj *ĉenpeco* (= peco de ĉeno); tial ankaŭ ne «*vitrero*» kaj «*sukerero*», sed *vitropeco* kaj *sukerpeco*.

### 142. Eks-

signifas «antaŭa, eloficigita»: *eksreĝo, eksministro, eksoficiro, eksinstruisto, ekslernanto* k.t.p.

### 143. Pra-

indikas malproksiman parencecon kaj apartenon al malproksima pasinteco: *prapatro, praarbaro, prahomo, pratempo, prahistorio, pratipo*, k.t.p. Ankaŭ: *pranepo*.

### 144. -oza

estas neoficiala sufikso, kiu devenigas el substantivoj adjektivojn kun la senco *hava, plena, riĉa*: *oroza* (= orhava, orriĉa) *sablo*; *ŝtonoza* (= ŝtonplena, ŝtonriĉa) *vojo*; *nuboza* (= nuba, nuboplena) *ĉielo*; *poro – poroza* (= porhava) k.t.p.

### 145. *Dis-*,

uzata kun verboj kaj ne influanta ilian karakteron, same kiel *mis-*, *ek-* kaj *re-*, estas malo de *kun*: *disiri* (komp. *kunveni*), *diskuri*, *disŝiri*, *disĵeti*, *disdoni*, *dissendi*, *disporti*, *disvastiĝi* k.t.p.

### 146. *Mis-*

signifas «erare, malĝuste, malbone»: *miskompreni* = erarkompreni, malĝuste kompreni; *misuzi* = trouzi, malbonuzi, eraruzi; *mistrakti* = malbone trakti k.t.p.

### 147. *Re-*

indikas revenon kaj ripeton: *reveni*, *reiri*, *reskribi*, *refari*, *rebrili*, *resendi*, *repagi*, *revidi*, *reformi*, *refoje*, *returne* k.t.p. Anstataŭ *re-* oni povas uzi ankaŭ *returni* (pri loko), *denove* (pri tempo).

### 148. *-ado*

indikas daŭran aŭ ripetitan agon kaj servas ĉefe por substantivigi verbojn: *kanti – kanto – kantado*; *verki – verko – verkado*; *krii – krio – krio – krio*; *danci – danco – dancado* k.t.p.

En § 131 ni vidis, ke *-ado* servas ankaŭ por resubstantivigi verbojn, derivitajn el substantivoj (*fabriko – fabriki – fabrikado* k.t.p.). En tiu okazo la ago eĉ ne bezonas esti daŭra aŭ ripetata.

Kun verbaj formoj *-ad-* speciale substrekas, ke la ago estas daŭra aŭ ripetata: *iradi* = iri longe kaj ripete, *bicikladi* = ofte bicikli, *legadi* = multe legi, k.t.p.

### 149. *-ema*,

kiu indikas inklinon, devenigas adjektivojn el verboj, same kiel: *-ebla*, *-inda* kaj *-enda*: *labori – laborema*; *lerni – lernema*; *paroli – parolema*; *dormi – dormema*; *cedi – cedema*; *danki – dankema*,

k.t.p. Same ankaŭ kun derivitaj verboj: *biciklo – bicikli – biciklema; profito – profiti – profitema; malsana – malsani – malsanema; pura – puriĝi – purigema; ruĝa – ruĝiĝi – ruĝiĝema; mastro – mastrumi – mastrumema*, k.t.p.

Kelkfoje *-ema* estas uzata eĉ kun senverabaj substantivoj kaj adjektivoj: *ordo – ordema; pura – purema*.


### 150. *-ebla*

indikas, ke tio, kion esprimas la radiko, povas esti farata: *legi – legebla; vidi – videbla; kredi – kredebla; manĝi – manĝebla*, k.t.p. Ĝi estas uzebla nur kun transitivaj verboj.

### 151. *-inda*

indikas, ke tio, kion esprimas la radiko, valoras esti farata: *ami – aminda; laŭdi – laŭdinda; legi – leginda; bedaŭri – bedaŭrinda – bedaŭrinde*, k.t.p. Ankaŭ ĝi estas uzebla nur kun transitivaj verboj.

### 152. Afiksa tabelo.





### 153. Pseŭdosufiksoj.

Krom la pritraktitaj 42 prefiksoj kaj sufiksoj (ne kalkulante la t.n. sciencajn aŭ teknikajn afiksojn: *-iva*, *-izi* k.a., kiuj ne estas uzataj en la ĉiutaga vivo), troviĝas tuta vico da t.n. pseŭdosufiksoj, kiuj fakte apartenas al la radiko de la internaciaj kulturvortoj kaj kutime ne estas uzataj por derivado: *redakti* – *redakcio* (= redaktejo, redaktistaro) – *redaktoro* (= redaktisto, redaktanto); *inspekti* – *inspektoro* (inspektisto); *direkti* – *direktoro* – *direkcio* (direktantaro) – *direktorio*; *civilizi* – *civilizacio* (= civilizo); *organizi* – *organizacio* (= organizo, organizaĵo) – *organizatoro* (= organizanto); *evolui* – *evolucio* (= evoluo); *apendico* – *apendicito*, k.t.p. Ankaŭ: *-isto* kaj *-ismo* estas ofte nur pseŭdosufiksoj: *antagonisto*, *antagonismo*, *katolicismo* (=katolikismo), *militarismo*, *militaristo*, *optimisto*, *optimismo* k.t.p.

Ekzistas tendenco forigi tiujn pseŭdosufiksojn kaj anstataŭigi ilin per regulaj Esperantaj derivaĵoj: *redaktejo* kaj *redaktistaro* anstataŭ *redakcio*, *redaktisto* aŭ *redaktanto* anstataŭ *redaktoro*, *organizo* aŭ *organizaĵo* anstataŭ *organizacio*, *evoluo* anstataŭ *evolucio*, k.t.p. Per tio kompreneble gajnas la unueco kaj reguleco de la lingvo kaj ĝi fariĝas pli facila por la popoloj, kiuj la internaciajn kulturvortojn en sia lingvo ne uzas, precipe ekstereŭropanoj. Sed aliflanke tio malproksimigas Esperanton de la eŭropaj lingvoj, el kiuj almenaŭ unu konas ĉiu kulturhomo en la tuta mondo.

### 154. La principo de neceso kaj sufiĉo.

La derivado okazas en Esperanto laŭ la principo de neceso kaj sufiĉo, t.e. oni devas uzi tiom da elementoj, kiom estas necese por la difino de la ideo, sed ne pli multajn ol sufiĉas por la klareco de la esprimo. Se oni ekzemple volas nomi la agon de tiu, kiu parolas antaŭ publiko, tiam ne sufiĉas la simpla *parolo* kaj la matematike preciza «*antaŭpublikparolataĵo*» enhavas pli multe da elementoj ol estas nepre necese. Tial ni elektas la oran mezon kaj diras *parolado*, kiu kontentigas ambaŭ postulojn.

Laŭ la principo de sufiĉo oni diras simple: *timulo*, *drinkulo*, *konato*, *ŝprucilo*, *ŝuisto*, *laboremo*, *malsanemo* ktp. anstataŭ la pli longaj: *timemulo*, *drinkemulo*, *konatulo*, *ŝprucigilo*, *ŝufaristo*, *laboremeco*, *malsanemeco* k.t.p. Entute *-eco* estas malofte uzata por substantivigo de *-ema*: *dormemo* (ne *dormemeco*), *lernemo* (ne

*lernemeco*) k.t.p. Sed por substantivigo de *-inda* ĝi estas ĉiam uzata: *amindeco* (ne «*amindo*»), *vidindeco* (ne «*vidindo*») k.t.p. *-eco* ludas gravan rolon ĉe la substantivigo de la adjektivaj radikoj: *La belo* (aŭ *Belo*) kaj *la bono* (aŭ *Bono*) *guidu nin tra la vivo*. *Ŝi fieris pri sia beleco* (ne «*belo*»). *La boneco* (ne «*bono*») *de la sveda ŝtalo estas mondkonata*.

Laŭ la principo de sufiĉo oni uzas *kanto*, *vesto*, *verko*, *manĝo* k.t.p. anstataŭ la pli longaj *kantaĵo*, *vestaĵo*, *verkaĵo*, *manĝaĵo*. Same oni povas forlasi la sufikson *-ino*, kiam ĝi ne estas nepre necesa: *Oni elektis s-inon Eriksson prezidanto* (anstataŭ *prezidantino*) *de la kunveno*. *La sekretario* (anstataŭ *sekretariino*) *de nia klubo estas f-ino Maulrois*. Cetere, la uzo de *-ino* donus al tiuj frazoj eĉ iom alian sencon, substrekante, ke la prezidanto kaj sekretario nepre devas esti virinoj kaj ke krome troviĝas ankaŭ vira prezidanto kaj sekretario.

Kelkaj pekas kontraŭ la principo de sufiĉo, trouzante la sufiksojn: *-ad-*, *-et-*, *-eg-*, *-aĉ-* k.t.p.: *Mi lernadas Esperanton*. *Mi deziras korespondadi*. *Li laboradas la tutan tagon*. Per *-ad-* oni ja volas akcenti la daŭron kaj ripetiĝon de la ago, sed ofte tio evidentiĝas jam el la kunteksto kaj sekve *-ad-* estas superflua. La verboj *lerni* kaj *korespondi* jam per si mem indikas daŭran agon, kial do ankoraŭ tiu *-ad-*! Kaj en *Li laboras tutajn tagojn* la komplemento *tutajn tagojn* montras, ke temas pri daŭra kaj ripetada ago. Uzu do la afiksojn nur tiam, kiam ili vere estas necesaj, sed ne pendigu ilin al ĉiu vorto!

## 155. Afiksoj kiel memstaraj vortoj.

En Esperanto la afiksoj ne estas nuraj gramatikaj finaĵoj, kiel en la naciaj lingvoj, sed veraj vortoj, uzeblaj ankaŭ tute memstare:

**Disa, dise:** *La libroj kuŝas dise sur la tablo*. *Ĉi tie disiĝas niaj vojoj*.

**Eksa:** *Li estas mia eksa* (= antaŭa) *lernanto* (= ekslernanto).

**Fia, fie:** *Kelkaj ĉefoj traktas siajn subulojn en fia maniero*.

**Mala, male, malo:** *La vorto «sen» estas malo de «kun»*. *La diplomatoj agas ofte male al siaj vortoj*.

**Praa:** *La praaĵ homoj* (= prahomoj) *estis primitivaj*.

**Rea, ree, reen:** *Ree* (= denove) *ŝi malfruis al la vagonaro*. *Post kelkaj paŝoj li rigardis reen* (= rigardis returne, rerigardis). *Je mia rea vizito mi trovis lin hejme*.

**Ade** (uzata tre malofte): *La geedzoj ade* (= ofte, senĉese, konstante) *malpacas*.

**Aĉa, aĉe:** *Nun ni trafis en vere aĉan situacion.*

**Aĵo:** *Vi forgesis kelkajn viajn aĵojn* (= objektojn) *ĉe ni.*

**Ano:** *Nia klubo havas tridek anojn* (= membrojn).

**Aro, are:** *Aro* (= grupo, amaso) *da homoj kolektiĝis ĉirkaŭ la kverelantoj. La ŝafoj iras ĉiam are* (= grupe, amase). *Ni veturis al la kongreso grand-are* (= multnombre).

**Ebla, eble:** *Tio tute ne estas ebla! Eble vi povos veni morgaŭ?*

**Eco:** *Li havas ankaŭ kelkajn bonajn ecojn* (= kvalitojn).

**Ejo:** *Antaŭ kelkaj monatoj nia societo transloĝiĝis en novan ejon.*

**Emi, emo:** *Hodiaŭ mi ne emas skribi. En altaj lokoj kelkaj homoj havas grandan emon salti malsupren.*

**Ero:** *Mi ne havas eĉeron da fido al li.*

**Estro, estri:** *Kapitano estas la estro de la ŝipo. Ŝi plene estras la portugalan lingvon.*

**Eta:** *La koro estas eta* (= tre malgranda) *instrument' sekreta. Eta havas samtempe ankaŭ karesan sencon.*

**Ido:** *La kato portas siajn idojn per la buŝo.*

**Igi:** *La malfeliĉo igis* (= faris) *lin tute malespera. Singardemo igis lin ŝlosi la biciklon.*

**Iĝi:** *La vetero iĝis* (= fariĝis) *denove bela.*

**Ilo:** *Esperanto estas grava ilo* (= rimedo, instrumento) *por la interfratiĝo de la popoloj.*

**Ino, ina:** *Ina* (= virina) *sekso. Pri homoj ino havas malŝatan nuancon, kvankam kelkaj uzas ĝin simple anstataŭ virino.*

**Inda, inde, indi:** *Li ne kredis sin inda por tiaj laŭdoj. En kelkaj landoj la laboristoj ne ricevas hom-indan salajron. Ne indas klopodi, ĉar tamen la afero ne povas sukcesi.*

**Ingo:** *La knabo elprenis la plumon el la ingo.*

**Ujo:** *Ĉu vi havas iun ujon, kien ni povu verŝi la lakton?*

**Ulo:** *La ulo estis ĉifone vestita. Same kiel ino, ankaŭ ulo havas malŝatan nuancon, kvankam de kelkaj ĝi estas uzata simple anstataŭ viro.*

Kompreneble oni povas ankaŭ al la afiksaj vortoj aldoni diversajn aliajn afiksojn: *disigi, disigi, diseco, eksigi, eksigi, eksiginda, fiulo, fiulino, fienco, aĉulo, aĉulino, aĉega, aĉeco, aĵeto, anaro, anigi, aniĝi, anino, aneco, areto, arigi, arigi, ebleco, ebligigi, ebligigi, eblaĵo, ecaro, ejeto, ejaro, ereto, diserigi, estrado, estreco, estriĝi, estrema, estrino, estraro, estrarano, etulo, etulino, etularo, idaro, idino, ideto, ilaro, ilarejo, ineto, inaĉo, indeco, malinda, malindeco, ujeto, ulaĉo, uleto, ulino, emigi, emulo* k.t.p.

Provu traduki tiujn vortojn al via gepatra lingvo!

### **TASKO 17.**

Devenigu el la sekvantaj vortoj laŭeble multe da derivaĵoj kaj penu traduki ilin al via gepatra lingvo: *sana, nova, porko, lavi, per, ĉirkaŭ, unu.*

# DUDEKA LEClONO

## 156. Stilo.

Stilo estas nomata la maniero, en kiu oni esprimas siajn pensojn. Kiel memstara kaj vivanta lingvo Esperanto havas kompreneble sian propran stilon. Kia do estas la Esperanta stilo? Tiun demandon D-ro Zamenhof respondas jene (Lingvaj Respondoj, paĝo 78): «La vera stilo Esperanta estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas – aŭ almenaŭ devas esti – nur stilo simpla kaj logika». Kio do estas logika, simpla kaj klara, tio estas bona, kio estas nelogika, komplikita kaj malklara, tio estas malbona, kvankam oni eble ne pekas kontraŭ gramatikaj reguloj.

Por havi bonan, elegantan kaj internacian stilon, oni devas bone koni la lingvon kaj ĝian spiriton, oni devas havi la kapablon pensi logike kaj rektlinie kaj oni ne rajtas blinde imiti sian gepatran lingvon. Kio estas la rezultato de laŭvorta tradukado, tion klare montras letero, kiun Zamenhof foje ricevis de rusa komencanto (Lingvaj Respondoj, paĝo 79):

«Favora Regnestro! Honoro havas alkuŝigi, kio laŭ kaŭzo de antaŭskribita al mi kun kuracisto kuraco mi en efektiva tempo ne en stato elpleni de donita kun mi al vi promeso; apud kio postaperigas, ke mi turnos sin al domo tra du monatoj, ne pli frue de fino de Aŭgusto».

En bona kaj internacia Esperanto tiu letero aspektus jene:

«Estimata sinjoro! Mi havas la honoron raporti al vi, ke kaŭze de kuracado, rekomendita al mi de la kuracisto, mi en la nuna tempo ne povas plenumi la promeson, kiun mi donis al vi; mi ankaŭ sciigas vin, ke mi revenos hejmen post du monatoj, ne pli frue ol en la fino de Aŭgusto».

Ni vidas, kia granda diferenco estas inter la «originala» kaj la

korektita letero! La kaŭzo estas tio, ke la rusa komencanto tradukis el sia gepatra lingvo ĉiun vorton aparte, neglektante la rilaton inter ili kaj ilian logikan sencon, dependantan de la kunteksto, dum en la korektita letero estas tute precize reproduktita la enhavo. Kvankam en ambaŭ okazoj temas pri fidela kaj preciza traduko, la rezulto estas tamen tre malegala.

Tiajn nekompreneblajn kriptogramojn, kian la rusa komencanto sendis al Zamenhof, povus fari ankaŭ angloj, francoj, germanoj kaj ĉiuj aliaj popoloj, se ili laŭvorte tradukus el sia gepatra lingvo, ne nur al Esperanto, sed ankaŭ al kiu ajn alia lingvo. Tial ne traduku mekanike la unuopajn vortojn kaj formojn, sed penu ĉiam eltrovi ilian logikan enhavon, kaj tiun enhavon reproduktu en Esperanto laŭ ĝiaj reguloj kaj ĝia spirito!

Ĉiu homo tiel kutimiĝis al sia gepatra lingvo, ke al li ŝajnas, ke ĝi estas el ĉiuj lingvoj la plej natura, la plej logika kaj la plej bona. Sed fakte ĉiu nacia lingvo svarmas je nelogikaĵoj kaj sensencaĵoj, kiuj estas nekompreneblaj kaj ofte eĉ ridindaj por eksterlandano, ĉar neniu nacia lingvo sekvas la rektajn vojojn de la racio kaj logika pensado, sed nur tiujn de la tradicio kaj kutimoj. Tiaj nelogikaj kaj laŭforme absurdaj esprimoj estas nomataj idiotismoj. Ĉiu nacia lingvo havas siajn proprajn idiotismojn, kiuj ne estas laŭvorte tradukeblaj al aliaj lingvoj.

Por ilustro ni prezentas ĉi-sube laŭvortajn tradukojn el kelkaj lingvoj. Estona: «Kiel la mano iras?» Finna: «Kiel vi povas?» Rusa: «Kiel la aferoj» Germana: «Kiel ĝi iras?» Franca: «Kiel vi portas vin?» Angla: «Kiel faras vi faras?» Itala: «Kiel vi staras?» Sveda: «Kiel staras ĝi al?» Ĉeĥa: «Kiel vi havas vin?» Norvega: «Kiel vi trovas vin?» Hungara: «Kiel vi estas?» Malgraŭ la malegaleco de la formo ili ĉiuj havas tute saman sencon: *Kiel vi fartas?* La rusoj ne dancas laŭ piano, sed «sub piano». Veraj akrobatoj! Kiam la svedo venas ien en la lasta momento, oni diras, ke li venis «en la tempo de la grafo», kaj kiam li mortas, oni diras, ke li «iris el la tempo». La estonoj ne metas la ĉapelon sur la kapon kaj la piedojn en la ŝuojn, sed ili metas la ĉapelon «en la kapon» kaj «la ŝuojn en la piedojn»; la estonaj maljunuloj portas barbon ne sur la mentono aŭ ĉirkaŭ la buŝo, sed «en la buŝo». Kaj kiam la estono diras, ke «preĝeja sinjoro metis mortintan korpon en lignan ĉemizon» tio signifas, ke pastro benis mortinton okaze de la enĉerkigo. Certe ankaŭ en via propra lingvo vi povas trovi multajn tiajn «perlojn».

Se nun ĉiu popolo laŭvorte tradukus al Esperanto kaj uzus en ĝi siajn idiotismojn, ni ne plu komprenus unu la aliajn kaj anst. internacia lingvo ni havus ian kriptogramon. Tial ne imitu blinde vian gepatran lingvon, ne traduku el ĝi laŭvorte kaj ne postulu, ke la internacia lingvo estu en ĉiu detalo simila al ĝi.

Skribu kaj parolu ĉiam simple, klare kaj internacie, por ke ĉiuj facile kaj egale vin komprenu. Por tio estas necese, ke vi pensu ne en via gepatra lingvo, sed rekte en Esperanto. Komence tio ja estas malfacila, sed post kelktempa ekzercado kaj praktika uzado de la lingvo vi bone sukcesos. Tiam vi certe ne faros frazojn, similajn al «*Ni ĉiuj estas konsentaj kun via opinio temata pri fondiĝo apartan polican grupon*» kiun mi trovis en letero de relative perfekta s-ano, sed vi diros simple kaj elegante: *Ni ĉiuj konsentas kun vi pri la fondo de aparta polica grupo.*

Por akiri internacian kaj bonan Esperantan stilon, oni ne bezonas studi plurajn lingvojn, kiel kelkaj opinias, sed estas nur necese fundamente koni la strukturon kaj spiriton de Esperanto mem. Ilin vi plej bone ekkonos, zorge legante la gazetaron kaj literaturon, precipe la verkojn de nia Majstro kaj aliaj bonaj aŭtoroj, kaj interparolante kun alilandanoj.

Tiam vi konstatos ankaŭ tion, ke malgraŭ sia logikeco, malgraŭ la manko de idiotismoj la Esperanta stilo tute ne estas mekanika, seka kaj senviva kiel matematika formulo, kiel asertas kelkfoje la kontraŭuloj, sed ke sub la plumo de talenta poeto kaj verkisto, kiu plene estras la lingvon, ĝi povas esti same vivoplena, poezia kaj sukriĉa kiel en kiu ajn alia lingvo. La premiso de tia poezia stilo, kiu donas vivon, koloron kaj elastecon al la lingvo, estas la uzado de diversaj bildaj esprimoj aŭ poeziaj figuroj: *La luno velas sur la ĉielo. Ŝipo naĝas sur la maro. La tuta mondo kunvenis hieraŭ sur la Placo de Libereco. Vespero venas* k.t.p.

Tiaj bildaj esprimoj ne estas ja rigore logikaj kaj matematike precizaj, sed kun iom da fantazio ĉiu facile komprenas ilin, egale al kiu nacieco li apartenas. Tial eraras tiuj, kiuj asertas, ke la horloĝo ne povas iri, ke la kaldrono kaj potoj ne povas havi orelojn, ke vespero ne povas veni k.t.p. Ili forgesas, ke la lingvo ne estas matematika formulo, sed ilo por esprimi krom niaj pensoj ankaŭ niajn sentojn.

## **157. Historio de Lingvo internacia.**

La ideo de internacia lingvo ne estas produkto de la lasta tempo – jam en la malnovaj tempoj oni sentis<sup>1</sup> la valoron de komuna lingvo. En Biblio oni rakontas,<sup>2</sup> ke iam la tuta mondo havis unu lingvon kaj ke la nuna<sup>3</sup> multlingveco estas puno de Dio.

Siatempe kelkaj naciaj lingvoj, ekz. la babela, greka kaj latina, ludis la rolon de pli-malpli internacia lingvo. Sed ilia disvastiĝo estis bazita<sup>4</sup> sur ŝtata potenco, kaj kiam malfortiĝis aŭ falis la ŝtato, malaperis el la areno ankaŭ ĝia lingvo.

La unuaj, kiuj ekpensis pri artefarita mondlingvo, estas la grandaj filozofoj Bacon, Comenius-Komensky, Descartes kaj Leibnitz en la komenco de la nova epoko. Konataj estas entute pli ol 300 projektoj de artefarita lingvo, kiuj dividiĝas je tri grupoj:

1. Filozofiaj lingvoj, bildskriboj, signo- kaj ciferlingvoj k.a., plene elpensitaj<sup>5</sup> kaj ne bazitaj sur la ekzistantaj lingvoj.
2. Miksitaj lingvoj, kreitaj laŭ la modelo de la ekzistantaj lingvoj, sed kies gramatiko kaj vortaro estas grandparte elpensitaj de iliaj aŭtoroj.
3. Lingvoj, konstruitaj sur la bazo de la naciaj lingvoj.

Al la unua grupo apartenas ekz. la filozofia sistemo de G. Dalgarno (London 1661), la muzika lingvo *Solresol* de F. F. Sudre, aperinta<sup>6</sup> en Parizo en 1866, k.a. Dalgarno penis klasifiki ĉiujn homajn ideojn, kaj la 17 fundamentajn klasojn kaj iliajn multajn subklasojn li signis per grekaj kaj latinaj literoj. Tiamaniere li ricevis tiajn vortojn kiel ekzemple *Skam* dia favoro, *Skaf* adori, *Skab* juĝi, *Skad* peti, *Skag* ofero, *Neka* ĉevalo, *Neke* azeno, *Neko* mulo, k.t.p.

En *Solresol* la tuta gramatiko kaj vortaro estas kombinitaj el la 7 muziknotoj. Jen kelkaj ekzemploj: *si* jes, *do* ne, *re* kaj, *dore* mi, *domi* vi, *dofa* li, *redo* mia, *remi* via, *refa* lia, *doredo* tempo, *doremi* tago, *dorefa* semajno, *doresol* monato, *dorela* jaro, *doresi* jarcento, *domisol* Dio, *solmido* diablo, *misol* bono, *solmi* malbono, k.t.p. Tiun lingvon oni povis ne nur skribi kaj paroli, sed ankaŭ kanti, fajfi kaj ludi per kiu ajn muzik-instrumento. Por surdmutuloj estis ellaborita speciala gestsistemo kaj kolora kaj luma signalado estis ebla en ĝi per sep diversaj koloroj.

La plej konata kaj perfekta el la miksitaj lingvoj estas *Volapük* (1879), kreita de germana prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912). La gramatiko de *Volapük* estas sufiĉe simpla kaj regula, sed tute elpensita kaj artefarita: *löfon* ami, *löfob* mi amas, *löfom* li amas,



*lōfobs* ni amas, *lōfoms* ili amas, *älōfob* mi amis, *älōfof* ŝi amis, *elōfof* ŝi estas aminta, *ilōfol* ci estas aminta, *olōfols* vi amos, *ulōfols* vi estos amintaj, k.t.p.

La vortoj estas ĉerpitaj ĉefe el la angla, parte ankaŭ el la latina, germana kaj franca lingvoj, sed ili estas tiel ŝanĝitaj kaj deformitaj, ke plej ofte estas tute neeble rekoni ilin. La nomo mem de la lingvo devenas el la anglaj vortoj *world* "mondo" kaj *to speak* "paroli" (= Volapük). Plue *Yulop* Eŭropo, *Silop* Azio, *Fikop* Afriko, *Melop* Ameriko, *Talop* Aŭstralio, *plim* komplimento, *dol* doloro, *lol* rozo (r estas forigita, ĉar la ĉinoj ne povas ĝin elparoli), *fablüd* fabriko, *dünal* ministro, k.t.p.

Jen la preĝo «Patro nia» en *Volapük* (oni legas kiel estas skribite;<sup>7</sup> akcenton havas la lasta silabo):

*«O Fat obas, kel binol in süls, paisaludomöz nem ola! Kömomöd monargän ola! Jenomöz vil olik, äs in süls, i su tal! Bodi obsik vädeliki givelös obes adelo! E pardolös obes debis obsik, äs id obs aipardobs debeles obas. E no obis nindukolös in tentadi; sod aidalivolös obis de bad. Jenosöd!»*

El ĉiuj lingvoprojektoj, aperintaj antaŭ kaj post Esperanto, Volapük havis la plej grandan sukceson kaj disvastiĝon. En 1889, kiam ĝi atingis sian kulminon, ekzistis 283 societoj kaj 25 gazetoj. Pli ol 1000 diplomitaj instruistoj estis dissemintaj tra la tuta mondo. Lernolibroj estis aperintaj en 25 lingvoj kaj la literaturo konsistis el 384 libroj. Ĝi estis instruata en kelkaj superaj lernejoj en Eŭropo kaj Ameriko. Sed nun Volapük estas jam delonge tute mortinta kaj apartenas jam nur al la historio.

Laste<sup>8</sup> venas la lingvoj, kiuj estas kreitaj sur la bazo de la ekzistantaj lingvoj, ekz. Esperanto, Ido, Occidental, Novial, Interlingua, Idiom Neutral k.a. Ili fakte ne estas artefaritaj, kiel Volapük, Solresol k.a., sed estas same naturaj kiel la naciaj lingvoj, el kies elementoj ili estas kompilitaj. Pro tio<sup>9</sup> la mondkonata dana lingvisto Jespersen nomas ilin kombinitaj aŭ konstruitaj lingvoj. Krome<sup>10</sup> ili ĉiuj estas tiel<sup>11</sup> similaj unu al la aliaj ke ĉiu, kiu lernis unu<sup>12</sup> el ili, povas sufiĉe bone kompreni ankaŭ la aliajn.

El la kombinitaj lingvoj la plej grandan disvastiĝon krom Esperanto trovis Ido (1908), kiu prezentas el si specon de reformita Esperanto. Tamen ankaŭ ĝi neniam atingis la saman gradon de disvastiĝo kiel Esperanto kaj Volapük kaj nuntempe ĝi estas jam

preskaŭ elmortinta. Praktikan valoron en nia tempo havas sole Esperanto, kiu progresas de jaro al jaro malgraŭ la diversaj malfacilaĵoj kaj estas nuntempe jam multoble pli disvastigita ol ĉiuj aliaj artefaritaj lingvoj kune, alkalkulite ankaŭ Volapük kaj Ido. Sekve la praktiko montras, ke per Esperanto la mondlingva problemo jam estas solvita.

(*Literaturo: E. Drezen. Historio de la mondlingvo. 243 paĝoj. Leipzig 1931. P. Stojan. Bibliografio de Internacia Lingvo. 560 paĝoj. Genevo 1929.*)

### Klarigoj.

- 1) Oni povas diri ankaŭ *estis sentata la valoro*.
- 2) Aŭ: *En Biblio estas rakontate. Rakontate*, ĉar mankas subjekto. Sed tia pasiva formo estas iom peza, tial *oni rakontas* estas preferinda.
- 3) Ankaŭ *nuntempa*.
- 4) Proksimume samsenca estas *baziĝis*.
- 5) Ĉi tie temas pri mallongigita frazo: *kiuj estis plene elpensitaj*.
- 6) *Aperinta* = kiu aperis.
- 7) La plena formo estas: *oni legas tiel, kiel estas skribite*.
- 8) *Laste* = kiel la lasta(j). Ĝi havas tute alian sencon ol *fine* (= en la fino).
- 9) *Tial*.
- 10) *Krom tio*.
- 11) Aŭ *tiom similaj*.
- 12) Ne «*unun*», kvankam ĝi estas rekta objekto: la fundamentaj numeraloj estas neŝanĝeblaj kaj ne povas havi akuzativan finaĵon.

## 158. Mallonga biografio de Zamenhof.

Ludoviko Lazaro Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, naskiĝis la 15-an de decembro 1859 en la pola urbo Bialystok, kie lia patro estis gimnazia instruisto.

La ideo de internacia lingvo, al kiu Zamenhof dediĉis sian tutan vivon, aperis ĉe li jam en la plej frua infanaĝo<sup>1</sup>, kiel li mem rakontas en sia fama letero al N. Borovko (traduko de V. Gernet): «En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn<sup>2</sup>. En tia urbo pli ol ie<sup>3</sup> la impresema<sup>4</sup> naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion

kaj dividas ĝin en malamikajn partojn. Oni edukadis<sup>5</sup> min kiel idealiston; oni min instruis<sup>6</sup>, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj k.t.p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi "doloro pro la mondo" ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la "grandaĝaj"<sup>7</sup> posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon».

Jam frue li konvinkigis, ke nek la antikvaj nek la modernaj lingvoj taŭgas por tiu ĉi celo, kaj li komencis malklare revii<sup>8</sup> pri nova, artefarita lingvo. Poste, kiel lernanto de klasika gimnazio en Varsovio, li faris ankaŭ diversajn provojn pri tia lingvo, «elpensadis artifikajn riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn k.t.p. Sed homa lingvo kun ĝia, kiel ŝajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun ĝiaj centoj da miloj de vortoj, per kiuj min timigis la dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tia artifika kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje diradis al mi: "for la revojn! tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj"».

Sed kiam li eklernis la anglan lingvon (aldone al la germana, franca, latina kaj greka) kun ĝia simpla gramatiko kaj rimarkis la rolon de la sufiksoj en la rusa lingvo, la gramatiko kaj la grandegulaj<sup>9</sup> vortaroj komencis rapide malgrandiĝi antaŭ liaj okuloj kaj li ekkriis kun ĝojo: «La problemo estas solvita!»

«En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiama "lingwe uniwersala" kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis<sup>10</sup> pri ĝi al miaj kolegoj (mi estis tiam en la 8-a klaso de la gimnazio). La 5-an de decembro 1878 ni ĉiuj kune solene festis la sanktigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo estis paroloj<sup>11</sup> en la nova lingvo, kaj ni entuziasme<sup>12</sup> kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj:

*Malamikete de las nacjes  
Kadó, kadó, jam temp' está!  
La tot' homoze in familje  
Konunigare so debá.»*

(En la nuna Esperanto: *Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuigi sin devas*).

Sed Zamenhof estis ankoraŭ tro juna por eliri publike kun sia verko. Baldaŭ poste li finis la gimnazion<sup>13</sup> kaj ekstudis medicinon, unue en Moskvo, poste en Varsovio. Liaj antaŭaj kunuloj el la

gimnazio<sup>14</sup> baldaŭ forlasis la »utopion«, kaj ankaŭ de li mem, timante pro lia sano, la patro prenis la promeson, ke dum la universitata tempo li ne okupiĝos<sup>15</sup> pri la afero.

En 1885 li finis la universitatajn studojn kun kuracista diplomo kaj komencis sian medicinan praktikon. Nun li ekpensis jam ankaŭ pri publikigo de la lingvo, kiun li dume estis polurinta, perfektiginta kaj adaptinta al la praktikaj bezonoj per multa tradukado kaj originala verkado: «vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radike<sup>16</sup> transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian<sup>17</sup>, dume<sup>18</sup> en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj objektoj, kiel ekzemple la universala prepozicio "je", la elasta verbo "meti", la neŭtrala, sed difinita finiĝo<sup>19</sup> "aŭ" k.t.p. kredeble neniam falus en mian kapon teorie. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekzemple mi devis forĵeti kelkajn nebezonaĵajn sufiksojn». Fine «la parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra<sup>20</sup> lingvo».

Dum du jaroj li vane<sup>21</sup> serĉis eldononton por sia broŝuro pri la nova lingvo, ĝis fine en julio 1887, dank' al bonkora helpo de sia estonta bopatro, li mem sukcesis eldoni ĝin (*D-ro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro*), unue en la rusa, baldaŭ poste ankaŭ en la pola, franca, germana kaj angla lingvoj. «Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago<sup>22</sup>, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon<sup>23</sup> reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas<sup>24</sup> de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je<sup>25</sup> "flankaj aferoj"; mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon kaj... mi transiris Rubikonon».

El tiu ĉi tempo devenas ankaŭ unu el liaj plej belaj versaĵoj<sup>26</sup>:

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,  
El mia brusto nun ne saltu for!  
Jam teni min ne povas mi facile,  
Ho, mia kor'!

Ho, mia kor'!

Post longa laborado  
Ĉu mi ne venkos en decida<sup>27</sup> hor'!  
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,  
Ho, mia kor'!

Zamenhof vidis en Esperanto ne nur lingvon kiel teknikan ilon, sed jam de la komenco li ligis al ĝi la ideon pri interfratiĝo kaj paca kunvivado de la popoloj, la t.n. **internan ideon**, kiun li poste evoluigis je tuta instruo, homaranismo. Ke por li ĝuste tiu interna ideo estis la plej grava, la ĉefa celo de liaj penadoj, ne la lingvo mem, tion li elokvente atestis en sia malferma parolado de la dua kongreso de Esperanto en Ĝenevo (1906):

«Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole<sup>28</sup> donis al la vasta mondo plenan rajton rigardadi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzadi ĝin nur por nia<sup>29</sup> utilo, tio ĉi kompreneble al neniu donas la rajton postuli, ke ni ĉiuj vidu en Esperanto nur aferon praktikan... El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas ĉiuj elŝiri el nia koro tiun parton de la esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne<sup>30</sup> disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos<sup>31</sup> kun doloro la laborojn kaj aferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: "Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan"!

Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo – vi ĉiuj sentas ĝin tre bone – estas **frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj**. Tiu ĉi ideo akompanadis Esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto, kiam li estis ankoraŭ malgranda

infano...

Se mi la tutan pli bonan parton de mia vivo memvole pasigis en grandaj suferoj kaj oferoj kaj ne rezervis por mi eĉ ian rajton de aŭtoreco – ĉu mi faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se la unuaj esperantistoj pacience elmetadis sin ne sole al konstanta mokado, sed eĉ al grandaj oferoj, kaj ekzemple unu<sup>32</sup> malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton, nur por ke ŝi povu ŝpari iom da mono por la propagando de Esperanto – ĉu ili ĉiuj faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se ofte personoj alforĝitaj al la lito de morto skribadis al mi, ke Esperanto estas la sola konsolo de ilia finiĝanta vivo, ĉu ili pensis tiam pri ia praktika utileco? Ho ne, ne, ne! ĉiuj memoris nur pri la interna **ideo** entenata en la esperantismo; ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la **korpojn** de la homoj, eĉ ne tial, ke ĝi alproksimigas la **cerbojn** de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn **korojn**».

En sia ĉarma libro «Vivo de Zamenhof» D-ro E. Privat priskribas D-ron Zamenhof jene (ĉe la malfermo de la unua kongreso de Esperanto en 1905 en Bulonjo-ĉe-Maró): «Jen sur la scenejo, kun estraro de l' kongreso, eniris la amata Majstro. Malalta, timema, kortuŝita<sup>33</sup>, kun frunto tre granda, rondaj okulvitroj, barbeto iom griza. Ĉio jam flugis aŭ svingiĝis en la aero, manoj, ĉapoj, tukoj, en duonhora aklamado. Kiam li leviĝis post salutoj de l' urbestro, la fervoro retondregis». Karaktere<sup>34</sup> li estis homo tre modesta, tiel modesta, ke li eĉ ne ŝatis la titolon Majstro, per kiu la esperantistoj honoris lin, kaj ke li neniam akceptis iun oficialan postenon en la movado.

Frateco kaj egaleco inter la popoloj estis la celo de lia vivo. Sed la ironio de la sorto volis, ke dum la lastaj jaroj de sia homama vivo li estu atestanto de la plej terura kaj kruela interpopola buĉado, kiun la historio konas, la sanga mondmilito, kaj ke lia vivo estingiĝu senespere sub la sonoj de kanonbruo<sup>35</sup>. Li mortis en Varsovio la 14-an de aprilo 1917. Al la lasta ripozo akompanis lin nur kelke da polaj kaj unu germana esp-isto kaj popolamaso el tiuj, kiujn li estis helpinta kaj ofte senpage fleginta dum sia okulista praktiko. Por la alilandaj gesamideanoj la landlimoj estis fermitaj pro la milito.

*(Literaturo: D-ro Edmond Privat. "Vivo de Zamenhof").*

## Klarigoj.

- 1) Ofte en tiu ĉi senco estas uzata ankaŭ *infaneco*, kvankam ĝia logika senco estas alia.
- 2) Aŭ: *rilatas al la aliaj elementoj*.
- 3) Kutime oni diras *pli ol ie aliloke* aŭ *pli ol en iu alia loko*.
- 4) Pli ĝusta estus *impresigema* aŭ *impresebla*.
- 5) La sufikso *-ad-* estis tie ĉi superflua, ĉar ĝi aldonas nenion novan al la senco. Atentu, ke en la sekvanta *instruis -ad-* mankas!
- 6) Aŭ: *instruis al mi*.
- 7) Kutime oni diras *plenkreskaj* aŭ *maturaj*.
- 8) *Komencis revii* = ekrevis.
- 9) *grandegulo* = giganto, koloso.
- 10) Ankaŭ *sciigis kaj informis*.
- 11) Kutime en tiu ĉi senco estas uzata *parolado*.
- 12) *Entuziasme* = kun entuziasmo.
- 13) Oni diras ankaŭ *absolvis gimnazion*.
- 14) Aŭ: *gimnaziaj kunuloj*.
- 15) Ofte oni diras *okupos sin*.
- 16) Kutime oni diras *radikale, funde, fundamente*.
- 17) Aŭ: *malhelpis unu al la alia*.
- 18) Nuntempe en tia okazo estas uzata la simpla *dum*. *Dume* = dum tio, dum tiu tempo.
- 19) Nuntempe en tiu ĉi senco estas uzata *finajo* (= io, kio troviĝas en la fino). *Finiĝo* havas proksimume la saman sencion kiel *fino*.
- 20) Nuntempe oni diras *gepatra lingvo*.
- 21) Ankaŭ *senrezulte* aŭ *sen rezultato*.
- 22) Aŭ: *depost la tago*.
- 23) Aŭ: *eblecon*.
- 24) Aŭ: *dependanta*.
- 25) Kutime oni diras *okupi sin pri*.
- 26) Ankaŭ *poeziaĵo kaj poemo*.
- 27) Atentu la diferencon inter adjektivigita verbo kaj participo: *decida paŝo, decidanta persono*.
- 28) Aŭ: *memvole*.
- 29) Tie ĉi ŝajne devus esti *sia*.
- 30) Ankaŭ *indignite* aŭ *kun indigno*.
- 31) Aŭ: *ekstermos*.
- 32) Tie ĉi *unu* havas la rolon de nedifina artikolo; preferinda estas *iu malriĉa instruistino*.
- 33) Ankaŭ *emociita*.
- 34) Aŭ *laŭ la karaktero*.
- 35) Anstataŭ *kanono* pli true estis uzata *pafilego*.

## 159. El la «Vojo» de Zamenhof.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante<sup>1</sup>  
Ni iru la vojon celitan!  
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,  
Traboras la monton granitan.  
L' espero, l' obstino<sup>2</sup> kaj la pacienco –  
Jen estas la signoj, per kies potenco  
Ni paŝo post paŝo<sup>3</sup>, post longa laboro,  
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,  
Pri l' tempoj estontaj pensante.  
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –  
Ni semas kaj semas konstante.  
«Ho, ĉesu<sup>4</sup>!» mokante la homoj admonas, –  
«Ne ĉesu, ne ĉesu» en kor' al ni sonas:  
«Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,  
Se vi pacience eltenos».

### Klarigoj.

- 1) Kutime oni diras *deflankiĝi, flankeniĝi, devojiĝi, dekliniĝi*.
- 2) En la kutima stilo oni ne rajtas tiamaniere apostrofi la artikolon, kaj ankaŭ en la poezio tio okazas malofte.
- 3) Kutime oni diras *paŝoN post paŝo*.
- 4) *Ĉesi* estas netransitiva: *La pluvo jam ĉesis*. Ankaŭ kun infinitivo: *Ĉesu jam babili!* Transitiva ĝi fariĝas per *-igi*: *Ĉesigu la babiladon*.

## 160. El la historio de Esperanto.

La unuaj broŝuroj de 1887 ne vekis tiel grandan intereson al la nova lingvo kiel Zamenhof esperis, ĉar ĝuste tiam estis la flortempo de Volapük, post kies baldaŭa falo multaj perdis la kredon je artefaritaj lingvoj entute. Tamen la semo estis ĵetita, kaj iom post iom troviĝis lernantoj kaj uzantoj de la «Lingvo Internacia», kiun ĝiaj adeptoj baldaŭ eknomis simple Esperanto, laŭ la pseŭdonimo<sup>1</sup> de ĝia aŭtoro. Inter la unuaj pioniroj estis la polo A. Grabowski, la germanoj L. Einstein kaj W. H. Trompeter, la franca markizo L. de Beaufront, la svedo P. Nylén k.a.



La unua Esperanta societo fondiĝis<sup>2</sup> en 1888 en Nürnberg (Germanujo), kiam la tiea volapukista klubo konvertiĝis kaj transiris al Esperanto. La unua gazeto aperis en 1889 sub la nomo «La Esperantisto», ankaŭ en Nürnberg.

Iom post iom fondiĝis pliaj societoj kaj grupoj, aperis literaturaj verkoj kaj diverslingvaj lernolibroj, kaj komenciĝis la internacia vivo de la lingvo.

Sed jam ekblovis krizaj ventoj<sup>3</sup>. En 1891 la personaj cirkonstancoj de D-ro Zamenhof, kiu gvidis tiam la tutan movadon, fariĝis tiel malfacilaj, ke li devis ĉesigi la aperadon de «La Esperantisto», kies eldonanto kaj redaktoro li nun estis, kaj entute interrompi ĉian agadon por la afero. «Mi faris ĉion, kion mi povis, mi tenis min tiel longe, kiel mi povis, kaj nun mi devas foriĝi kaj peni refortigi miajn piedojn, kiuj rifuzas<sup>4</sup> pli porti min. Pasos kelka tempo, miaj vundoj saniĝos, kaj tiam, amikoj, vi denove min vidos inter vi, en la vico de la plej energiaj batalantoj. Mi esperas, ke mia foresto ne longe daŭros».

Feliĉe en tiu plej kriza momento por la juna movado aperis nobla kaj malavara savanto en la persono de Trompeter, kiu certigis la aperadon de la gazeto. Sed nun sekvis alia danĝero – la reforma movado. Ne povante plu kontraŭstari<sup>5</sup> al insistaj postuloj pri ŝanĝoj en la lingvo, Zamenhof ellaboris detalan projekton de reformoj kaj prezentis ĝin en 1894 al la membroj de la tiama «Ligo Esperantista» por voĉdonado<sup>6</sup>. Sed la plejmulto de la voĉdonintoj estis kontraŭ ĉiaj reformoj, kaj tiamaniere Esperanto denove estis savita el grava danĝero.

Tamen per tio ne finiĝis la malfacilaĵoj. Pro apero de verketo de Tolstoj en «La Esperantisto» la rusa cenzuro en 1895 malpermesis la eniradon de la gazeto en Ruslandon. Ĉar la plej granda parto de la abonantoj estis ĝuste rusoj, la sekvo<sup>7</sup> estis tio, ke la gazeto devis fini sian aperadon. Sed ankaŭ nun troviĝis savo: en la sama jaro la Klubo Esperantista en Upsala (Svedlando) relevis la falintan standardon kaj komencis la eldonadon de la gazeto «Lingvo Internacia». Depost tiu tempo neniam plu okazis similaj danĝeraj momentoj kaj la afero povis pli-malpli trankvile daŭrigi<sup>8</sup> sian progresadon.

Tute nova periodo en la historio de Esperanto komenciĝis per la unua internacia kongreso en 1905 en la franca urbo Bulonjo-ĉe-Mar, kien kolektiĝis 700 esperantistoj el ĉiuj landoj de Eŭropo.

Granda entuziasmo regis inter la kongresanoj. Per longedaŭraj tondraj aplaŭdoj oni akceptis la Majstron, kiam li aperis sur la scenejo kune kun la kongresa estraro. Malfermante la kongreson, Zamenhof faris sian unuan paroladon antaŭ multnacia aŭskultantaro:

«Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas ... Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno... sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema: ĝi estas la sonoj de io granda, kio nun naskiĝas».

Post tiu unua kongreso Esperanto komencis rapide disvastiĝi en la tuta mondo. Fondiĝis societoj eĉ en Usono<sup>9</sup> kaj Japanujo, aperis multnombre lernolibroj kaj vortaroj en diversaj lingvoj, rapide ekkreskis la literaturo. Sed nova danĝero insidis la aferon. En 1907 estis kunvokita en Parizo grava internacia scienca komitato por definitiva akcepto de internacia helplingvo, kie L. de Beaufront, «la dua Majstro» kaj plenrajta reprezentanto de D-ro Zamenhof, tute neatendite kaj perfide, anstataŭ pledi por Esperanto, sub la pseŭdonimo «Ido» prezentis al la komitato sian propran kreaĵon, kiu fakte estis nur ia reformita Esperanto. Kompreneble la komitato akceptis kaj rekomendis tiun novkreaĵon, al kiu transiris pluraj esperantistoj kaj Esperanto-societoj. Sed la plejmulto restis fidela al Esperanto.

Baldaŭ la movado resaniĝis ankaŭ de tiu vundo kaj daŭrigis sian konstantan kaj senlacan marŝadon antaŭen, ĝis kiam en 1914 ekfuriozis la sanga mondmilito, kiu senkompate detruis preskaŭ ĉion, kion oni tiel pene kaj ame estis konstruinta dum tuta homa generacio. Sed post la milito ekĝermis nova vivo sur la ruinoj kaj nun Esperanto estas pli disvastigita kaj forta ol iam antaŭe kaj spite<sup>10</sup> al ĉiuj homaj antaŭjuĝoj kaj indiferento obstine daŭrigas sian malfacilan kaj krutan vojon al la celo, – fariĝi la dua lingvo de ĉiu kulturhomo.

*(Literaturo: D-ro E. Privat. Historio de la lingvo Esperanto, I. kaj II. parto).*

## Klarigoj.

- 1) Oni diras ankaŭ *pseŭdonomo* kaj *aŭtora nomo*.
- 2) Aŭ *estis fondata*.
- 3) Aŭ *ventoj de krizo*.
- 4) Proksimume saman sencon havas *malakcepti*, sed ĝi ne estas uzebla kun infinitivo: *Li rifuzis (akcepti) la proponon. Li malakceptis la proponon.*
- 5) Ankaŭ *rezisti*; oni povas diri ankaŭ *kontraŭstari insistajn postulojn*.
- 6) Ankaŭ *balotado*.
- 7) Ankaŭ *rezulto* kaj *rezultato*.
- 8) Atentu la uzadon de *daŭri*: *La progresado de Esperanto daŭras. Esperanto daŭras progresi. Esperanto daŭrigas sian progresadon.*
- 9) La origina formo estas *Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko* (U.S.A.).
- 10) Oni povas diri ankaŭ *spite antaŭjuĝojn*; kelkaj uzas eĉ *spite antaŭjuĝoj*.

## 161. Deklaracio pri Esperantismo.

*(Akceptita de la I-a Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer la 9-an de aŭgusto 1905).*

Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la Internacia Kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer, trovis necese, laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto, doni la sekvantan klarigon:

1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu «ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn» donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon<sup>1</sup> kompreniĝadi inter si<sup>2</sup>, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povas esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas<sup>3</sup>.

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esplorado en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke Lingvo Internacia povas esti nur lingvo arta<sup>4</sup>, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj faritaj en la daŭro de la lastaj jarcentoj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de Lingvo

Internacia, konsciante, ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam delonge ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate<sup>5</sup> tiun lingvon, tial Esperanto estas «nenies propraĵo», nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo, kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaj mastroj de tiu lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniuj aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniuj devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo «Fundamento de Esperanto», en kiu neniuj havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj «tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto». Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en «Fundamento de Esperanto», ĉiu esperantisto havas la rajton<sup>6</sup> esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro la plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone<sup>7</sup> konas ĝian spiriton.

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

## Klarigoj.

1) Aŭ *eblecon*.

- 2) Aŭ *interkompreniĝi*.
- 3) En tiu senco estas uzataj ankaŭ la formoj *respondeci, respondeco, respondeca: respondeca (priresponda) redaktoro*.
- 4) Kutime oni diras *artefarita; arta* = kio rilatas al arto.
- 5) Ankaŭ *koncerne*; anstataŭ *rilate tiun lingvon* oni povas diri ankaŭ *rilate (koncerne) al tiu lingvo*.
- 6) Plej ofte oni diras mallonge *rajtas*.
- 7) Nuntempe oni ne uzas la artikolon kun adverboj, sed diras simple *plej multe kaj plej bone*.

## 162. La evoluo de Esperanto.

Ĉio, kio vivas, kreskas kaj evoluas. Ankaŭ ĉiu vivanta lingvo, inter ili Esperanto, subiĝas al tiu ĉi naturleĝo: seninterrompe ili evoluas kaj ŝanĝiĝas, de jaro al jaro kaj de generacio al generacio, same kiel la tuta vivo ŝanĝiĝas kaj aliĝas. Ni, modernaj homoj, vivas en tute alia mondo kaj aliaj cirkonstancoj ol niaj avoj, kaj sekve ni bezonas ankaŭ aliajn esprimilojn ol ili havis – multajn novajn vortojn por nomi la aĵojn kaj ideojn, kiujn ili ne konis, kaj eĉ novajn formojn, kiuj pli respondas al la ritmo de la moderna vivo. Samtempe ni ne bezonas multajn vortojn kaj formojn, kiujn uzis niaj avoj, ĉar ankaŭ la koncernaj aĵoj kaj ideoj apartenas jam al historio. Tiaj ne plu uzataj vortoj kaj formoj nomiĝas **arkaismoj**.

Dum la lastaj mil jaroj niaj nunaj kulturlingvoj evoluis kaj ŝanĝiĝis ofte ĝis nerekebleco – ni malfacile aŭ preskaŭ ne komprenas tekstojn, kiuj en nia gepatra lingvo estis skribitaj antaŭ mil aŭ eĉ kelkaj centoj da jaroj. Sed en nia moderna tempo la evoluo de la lingvoj estas tre malrapida, preskaŭ nerimarkebla. Sole la lingvoj de la malgrandaj popoloj, kiuj memstariĝis dum la mondmilito, evoluas tre rapide ankaŭ sub niaj okuloj, ĉar pli frue, pro la malfeliĉaj historiaj cirkonstancoj, ilia evoluo je kulturlingvo estis malhelpita. Ekz. estas granda diferenco inter tiu estona lingvo, kiu estis uzata dum la mondmilito, kaj la hodiaŭa estona lingvo, tiel granda, ke la maljunaj homoj plendas, ke ili ne komprenas la modernajn librojn kaj kelkfoje eĉ la parolon de siaj gefiloj kaj genepoj.

Kvankam la aĝo de Esperanto estas nur 50 jaroj, tamen ankaŭ ĝi kiel ĉiu viva estaĵo multe evoluis kaj kreskis dum tiu relative mallonga tempo, tiom, ke tiu, kiu lernus ĝin laŭ la unua lernolibro de 1887 kaj parkerigus la tutan tiaman vortprovizon, malfacile povus legi kaj kompreni la nunajn librojn kaj gazetojn. Ĉar tiam la tuta

vortaro konsistis ja el malpli ol 1000 radikoj, kaj eĉ tiaj vortoj kiel ekzemple *ebria*, *aspekti*, *aboni*, *distanco*, *diskuti*, *svarmi*, *stulta*, *kanono*, *kadavro* k.t.p. estis tiam nekonataj; anstataŭ *aspekti* oni diris «*elrigardi*», *kanono* estis nomata «*pafilego*», gazeton oni ne *abonis*, sed «*subskribis*», k.t.p. Eĉ la sufikso *-aĉ-* tiam ne ekzistis. Ankoraŭ pli granda diferenco estas inter la «lingve uniuersala» de 1878 kaj la posta Esperanto.

D-ro Zamenhof estus ja povinta eldoni ne maldikan kajeron kun malpli ol 1000 radikoj, sed tuj en la komenco ellabori vastan vortaron kun ĉiuj necesaj vortoj, kiuj nuntempe estas uzataj. Tio ja ne estus al li malfacila! Sed intence li tion ne faris, ĉar li bone konsciis, ke estas granda diferenco inter la teorio kaj praktiko; ke tio, kio ŝajnas esti bona teorie, montriĝas kelkfoje tute sentaŭga en la praktiko. Tial li preferis ellabori kaj publikigi nur fundamenton de la nova lingvo, kie troviĝas nur la plej necesaj elementoj, dum la finan ellaboron de la lingvo, la konstruadon de la domo sur la fundamento, li lasis al la praktika lingvouzado, al la esperantista popolo en la tuta mondo. Per tio Esperanto ĉesis esti artefarita lingvo, sed komencis sian naturan evoluadon simile al ĉiuj aliaj lingvoj, evoluadon, kie partoprenas ĉiuj lingvouzantoj, unuavice kompreneble la plej bonaj verkistoj. Sekve la nuna Esperanto estas ne teoria verko de unu sola persono, sed kolektiva ellaboraĵo de la tuta esperantista popolo, farita ne «en retorto» laŭ certaj teoriaj dogmoj, kiel Ido, Occidental, Novial k.a. projektoj, sed iom post iom ellaborita de la vivo mem.

Ke la evoluo de Esperanto ne estu arbitra kaj ne okazu en revolucia maniero, kiel en Ido, kie ĉiujare oni ŝanĝadis la bazojn de la lingvo, tion garantias la verketo «Fundamento de Esperanto», kiu konsistas el *Antaŭparolo* de D-ro Zamenhof, *Fundamenta Gramatiko* kvinlingva (franca, angla, germana, rusa, pola), *Ekzercaro* kaj *Universala Vortaro* kun tradukoj en la kvin nomitaj lingvoj. En la Fundamento neniu persono kaj neniu societo rajtas fari iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon, ĉar ĝi devas gardi la unuecon kaj kontinuecon de nia lingvo. Zamenhof mem havis tiel grandan respekton al la Fundamento, ke li ne korektis en ĝi eĉ la erarojn, ĉar, kiel li skribas en la Antaŭparolo, «la fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj».

La netuŝebleco de la Fundamento signifas kompreneble tion, ke neniu rajtas **en ĝi mem** fari ian korekton aŭ plibonigon, sed ĝi devas por ĉiam resti senŝanĝa kiel aŭtentika dokumento. Sed tiu

netuŝebleco tute ne signifas, ke ĉiu esperantisto devas laŭlitere imiti eĉ la erarojn de la Fundamento kaj ke oni ne rajtas uzi vorton aŭ formon, kiu ne troviĝas en ĝi. Bedaŭrinde ekzistas personoj, kiuj miskomprenas tion, kaj estante «pli papaj ol la papo mem», evitas kaj malpermesas la uzadon de ĉiu vorto kaj formo, kiu ne troviĝas en la Fundamento. La obeo de tiu postulo signifus, ke ĉia evoluo de la lingvo ĉesus kaj ĝi ŝtoniĝus simile al la mortinta latina lingvo.

Sed per la Fundamento D-ro Zamenhof tute ne volis kateni kaj haltigi la evoluon de Esperanto, rigidigi kaj ŝtonigi ĝin en tiu formo, kiun ĝi havis antaŭ jardekoj. En la Antaŭparolo li mem diras: «Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos... Ho, ne! Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante **pliboniĝadi** kaj **perfektiĝadi**; la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga **rompado** kaj **ŝanĝado**, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo **natura**, senkonfuza kaj sendanĝera». Kaj plue: «Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas **tro neoportuna**, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi **paralele** kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos **arĥaismo**, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo. Sed, prezentante parton de la **fundamento**, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektiĝado la unueco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj.»

Tian «aŭtoritatan centran institucion», pri kiu parolas Zamenhof, ni havas en la Lingva Komitato kaj Akademio, la superaj lingvaj institucioj, kiuj gardas kaj gvidas la unuecan evoluon de Esperanto. Aldone al la Fundamento ili oficiale enkondukis jam grandan nombron da novaj vortoj, inter ili la jam menciitaj *ebria*, *aspekti*, *distanco*, *diskuti*, *svarmi*, *stulta*, *kanono* kaj *kadavro*, kaj eĉ du

novajn afiksojn: *-aĉ-* kaj *mis-*. La Akademio oficialigis eĉ la literon *k* anstataŭ *ĥ* en la vortoj *arkaismo*, *arkitekturo*, *tekniko* k.t.p. Sed tio tute ne signifas, ke per tio la malnovaj kaj Fundamentaj *arĥaismo*, *arĥitekturo*, *malkompreniĝo*, *pafilego* k.t.p. estas elĵetitaj el la lingvo. Ne, ili nur fariĝis arkaismoj, ĉiam estos presataj en la Fundamento, diversaj vortaroj kaj lernolibroj, kaj ĉiu, kiu deziras, povas ilin uzi ankaŭ en la praktika vivo, kvankam ili donas specialan arkaikan nuancon al la stilo.

La tasko de niaj lingvaj institucioj ne estas de tempo al tempo elpensi novajn vortojn kaj formojn kaj oficialigi ilin nur pro tio, ke tiu aŭ alia vorto kaj formo plaĉas al ili. Tia kompreno estas tute malĝusta kaj danĝera, ĉar, kiel Zamenhof mem diris, tio, kio ŝajnas al ni bona en la teorio, povas montriĝi tute sentaŭga en la praktiko. Tial, antaŭ ol iu vorto aŭ formo povas trovi oficialigon kaj sankcion de la Akademio, ĝi devas esti ĉiurilate elprovita en la praktika lingvouzo. Sekve la tasko de la lingvaj institucioj estas ne proponi, sed konstati, studi la vivantan lingvon kaj doni sian oficialigan sankcion nur al tio, kio jam estas ĝenerale uzata, jam enradikiĝis en la lingvo kaj per tio pruvis sian taŭgecon kaj vivkapablon. Bedaŭrinde oni ne ĉiam atentis tiun ĉi regulon, ĉar en la oficialaj listoj troviĝas vortoj, kiuj preskaŭ neniam estas uzataj en la ĉiutaga vivo (ekz. *daturo*, *kurtaĝo*, *arpeĝo*, *sinedrio*); dum aliaj, kiuj ĉiutage estas uzataj en la tuta mondo (ekz. *gramofono*, *filmo*, *kino*), vane atendas oficialigon kaj ne estas troveblaj eĉ en multaj vortaroj.

Ekzistas personoj, kiuj postulas, ke oni uzu nur oficialajn vortojn kaj jam apriore kondamnas ĉiujn neologismojn, deklarante ilin kontraŭfundamentaj. Sed, se ni malpermesus la uzadon de la neologismoj, ni haltigus la evoluadon de nia lingvo, kiu rigidiĝus kaj ŝtoniĝus, male al ĉiuj aliaj vivantaj lingvoj. Tiam ankaŭ la nombro de la oficialaj vortoj ne plu povus kreski, ĉar, kiel ni vidis, la tasko de niaj lingvaj institucioj ne estas mem elpensi kaj enkonduki novajn vortojn, sed nur konstati kaj aprobi tion, kio jam enradikiĝis en la lingvo.

Kompreneble la konstanta alfluo de novaj vortoj kaj formoj malfaciligos la lingvon kaj prave plendas tiuj, kiuj antaŭ 20 aŭ 30 jaroj ellernis Esperanton, ke ili multajn vortojn ne komprenas en la modernaj libroj kaj gazetoj. Sed ofte oni plendas ankaŭ tute senkaŭze. Ekzemple antaŭ kelkaj jaroj malnova s-anino prezentis liston de neologismoj el traduko de Stellan Engholm, plendante, ke ŝi



ne trovis ilin eĉ en sia vortaro. Sed – ŝia listo konsistis el multaj oficialaj vortoj kaj tiaj «neologismoj», kiuj estis ĉerpitaj el verkoj de Zamenhof mem! Ke ŝi ilin ne komprenis, en tio estis do kulpa ne Engholm, sed ŝi mem, ĉar ŝi ne legis la verkaron de nia Majstro, ne tenis sin en kontakto kun la evoluado de nia lingvo kaj ne aĉetis al si pli bonan vortaron.

En la ĉiutaga vivo oni povas esprimi sin per malgranda nombro da vortoj. Sed en la sciencoj, en la tekniko kaj literaturo oni ofte bezonas nomi nuancojn, aĵojn kaj ideojn, kiuj ĝis nun ne estas tuŝitaj en Esperanto. Kion do fari, se en la ĝisnuna Esperanto mankas la necesa vorto, derivebla ĝi ne estas kaj ankaŭ neologismon oni ne rajtas uzi? Ĉu do oni opinias, ke tute ne estas necese nomi tiun nuancon? Sed tio estus ja atesto de malriĉeco al Esperanto, se en ĝi ne estus esprimeblaj ĉiuj homaj pensoj! La sola ebleco estas en tia okazo per kelkaj vortoj priskribi la ideon, kio estas ja tre primitiva rimedo kaj ne faras honoron al kulturlingvo (por esti konsekvencaj, ni devus tiaokaze forigi el Esperanto almenaŭ duonon de la vortoj: *trovi* [= malperdi], *lasta* [= malunua], *fino* [= malkomenco], *seĝo* [= sidmebloj], *lito* [= dormmeblo], *okulo* [= vidilo], *orelo* [= aŭdilo], k.t.p.) aŭ ni devas uzi neologismon. Ne ĉagreniĝu do, se de tempo al tempo vi trovas en iu libro aŭ gazeto neologismon!

La naciaj lingvoj ĉerpas novajn vortojn el siaj dialektoj kaj ankaŭ el aliaj lingvoj. Esperanto dialektojn ne havas kaj ĉerpas ĉion el la ĉefaj kulturlingvoj. Sed ne ĉiu komencanto rajtas enkonduki neologismojn! Tiun rajton havas nur personoj, kiuj fundamente konas Esperanton kaj ĝian spiriton kaj krome scipovas ankaŭ plurajn aliajn lingvojn. Kaj antaŭ ol krei kaj uzi iun novan vorton, oni devas zorge esplori, ĉu samsenca vorto jam ne ekzistas en la lingvo kaj ĉu la ideo ne estas alimaniere esprimebla. Neologismon oni rajtas do uzi nur tiam, kiam tio estas absolute necesa kaj kiam la ideo ne estas alimaniere esprimebla!

Bedaŭrinde multaj prenas la aferon tro facile, kaj senpripense enkondukas neologismojn, kiajn Esperanto tute ne bezonas kaj kiuj eĉ malutilas ĝian internaciecon. Kutime oni faras tion pro influo de sia gepatra lingvo, volante en Esperanto esprimi iun ĝian nuancon. Sed memoru, ke en la mondo estas centoj da lingvoj, kaj ĉiu el ili havas siajn nuancojn kaj esprimmanierojn, kiuj mankas en la aliaj lingvoj. Same kiel ne estas eble esprimi ĉiun nuancon de germana lingvo per la franca kaj male, ĉiun nuancon de la itala lingvo per la

angla kaj male, same estas sensece postuli, ke Esperanto esprimu ĉiujn nuancojn de ĉiuj lingvoj de la tuta mondo! Al tiaj nuancoj apartenas ekzemple la germana «*darfi*» (= rajti, povi), kiu povas esti necesa al la germanoj, sed ne al la multaj aliaj popoloj, kiuj tian nuancon en sia lingvo ne havas kaj al kiuj ĝia uzado pro tio estus tre malfacila.

Ĉu vi aŭdis, ke iu, lernante ekzemple la anglan lingvon kaj trovante tie vortojn kaj formojn, kiuj al li ne plaĉas, sen longa pripensado «reformas» ilin kaj fiere ekuzas sian propran anglaĵon? Ne, tion vi certe ne aŭdis, ĉar tia ideo al neniu enkapiĝis kaj eĉ ne povas enkapiĝi – la homoj havas grandan respekton al la «naturaj» lingvoj kaj ne volas reformi ilin. Sed kiam la sama persono eklernas Esperanton, li ofte jam post la unua leciono volas «reformi» kaj «plibonigi»! Ĉar li scias, ke Esperanto estas onidire artefarita lingvo, kaj havante grandan memfidon kaj kredante sin malgranda Zamenhofo aŭ eĉ pli saĝa ol Zamenhof, ankaŭ li volas partopreni en la «farado de la lingvo». Tion faras ne nur instruitaj homoj, sed kelkfoje eĉ ŝuistoj kaj aliaj metiistoj, kiuj kutime ne okupas sin pri lingvoj kaj ofte ne scipovas perfekte eĉ sian gepatran lingvon. Al tiaj «reformemuloj» apartenis dum la tempo de sia lernado ankaŭ la aŭtoro de tiu ĉi libro, kaj tre verŝajne ankaŭ la kreintoj de la diversaj mondlingvaj projektoj.

Anstataŭ «reformi» kaj «plibonigi», lernu Esperanton tian, kia ĝi estas, perfektigu vin en ĝi, enpenetru en ĝian subtilan kaj delikatan spiriton, kaj komprenu, ke ĝi ne estas plu artefarita lingvo, sed natura kaj vivanta lingvo de vivanta popolo, same kiel ĉiuj aliaj lingvoj, hardita kaj elprovita dum la 50-jara vasta uzado. Esperanto viajn «reformojn» ne bezonas! Kaj se en tiu aŭ alia punkto ĝi povus esti plibonigata, tiam tio estas la tasko de lingvistoj kaj ĝenerale rekonitaj verkistoj, sed ne de komencantoj kaj ŝuistaj submajstroj. Tio ĉi estas dirita ankaŭ al la verkantoj de artikoloj kaj libroj, kiuj, anstataŭ skribi bonstilan kaj internacie uzatan Esperanton, volas «brili» per diversaj plibonigoj kaj strangaĵoj.

## Kaj nun?

Ĉu vi aŭdis pri terkulturisto, kiu printempe semas siajn kampojn, sed aŭtune, kiam la greno maturiĝis, ne rikoltas ĝin? Ĉu vi vidis homon, kiu aĉetas biciklon aŭ aŭtomobilon, sed anstataŭ uzi ĝin por siaj bezonoj kaj plezuro, senzorge formetas kaj forgesas ĝin ie kaj daŭrigas iradi piede? Ĉu vi konas iun, kiu havigas al si modernan radioaparaton, sed eĉ unu fojon ne provas ĝiajn kapablojn?

Bedaŭrinde ekzistas homoj, kiuj lernas Esperanton, sed baldaŭ laciĝas kaj perdas la intereson, forlasas kaj forgesas la tutan aferon. Ili semis, sed ili ne volas rikolti, lasante la fruktojn defali kaj putri. Ili elspezis tempon kaj monon – tute vane! Ĉar lingvo estas kiel tranĉilo, kiu rustiĝas, kiam oni ne uzas kaj prizorgas ĝin. Jam dum unu-du jaroj oni povas forgesi grandan parton de tio, kion oni lernis, kiam oni ne refreŝigas sian memoron.

Certe vi, kiu legas tiujn ĉi liniojn, ne apartenas al tiaj senpripensaj, facilanimaj kaj senkarakteraj homoj, kiuj turniĝas laŭ la vento. Se vi foje komencis iun aferon, vi ankaŭ finos ĝin! Daŭrigu la laboradon pri Esperanto, refreŝigante viajn sciojn kaj perfektigante vin en la lingvo, ankaŭ praktike uzante ĝin. Por tio mi donas al vi jenajn konsilojn:

1. Abonu kaj legu regule almenaŭ unu Esperantan **gazeton**, kiu tenos vin en kontakto kun la tuta Esperanta mondo kaj plivastigos vian spiritan horizonton. Se vi estas malriĉa kaj ne havas sufiĉe da mono por aboni iun gazeton, formu «akcian societon» el kelkaj viaj gekonatoj kaj abonu la gazeton kune kun ili, laŭvice legante ĝin.

2. Legu la ampleksan kaj interesan Esperantan **literaturon**, kie apud originalaj verkoj ekzistas tradukoj el kelkaj dekoj da lingvoj, multaj el ili tiaj, kiaj certe ne troviĝas en via propra lingvo. Per Esperanto vi povas konatiĝi kun la japana, hungara, ĉeĥoslovaka, pola, sveda, kataluna, estona, latva kaj aliaj literaturoj, kiuj estas malmulte konataj eksterlande.

Ne nur legu, sed ankaŭ **aĉetu** Esperantajn librojn, ĉar tiel vi ebligos al la eldonejoj aperigi ĉiam novajn kaj novajn librojn. Aĉetu ĉiujare almenaŭ unu solidan libron kaj kolektu al vi iom post iom malgrandan Esperantan bibliotekon, kiu estos ornamo kaj fiero de via hejmo. Por havi ĉiam freŝan legmaterialon, fondu **legrondon** inter viaj Esperantaj gekonatoj! La rondo povas konsisti el ekzemple 5 membroj, kiuj kunmetas monon por aĉeti tiom da libroj kiom da rondanoj estas. Laŭvice oni legas la librojn kaj poste dislotumas ilin inter si. Instigu ankaŭ vian Esperantan klubon fondi al si bibliotekon kaj la urban bibliotekon havigi al si Esperantajn librojn.

Bedaŭrinde la homoj kutime ne havas tempon por legi Esperantajn librojn. Sed ne estas ja necese legi dum la tuta tago! Sufiĉas, se vi legos ĉiutage almenaŭ 15 minutojn aŭ duonhoron. Tiom da tempo povas trovi eĉ la plej okupata homo, ekzemple post la tagmanĝo, antaŭ la endormiĝo k.t.p. Legante ĉiutage nur 5 paĝojn, oni povas tralegi dum la jaro kelkajn dikajn librojn. Necesas nur bona volo kaj konstanteco!

3. Tre utila kaj interesa estas **korespondado** kun eksterlandanoj. Per tia korespondado vi havos ne nur bonan ekzercon en Esperanto, sed vi havigos al vi ankaŭ amikojn en fremdaj landoj, vi ekscios pri la vivkondiĉoj kaj pensmaniero de aliaj popoloj kaj ĉiamaniere plivastigos vian horizonton. Adresojn por korespondado oni povas trovi en la Esperantaj gazetoj, aŭ prefere mem anoncu pri via deziro en iu gazeto. En tiu okazo oni devas almenaŭ unu fojon respondi al ĉiu skribinto.

4. Inter la esperantistoj **parolu nur Esperante**, ĉar vian gepatran lingvon vi povas paroli ĉie tiom, kiom vi deziras, sed Esperante vi povas paroli malofte kaj nur kun la esperantistoj. Tial eluzu ĉiun okazon por paroli Esperante! Komence tio kompreneble estas malfacila kaj peniga, vi devas serĉi vortojn, balbutas kaj faras erarojn, sed ĉe diligenta ekzercado vi baldaŭ rimarkos, ke vi povas jam tute libere esprimi viajn pensojn en la nova lingvo.

5. Nepre aliĝu al via loka **Esperanta klubo** kaj pere de ĝi al la landa asocio kaj partoprenu la internacian movadon. En la klubo ne estu «meblo», kiu nur pagas sian kotizon, sed alie tute ne partoprenas la kluban vivon. Ne, estu **vera, aktiva membro**, kiu partoprenas ĉiujn ĝojojn kaj malĝojojn de la klubo, kiu regule vizitas la kunvenojn, kunagas en la programoj kaj ĉiuj entreprenoj de la klubo, memorante, ke Esperanto estas nia komuna posedaĵo kaj ke

**ni ĉiuj devas labori por ĝi.** Se iu opinias, ke li ne havas multe da utilo de la klubo, li konsideru ankaŭ tion, ke **la klubo bezonas lin**, ĉar maro konsistas el akvogutoj, kaj ju pli multnombraj kaj fortaj estas la kluboj, des pli forta estas ankaŭ la tuta movado.

6. Se vi havas radio-aparaton, aŭskultu regule la Esperantajn dissendojn el la diversaj landoj kaj ne forgesu sendi al la stacioj poŝtkarton kun danko. Alie la stacio ne scias ja, ke vi aŭskultis ĝin, kaj ricevinte neniujn aŭ tro malmultajn sciigojn pri aŭskulto, la stacio baldaŭ ĉesigos siajn Esperantajn dissendojn.

7. Por certigi pri viaj scioj en Esperanto kaj ricevi diplomon pri tio, absolvu superan ekzamenon ĉe via landa asocio. Zorge tralerninte tiun ĉi libron kaj leginte la necesan literaturon, vi devos esti kapabla por tio.

Troviĝas homoj, kiuj diras, ke ili ne bezonas Esperanton, ĉar ili **povas** tre bone vivi ankaŭ sen ĝi, tute vere oni povas, same kiel oni povas vivi sen biciklo, sen aŭtomobilo, fervojo, aeroplano, telefono, telegrafo, gramofono, kino, radio k.t.p. Sed tiuj produktoj de la moderna tekniko povas fari nian vivon pli agrabla kaj komforta. Same ankaŭ Esperanto, kvankam ĝi ne apartenas al niaj nepraj vivbezonaĵoj, povas plikomfortigi nian kulturalan nivelon. Ĉar en nia tempo ĝi estas jam vera kulturfaktoro, kiu spirite proksimigas nin al la aliaj popoloj kaj ilia kulturo. Ni do eluzu Esperanton en ĝia rolo de internacia lingvo! Kaj samtempe ni ne forgesu malfermi ankaŭ la okulojn de la «nekredemaj Tomaso» kaj ĉiamaniere labori por la progreso kaj disvastiĝo de Esperanto!

# I N D E K S O

-aĉ- § 44  
-ado § 148  
adjektivoj § 10.2, 18  
adjektivigado de verboj § 127  
adverboj § 10.6, 28, 29  
adverboj de loko § 66  
adverboj de tempo kaj mezuro § 73  
adverbigado de verboj § 127  
adverbialo § 58  
afiksoj § 23, 132-155  
afiksoj kiel memstaraj vortoj § 155  
ajn § 95  
-aĵo § 133  
akcento § 8  
akuzativo § 15, 16, 17, 30. Rim. 4, 48, 49, 76-80, 125  
akuzativo de mezuro § 78  
akuzativo de tempo § 77  
akuzativo anst. prepozicioj § 76  
al § 115  
alfabeto § 1  
-ano § 50  
ankoraŭ § 99  
anstataŭ § 81, 86  
-anta § 31  
-ante § 39  
-anto § 30  
antaŭ § 86, 117  
antaŭ ol § 86, 117  
apostrofado § 129  
apud § 118

-aro § 141  
artikolo difina § 13, 126  
artikolo nedifina § 12  
-ata, -ato § 61  
aŭ § 100  
Bo- § 136  
bs § 5  
bt § 5  
  
Ci § 87  
  
Ĉe § 49, 118  
ĉi § 94  
-ĉjo § 139  
ĉu § 100  
  
Da § 112  
dativ-objekto § 58  
de § 111  
depost § 72  
derivado § 23-25, 132-155  
deziro § 84  
direkto § 48  
dis- § 145  
  
-ebla § 150  
-eco § 122  
eĉ ne unu § 106  
-eg- § 36  
-ejo § 107  
ek- § 70, 72  
ekde § 72  
eks- § 142  
el § 113

elparolo § 2  
-ema § 149  
en § 45, 48, 115  
-enda § 63.Rim.  
epiteto § 56  
-ero § 141  
estas § 17, 21  
-estro § 140  
-et- § 36  
evoluo de Esperanto § 162

Fariĝi § 70.Rim 4  
fi- § 44

Ge- § 135  
genitivo § 65

Ĝis § 116

Havas § 17, 21  
horloĝo § 105

Ĥ § 6

-ido § 138  
-igi § 68, 69  
-iĝi § 70,71  
-ilo § 110  
imperativo § 84  
-ino § 137  
-inda § 151  
infinitivo § 84, 86  
-ingo § 109  
-inta § 31  
-inte § 40  
-into § 30  
interjekcioj § 10.9  
-io § 123  
-ismo § 45  
-isto § 30.Rim 3, 45

-ita, -ito § 62  
Jam § 99  
je § 75

Kiel § 80, 96, 97  
kio, kiu, kia § 91  
komo § 130  
komparado § 96  
konjunkcioj § 10.8  
korelativa tabelo § 90-95  
krom § 81, 86  
kun § 119  
kunmetitaj tempoj § 32, 33,  
34, 37, 38  
kunmetitaj vortoj § 27, 67, 120  
kvazaŭ § 97  
kz § 5

La § 13, 126  
-lando § 123  
landnomoj § 123  
lasi § 68.Rim.

Majuskloj § 11  
mal- § 35  
malantaŭ § 117  
mallongigado de frazoj § 38,  
39, 40, 41, 64  
mis- § 146

Neado § 128  
nek § 106  
nerekta modo § 83  
-njo § 139  
nomoj komunaj § 10  
nomoj propraj § 10, 13.B.1,  
124  
numeraloj § 10.5, 101

Objekto § 16, 17, 55

-obl- § 102  
okupi § 62.Rim. 2  
oni § 88  
-ono § 103  
-onta § 31  
-onte § 30  
-ope § 103  
optativo § 84  
ordono § 84  
-ota, -oto § 63  
-oza § 144

Participoj aktivaj § 30-34, 37-41  
participoj pasivaj § 60-64  
per § 119  
pli § 98  
plu § 98, 99  
po § 104  
por § 114  
por ke § 84, 114.Rim. 3  
posedo § 65  
posedaj pronomoj § 65  
post § 117  
pra- § 143  
predikato § 53  
predikata suplemento § 19, 20, 28, 57, 85  
prefikso § 23  
prepozicioj lokaj § 46  
prepozicioj kun infinitivo § 86  
prepozicioj senakuzativaj § 49  
preter § 49  
principo de neceso kaj sufiĉo § 154  
pro § 114  
pronomoj § 10.4  
pseŭdosufiksoj § 153

Radiko § 23, 24  
re- § 147  
refleksiva pronomo § 89  
rekta modo § 83  
rekta objekto § 16, 17, 55  
rilataj vortoj § 98

S § 3  
sen § 86, 119  
senpersonaj verboj § 54, 82  
si § 89  
silabo § 7  
sintakso § 52-59  
stilo § 156  
subjekto § 16, 54  
substantivo § 10.1  
sufikso § 23  
superlativo § 96  
sur § 46, 48

Tempoj de la verboj § 83  
titoloj § 11.4, 13.B.1  
tra § 49  
transitivaj verboj § 17  
tre § 36

-ujo § 108, 123  
-ulo § 51  
-um- § 134

Verboj § 10.3, 17, 82, 83, 127  
verbigado § 131  
vi § 87  
vokaloj § 9  
vortklasoj § 10, 25  
vortordo § 59



# E N H A V O

Antaŭparolo

Kelkaj konsiloj al kursgvidantoj

## UNUA LEClONO

1. Alfabeto
2. Elparolo
3. s kaj z
4. ng kaj nk
5. bs, bt, kz
6. ĥ
7. Silabo
8. Akcento
9. Longeco de la vokaloj
10. Vortklasoj
11. Majuskloj kaj minuskloj

Tasko 1

## DUA LEClONO

12. Nedifina artikolo
13. Difina artikolo
14. Malfeliĉa komercisto
15. Akuzativo
16. Subjekto kaj objekto

Tasko 2

Tasko 3

## TRIA LEClONO

17. Verbo kaj objekto
18. Adjektivo
19. La ĉambro estas varma
20. La kato estas besto
21. Estas kaj havas
22. Miaj gepatroj

Tasko 4

### **KVARA LECIONO**

23. La konsisto de la vortoj  
Tasko 5
24. La karaktero de la radikoj
25. Patro, patra, patre
26. Ekzerco
27. Kunmetitaj vortoj  
Tasko 6

### **KVINA LECIONO**

28. Estas varme
29. Adverbo  
Tasko 7
30. -anto, -into, -onto
31. -anta, -inta, -onta
32. estas -inta
33. estas -anta
34. estas -onta
35. Prefikso: mal-
36. -et- kaj -eg-

### **SESA LECIONO**

37. Skemo pri la kunmetitaj tempoj de la verbo
38. Mallongigado de frazoj
39. -ante
40. -inte
41. -onte
42. Mia unua skiado  
Tasko 8
43. La gastama provinco
44. -aĉ- kaj fi-
45. -isto kaj -ismo

### **SEPA LECIONO**

46. Prepozicioj
47. La kazo post la prepozicioj
48. Direkto
49. Senakuzativaj prepozicioj  
Tasko 9
50. -ano-

51. -ulo

### **OKA LEClONO**

- 52. Mallonga sintakso
- 53. Predikato
- 54. Subjekto
- 55. Objekto
- 56. Epiteto
- 57. Predikata suplemento
- 58. Adverbialo (adjekto)
- 59. Vortordo
- Tasko 10

### **NAŬA LEClONO**

- 60. Pasivaj participoj
- 61. -ata, -ato
- 62. -ita, -ito
- 63. -ota, -oto
- 64. Mallongigado de frazoj
- Tasko 11
- 65. Posedo (genitivo)

### **DEKA LEClONO**

- 66. Adverboj de loko
- 67. Kunmetitaj vortoj
- 68. -igi
- 69. Surtabligi, enpoŝigi
- 70. -iĝi
- 71. Enlitigi, altabligi
- 72. Prefikso ek-
- Tasko 12

### **DEK-UNUA LEClONO**

- 73. Adverboj de tempo kaj mezuro
- 74. Silentemaj fiŝistoj
- 75. Je
- 76. Akuzativo anstataŭ prepozicioj
- 77. Akuzativo de tempo
- 78. Akuzativo de mezuro

- 79. Resumo de la akuzativo
- 80. Kiel
- 81. Anstataŭ kaj krom
- Tasko 13

### **DEK-DUA LECIONO**

- 82. Verboj
- 83. Tempoĵ de la verboj
- 84. Ordono kaj deziro
- 85. Predikativo
- 86. Prepozicioj kun infinitivo
- 87. Vi kaj ci
- 88. Oni
- 89. Si
- Tasko 14

### **DEK-TRIA LECIONO**

- 90. Korelativa tabelo
- 91. Kio, kiu, kia
- 92. Kunmetado kaj derivado
- 93. Rilataj vortoj
- 94. Ĉi
- 95. Aĵn
- 96. Komparado
- 97. Kiel kaj kvazaŭ
- 98. Pli kaj plu
- 99. Ankoraŭ, jam, plu
- 100. Ĉu kaj aŭ

### **DEK-KVARA LECIONO**

- 101. Numeraloj
- 102. -obl-
- 103. -ono, -ope
- 104. Po
- 105. Horloĝo
- 106. Nek, eĉ ne unu
- 107. -ejo
- 108. -ujo
- 109. -ingo
- 110. -ilo

## **DEK-KVINA LECIONO**

- 111. De
- 112. Da
- 113. El
- 114. Por kaj pro

## **DEK-SESA LECIONO**

- 115. Al kaj en
  - 116. Ĝis
  - 117. Post kaj antaŭ
  - 118. Ĉe kaj apud
  - 119. Kun, per, sen
  - 120. Kunmetaĵoj de prepozicio kaj verbo
  - 121. Adverbigado de la prepozicioj
  - 122. -eco
- Tasko 15

## **DEK-SEPA LECIONO**

- 123. Landnomoj
  - 124. Propraj nomoj
  - 125. Akuzativo
  - 126. Difina artikolo
  - 127. Adjektivigado kaj adverbigado de verboj
  - 128. Neado
  - 129. Apostrofado
  - 130. Komo
- Tasko 16

## **DEK-OKA LECIONO**

- 131. Verbigado

## **DEK-NAŬA LECIONO**

- 132. Afiksoj
- 133. La substantiva sufikso -aĵo
- 134. -um-
- 135. Ge-
- 136. Bo-
- 137. -ino
- 138. -ido

- 139. -ĉjo kaj -njo
  - 140. -estro
  - 141. -aro kaj -ero
  - 142. Eks-
  - 143. Pra-
  - 144. -oza
  - 145. Dis-
  - 146. Mis-
  - 147. Re-
  - 148. -ado
  - 149. -ema
  - 150. -ebla
  - 151. -inda
  - 152. Afiksa tabelo
  - 153. Pseŭdosufiksoj
  - 154. La principo de neceso kaj sufiĉo
  - 155. Afiksoj kiel memstaraj vortoj
- Tasko 17

## **DUDEKA LECIONO**

- 156. Stilo
- 157. Historio de Lingvo internacia
- 158. Mallonga biografio de Zamenhof
- 159. El la «Vojo» de Zamenhof
- 160. El la historio de Esperanto
- 161. Deklaracio pri Esperantismo
- 162. La evoluo de Esperanto

**Kaj nun?**

**INDEKSO**

**ENHAVO**

LIBRO DE



**BILBAO (HISPANUJO)**

# Henrik Seppik

**Henrik** (Heinrich) **SEPPIK** (pseŭdonimo Sepamaa) (Allari) (naskiĝis la 9-an de februaro 1905 en Pärnu, mortis la 4-an de februaro 1990) estis pioniro de la estona Esperanto-movado, Esperanto-instruisto, -gramatikisto kaj -vortaristo.

## Esperanto-instruisto

Seppik okupiĝis pri turismo. Li esperantiĝis en 1920 kaj gvidis multajn kursojn en Tartuo, Talino, Pärnu kaj Petseri inter 1924 kaj 1928. Dum pluraj jaroj li estis estrarano de Esperanto-societoj. Li estis lektoro de Esperanto en la Popola Universitato en Pärnu, 1924 kaj en Tartuo, 1928, Cseh-metoda instruisto kaj propagandisto en Svedlando, 1929-1931, en Norvegujo, 1932, poste ĝis 1939 en Danio kaj Ĉeĥoslovakio. Seppik estis fondanto kaj prezidanto de la estona Esperanta Turista Komisiono (ETK), kiu i.a. organizis turisman interŝanĝon kun Svedio. Kunlaboranto de la Enciklopedio de Esperanto.

## Tradukisto, gramatikisto, vortaristo

Seppik debutis internacie per traduko el Friedebert Tuglas, “*Kvin noveloj*” (1924). En 1935 aperis lia “*Sistema kurso de Esperanto*”, kaj en 1938 la fama kurslibro “*La tuta Esperanto*”, “gramatiko por progresintoj - gvidilo por kursestroj”, kies 4-a eldono aperis en 1984. Dek jarojn (1947-1956) li pasigis en stalina koncentrejo; tamen eĉ poste li aktivis sub la kaŝnomo Sepamaa, i.a. aperigante vortaron Esperantan-estonan kaj estonan-Esperantan (aperinta en 1957) kaj redaktante Esperanto-eldonaĵojn por estonaj eldonejoj.

## Verkoj

“*Högre kurs i Esperanto*” (1936)

“*Systematický kurs mezinárodního jazyka Esperanto*” (por la ĉeĥa adaptis Ladislav Krajc)

“*Systematisk kurs i Esperanto*” (Stockholm: Förlagsföreningen Esperanto, [1932])

“*La tuta Esperanto*” (gramatiko por progresintoj, gvidilo por kursestroj), 4-a eldono 1984

“*Esperanto keele süstemaatiline kursus*” (1936)

“*Väike Esperanto-eesti ja eesti-Esperanto sonaraamat*” (1957)

## Tradukoj

Andresen, N. - Oras, A.: “*Mallonga konspekto pri la estona literaturo*” (En: “*Estona antologio*”; p. 7 - 13)

“*Fabeloj kaj folkloro*” (trad. Helmi Dresen kaj Hilda Dresen, Agnes Nii, Henriko Seppik, A. R. Saul, kaj Villem Vaher) - (En: “*Estona antologio*”; p. 15 - 31)

Ojalo, Jaan: “*Esperanto keele opik*” (Toimetanud Henrik Sepamaa. - Tallinn: "Valgus", 1973, 134 p.)

Tuglas, Friedebert: “*En la Fino de la Mondo*” (1924)

Tuglas, Friedebert: “*Kvin noveloj*” (1924)

Tuglas, Friedebert: “*Popi kaj Huhuu*” (1924, novelo)

(El “*Vikipedio*” kaj tiu ĉi –parte– el “*Enciklopedio de Esperanto*” [1933-34])